

Andreas Künzli

Das Jahrhundert des Esperanto

Internationale Sprache Esperanto im 20. Jahrhundert im
Spannungsfeld von Politik, Gesellschaft und Wissenschaft

Die wahre Geschichte der Esperanto-Bewegung – eine
Demythologisierung

Eine unabhängige, kritische Fallstudie zu ausgewählten Ländern
mit einem Ausblick ins 21. Jahrhundert



Quelle: <https://www.onb.ac.at/en/museums/esperanto-museum/about-the-esperanto-museum>

Historio de la Esperanto-movado en la komunisma mondo:

Kiel la oficiala Esperanto-movado de GDR fariĝis komplico de la komunisma partio kaj nesto de la Stasio

La vero pri la Esperanto-movado en la komunisma GDR-diktaturo

La Esperanto-movado de la komunisma GDR-diktaturo inter malpermeso kaj tolero, ŝtata kontrolo kaj polica kunlaboro

Aperis nova signifa dokumenta studo pri la historio de la Esperanto-movado en „Germana Demokratia Respubliko“ de Hartwig Wischendorf

Enkonduko

Sub la kondiĉoj de la regado de la ŝtat-komunismaj reĝimoj Esperanto reaktiviĝis post la Dua Mondmilito, precipe post la morto de Stalin, en certaj landoj de la sovetia bloko, kiuj malaperis malantaŭ la „Fera Kurteno“, precipe en Pollando, Hungario kaj Bulgario. Tie renaskiĝis kaj establiĝis oficialaj Esperanto-organizoj, kiuj rilatis lojale al la regantaj komunismaj partioj, kiuj siavice kontraŭbatalis, subpremis, malpermesis kaj persekutis ĉiajn opoziciajn kaj politike nekonformismajn esprimojn, voĉojn kaj opiniojn en la politiko kaj socio. Dank’ al la engaĝiĝo de sistemfidelaj Esperanto-funkciuloj, kutime mem komunistoj aŭ membroj de siaj landaj komunismaj partioj, kiuj kontrolis la proprajn movadajn vicojn por eviti deviojn, kritikon kaj aliajn politikajn-ideologiajn riskojn, la landaj Esperanto-movadoj ricevis la oficialan permeson ekzisti, estis tolerataj kaj eĉ ĝuis ŝtatan subtenon, se ili respektas la regulojn kaj leĝojn de la komunisma reĝimo. Por tiuj permeso, tolero kaj subteno la Esperanto-movadoj en tiuj landoj pagis altegan socipolitan prezon (pri kiu publike paroli estis strikte malpermesite kaj tabue): nome la prezon de la totala dependeco de la bonvolo de la komunisma partio kaj preskaŭ kompleta manko de la sendependeco, libereco kaj privateco de la asocia vivo. Sekve la Esperanto-organizoj ne nur adaptiĝis al la nova realo kaj obeis al la validaj reguloj kaj leĝoj, kiuj estis truditaj al ili, sed siaflanke eĉ ebligis al la komunismaj partioj utiligi Esperanton por la politika propagando, kiu estis unu el la intencoj de la komunistoj, krom kontroli la esperantistojn. Kun fatalaj sekvoj. La senskrupula uzurpado de la ideoj de Zamenhof kaj Esperanto fare de la komunismaj pacpropagandistoj, kiun tiuj landaj asocioj devis elteni, kaŭzis, ke tiuj ideoj estis prezentitaj en politike kaj ideologie komplete tordita, fremda, falsita kaj perversigita maniero en komunisma (fakte leninisma) senco, tie ke ili havis finfine nur malmulton aŭ nenion komunan kun la originaj ideoj kaj celoj de la esperantismo. Trakti tiun problemon estis malpermesite kaj neeble, ĉar tio signifus kritiki la devigan oficialan politikon, kion la esperantistoj nepre evitis por ne ekhavi problemojn kun la partio kaj ŝtata potenco. Tiu politiko, kiu plene dependis de la volo de Sovetunio, estis kvazaŭ sankta kaj netuŝebla, kaj neniu esperantisto kuraĝis publike pridubi aŭ kritiki ĝin. Tiel la Esperanto-movado(j) en la t.n. socialismaj landoj estis rapide submetitaj al la reganta politika ordo, ĝiaj membroj forĝis la kriman naturon de la komunisma aŭ (post)stalinisma regado kaj iliaj organizaĵoj neeviteble fariĝis lojalaj kaj fidindaj komplicoj, lakeoj kaj agentoj de la regantaj komunismaj partioj. Kiel dirite – kun fatalaj sekvoj, ĉar ili evidente ne konsciis, ke ili troviĝas en (morala) dilemo.

La parte malavara (sed tamen kompare modesta) financa subteno de la Esperanto-movadoj en iuj socialismaj landoj¹ estis sen kritikaj konsideroj laŭdata, glorata kaj festata

¹ Krom en Pollando, Hungario kaj Bulgario ankaŭ en aliaj komunisme regataj landoj kiel Ĉeĥoslovakio, Sovetunio, Jugo-slavio, Ĉinio, Vjetnamio kaj Kubo la Esperanto-organizoj ricevis rektan aŭ malrektan ŝtatan

kvazaŭ kiel miraklo fare de la respondecaj gvidantoj kaj aktivaj membroj de tiuj movadoj, kiuj vidis en tiu apogo eksterordinaran kaj unikan ŝancon por disvastigi Esperanton. Oni fanfaronis, ke neniam antaŭe en la historio de la Esperanto-movado ŝtatoj apogis Esperanton en tia altnivela grado. Efektive miloj da homoj lernis Esperanton, sed la kapacito ankaŭ atingis limon. La internacia Esperanto-movado volonte aplaudis la novajn „sukcesojn“, „progresojn“ kaj „rekordojn“ de Esperanto en la komunisme regataj landoj, miris kaj ĝojis pri la enviinda „subteno“ flanke de tiuj „pacismaj“ ŝtatoj, ĉe kiuj en la realeco temis pri danĝeraj, agresemaj kaj krimaj komunismaj diktaturoj, kiujn oni tamen evitis kritiki pro la timo, ke en tia kazo ili povus ĉesigi sian apogon al Esperanto, eble eĉ persekuti kaj subpremi esperantistojn. El la vidpunkto de la demokratiaj landoj de la „libera(la)“ okcidenta mondo la komunismaj ŝtatoj sistemece lezadis la universalajn homajn rajtojn, kies respektado estis postulata de la statutoj de la Esperanto-asocioj mem. Pro la „politika neŭtraleco“ la Esperanto-movado (kiu mem estis regata de konvinkitaj mal-dekstruloj kaj komunistoj) evitis kritiki la lezadon de la homaj rajtoj en tiuj landoj. Sendu-be la komunismaj potenculoj, kiuj ĝojis pri la ĉi-rilata silentado de la Esperanto-movado, vidis en Esperanto krom ilo por politika propagando ankaŭ rimedon por akceli la enlandan kaj internacian turismon por eskapi la internacian politikan izolitecon kaj ekonomian stagnadon. La gastamo de la esperantistoj en la orienteŭropaj landoj, precipe balkanaj, estis tradicie granda, kvankam oni ankaŭ timis havi rektajn kontaktojn kun eksterlandanoj, kiujn la partiaj oficialuloj parte celis eviti.

Kiel montris la situacio de la Esperanto-movado post la kolapso de la komunismaj reĝimoj en la koncernaj landoj en 1989, la plua ŝtata subteno de la Esperanto-movado forfalas, kaj la balono de la Esperanto-iluzioj krevis. Pollando, Hungario, Bulgario kaj aliaj eksaj socialismaj ŝtatoj preskaŭ komplete perdis la intereson pri Esperanto.² De Esperanto restis pli kaj pli malmultaj spuroj, ĝiaj adeptoj amase elvaporigis kaj forlasis la movadon, kiu devis kontentiĝi pri kelkcent aŭ kelkdek aktivuloj kaj esence limiĝis al la iama kerno de la postmilita generacio, dum freŝaj fortoj mankis. En la iamaj socialisma landaro hodiaŭ apenaŭ iu homo plu parolas pri Esperanto, kaj la juna generacio ne plu konas aŭ lernas ĝin. La temo perdis sian iaman aktualecon,³ kaj la iam ŝtate „protektataj“ Esperanto-asocioj fariĝis pure privataj.⁴

financan subvencion por infrastrukturo, presaĵoj, kongresoj, instruado kaj vojaĝoj. En Hungario la Esperanto-movado tiel favore evoluis, ke la honora prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, d-ro József Halász, okaze de la 120-jara jubileo de HEA parolis pri „brilepoko en la vivo de nia asocio“ (vd.

<http://esperantohea.hu/120-jaroj-de-hungaria-esperanto-asocio>). Alflanke en Rumanio la Esperanto-movado estis plejparte forte malhelpata, dum en Albanio, kie la regantaj komunistoj kontraŭbatalis ĉiuspecan eksteran influon, estis praktike malpermesite agadi por Esperanto. Tiu financa subvencio de la Esperanto-organizaĵoj kondukis al la erara kredo aŭ vekis la (falsan) impreson, ke la komunismaj reĝimoj subtenas Esperanton kaj la Esperanto-movadon. La vero estas, ke la subvencio de tiuj asocioj celis la financadon de la socia kontrolo kaj politika propagando ĉefe en landoj, kie la Esperanto-movado estis sufiĉe forta. Dum la politika premo estis plej forta en SU kaj BG, ĝi estis iom malpli rigora en HU, PL kaj YU, kiuj parte estis pritaksitaj kiel „liberalaj“ „barakoj“ de la komunisma „tendaro“. Depost junio 1948 YU eĉ ne plu estis parto de la sovetia bloko. Pri la komunisma GDR-diktaturo, kiu formis apartan kazon, vd. aparte en ĉi tiu kontribuaĵo.

² Nu, en Hungario daŭre eblis elekti Esperanton kiel duan fremdlingvon kiel studfakon kaj en Pollando establiĝis interlingvistikaj studoj en la Poznana universitato, sed nur malmultaj studentoj elektis tiujn opciojn.

³ La Esperanto-movado kutimas kulpigi la anglan lingvon kaj la maŝinan tradukadon pri la forpuŝado de Esperanto, sed ekzistas ankaŭ aliaj faktoroj, kiujn la esperantistoj kutime forgesas aŭ prisilentas en siaj konsideroj pri la krizo de siaj lingvo kaj movado. La ĉefa el ili estas la konsidero, ke la homaro neniam favoris la enkondukon de Esperanto kiel universalan lingvon, ĉar la plimulto de la teranoj kredas, ke la utiligo de „artefarita“ lingvo ne taŭgas por tiu celo.

⁴ Bazajn informojn pri tiaj asocioj vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Pola_Esperanto-Asocio, https://eo.wikipedia.org/wiki/Hungaria_Esperanto-Asocio, https://eo.wikipedia.org/wiki/Bulgara_Esperanto-Asocio.

En la socialisma landaro la Esperanto-movado de „Germana Demokratia Respubliko“ (GDR) prezentis iom specialan kazon. En tiu „dua germana“ ŝtato, fondita en oktobro 1949 kaj malaperinta en oktobro 1990, Esperanto-*organizaĵoj* fariĝis malpermesitaj eksplacite laŭ leĝo aperinta en januaro 1949. La estroj de la komunisma partio SED konsideris Esperanton senutila lingvo kaj ĝian movadon danĝera, ĉar nemarksisma, „burĝa“ kaj „kosmopolitisma“.⁵ La paranojaj SED-gvidantoj aparte timis Esperanton pro la facilaj translimaj kontaktoj, kiujn ĝi favoris kaj ebligis, nature unuavice kun okcidenta Germanio, la ĉefa malamiko de la komunisma GDR-diktaturo.

En aŭgusto 1961 SED subite proklamis la malpermesan reguligon de 1949 malvalida kaj en 1965 permesis la starigon de esperantista laborrondo kadre de la Kulturligo de GDR,⁶ kies tasko estis antaŭ ĉio gvidi kaj kontroli la agadon de la esperantistoj, kiuj volis esti aktivaj en GDR. Kun fatalaj sekvoj. La aktivuloj ne nur devis strikte respekti la severajn regulojn de la oficiala ŝtata politiko de GDR, sed ili ankaŭ ne povis fari en la propra domo, kion ili deziris. Sub tiaj ege rigidaj kaj limigaj kondiĉoj ne malmultaj esperantistoj perdis sian intereson pri Esperanto kaj ĝia movado, dum aliaj pretis kunlabori kun la centristaj strukturoj, kiuj estis absolutisme kontrolataj de la partiaj organoj. Tio inkluzivis la sekretan kunlaboron kun la organoj de la ŝtata sekureco sub la tegmento de la Ministerio por Ŝtata Sekureco (MŜS), sen kiu neniu agado povis okazi en tiu artefarita stalinisma kreaĵo, kiun la demokratia libera(la) Okcidento klasifikis kaj misfamigis kiel komunisman „maljurecan“ ŝtaton⁷, ĉar oni opiniis, ke en ĝi la internacia juro kaj la homaj rajtoj estis grave, sistemece kaj grandstile lezataj same kiel en ĉiuj ceteraj socialismaj landoj. La ĉefaj politikaj protagonistoj de la komunisma GDR-diktaturo, Walter Ulbricht, poste Erich Honecker, kiuj estis instalitaj de Moskvo en la Sovetia Okupacia Zono, politike influis kaj regadis sian teritorion kiel aŭtokratoj de la partio SED inter 1945 kaj 1989, konante nenium pardonon kun opoziciuloj, kritikantoj kaj malamikoj de la socialismo. Pri la senkompataj juraj sub-premado kaj persekutado de malamikoj de la sistemo okupiĝis justic-ministrino Hilde Benjamin kaj Erich Mielke, estro de la potenca Ministerio por Ŝtata Sekureco (MŜS, nomata Stasio). Ekde 1952 GDR herme-tike fermis siajn limojn kontraŭ okcidenta Germanio. Post la laborista ribelo de la 17a de junio 1953, kiu estis sufokita de sovetiaj tankoj, la GDR-registaro severigis la reĝimon kaj la ĝeneralan kontrolon en la lando kaj fanatike kaj arbitre suspektis, persekutis kaj ĉasadis ĉiusecajn „malamikajn elementojn, eksterlandajn agentojn, spionojn, sabotistojn kaj kontraŭulojn de la socialismo kaj de la paco.“ La sensacia konstruo de la „Berlina Muro“ en aŭgusto 1961, kiu devis fini plian amasfuĝadon de civitanoj kaj laborfortoj al Okcidento kaj eviti la ekonomian kolapson de la komunisma GDR-diktaturo, kulmine kronis la izoliĝon de la orienta zono de Germanio, kiu tamen fariĝis pli kaj pli peza hipoteko por Sovetunio, kiu devis ekonomie subteni ĝin. Ĉe la okcidentaj landlimoj, kiuj estis rigore fortikigitaj per ĉiam pli monstraj bariloj, muroj kaj armilaj sistemoj, okazis severa kontrolado de la vojaĝantoj. Senpermesa forlaso de GDR de propraj civitanoj povis esti drakone punita per longa restado en malliberejo.

De tiu agresema konduto, fakte politika teroro, de la ŝtataj organoj estis koncernata la tuta popolo de GDR, precipe ĉiuseca publika politika opozicio aŭ alternativa aktiveco, kiu estis senskrupule subpremata, elŝaltita, marĝenigita kaj nepre persekutinda. La regantaj komunistoj de la GDR-diktaturo dividis la homaron en du partojn: amikojn kaj malamikojn

⁵ En la malfrua stalinisma periodo „kosmopolitismo“ fariĝis fivorto en antisemitisma senco kaj estis ligita kun cionismo, Israelo, judoj kaj kontraŭ-socialisma agado.

⁶ La „Kulturligo por la „Demokratia Renoviĝo de Germanio“, fondita en julio 1945, celis komence stiri kulturalan evoluon en tuta Germanio en kontraŭfaŝisma kaj demokratia direkto. En la komunisma GDR-diktaturo tamen ĝi funkciis kiel organo por kontroli la kulturalan agadon de la loĝantaro en la senco de SED.

⁷ Germanl. „Unrechtsstaat“. La termino mankas en la Granda vortaro Deutsch-Esperanto de Erich-Dieter Krause, Hamburgo 2007, do oni devas mem inventi ĝin en Esperanto.

– jen Sovetunio, jen la Okcidento. Samtempe SED laŭte propagandis la socialismon kiel pac-politikon flanke de Sovetunio, kies nuklea armilaro minacis la mondon. Klare, sur la alia flanko de la „Fera Kurteno“ troviĝis la armiloj de NATO, kontraŭ kiuj la komunistoj reto-rike pafadis ĉiutage kaj ĉiuokaze en sia agresema gazetara propagando, kiu tordis la faktojn kaj esence remaĉis la sovetiajn mensogojn.

Laŭ la oficiala ŝtata doktrino GDR perceptis sin kiel kontraŭ-faŝisman, socialisman, eĉ demokratian ŝtaton, kiu ambiciis konstrui progreseman, pli justan kaj egalecan socian ordon kompare kun la „burĝa“ kapitalisma mondo, kiu ekspluatis la laboristan klason, kiel oni asertis, kun promeso de brilaj perspektivoj por la estonteco kaj feliĉa vivo en la komunismo. Sed kiel la homoj iom post iom rimarkis, la teorio kaj praktiko, la ambicio kaj realeco draste kunpuŝiĝis. Pro sia socipolitika alternativeco la ŝajne pli humanisma programo de la komunisma GDR-reĝimo komence ĝuis certagradan akcepton kaj aprobon de multaj homoj en tiu novtipa germana ŝtato, kiuj mem estis komunistoj aŭ viktimoj de la hitlerisma nacisocialismo. Post malbonaj spertoj, kiujn multaj civitanoj faris kun tiu socialisma eksperimento, ĝi pli kaj pli perdis siajn ideologian allogon, politikan kredindecon kaj moralan krediton, kio daŭris ĝis la elĉerpiĝo de la komunisma GDR-diktaturo en 1989/90, kiu estis la logika sekvo kaj kulmino de tiu evoluo kaj devas esti vidata en la kunteksto de la disfalo de la sovetia komunismo.⁸

Okulfrapas, ke principoj kiel justeco kaj egaleco, planiteco kaj utopieco de homaj projektoj estis trajtoj kaj vizioj, kiuj estis komunaj kaj al la socialismo/komunismo kaj al la Esperanto-movado. Pro tio tiu movado allogis multajn maldekstrulojn de plej diversaj tendencoj, kvankam ili komplete supertaksis la signifon de Esperanto kiel pacfaktoro en la mondo.

En tiu nova kaj malfacila politika situacio post la milito do troviĝis ankaŭ la orientgermanaj esperantistoj, kiuj estis kaptitaj kaj pli kaj pli subpremataj de la maldekstra komunisma diktaturo, kiu estis importita el Ruslando, la imperio de la mallibereco, kaj perforte trudita al ili kaj kiu montris en sia praktika politika sistemeco, ho ve, similajn trajtojn de la dekstra diktaturo de la nacisocialismo, kiun oni venkis antaŭnelonge en Germanio. La plimulto de la GDR-anoj klopodis adaptiĝi al la nova realo, ĉar multaj el ili tamen ne volis forlasi sian patrujon, vidante ankaŭ pozitivajn flankojn. Sed pli kaj pli ili komprenis la malavantaĝojn, deficitajn kaj difektojn de la nova reĝimo, kiu kondukis ilin al grandega malliberejo, kiun ili ne povis eskapi, kaj devis pacience ĝisatendi la finon de tiu koŝmaro, kiu laŭ la volo de la partiaj gvidantoj devis daŭri eterne, sed kiu finfine ekzistis „nur“ kvardek jarojn.

Post la politika turniĝo de 1989/90 pri la historio de la Esperanto-movado en GDR aperis ĉefe verkaĵoj el la plumo de tiaj aktivuloj kaj funkciuloj, kiuj mem esence influis la evoluon de la Esperanto-movado en GDR, kiun ili mem kontroladis dum la komunisma periodo. La Esperanto-movado estas tia organizo, en kiu unuopaj (memelektitaj) aktivuloj, pro manko de personara alternativo, povas facile okupi gvidajn poziciojn dum jardekoj ĝis en la alta vivaĝo, ĉar Esperanto estas ilia plej ŝatata okupo, kiun ili ofte eĉ pli amas ol sian profesion. Kaj ili povas skribi kaj aserti kion ajn sen kontrolo de iu kompetenta instanco kaj ofte sen timi rikolti kritikon (iliaj verkaĵoj kaj asertoj estas eĉ apogitaj kaj cititaj de kolegoj kaj do iusence fariĝas oficialaj). Kun fatalaj sekvoj por tia movado kaj ĝia oficiala opinia plurismo. Unu el tiuj ĉefaj aŭtoroj nomiĝis Detlev Blanke (1941-2016), tiama sekretario de GDREA, pri kiu ankoraŭ detale temos ĉi-sube. Liaj vidpunktoj estis altgrade sub-

⁸ Ĉi tie ne eblas pli detale skizi la historion de GDR. Ĉar en Esperanto ekzistas neniu moderna libro, kiu objekte traktus la historion de GDR, necesas konsulti nacilingvajn verkojn (kiuj ofte estas elĉerpitaj aŭ parte eble ankoraŭ haveblaj en brokantejoj). La vikipediaj resursoj pri GDR en Esperanto estas enhave tro magraj por esti reale utiligeblaj.

jektivaj, unuflankaj, ideologiecaj aŭ oportunismaj, fakte monopolaj kaj pravemaj, kaj lia maniero interpreti la historion, kiun li mem kreis, grandparte celis pravigi la proprajn farojn. En la kazo de Blanke ankaŭ temas pri ekzemplo de persono kaj aktivulo, kiu plene dependis de la politiko de ŝtato kun „totalisma“ ideologia sistemo, kio signifas, ke liaj opinioj, pritaksoj kaj decidoj devis esti respektitaj ankaŭ de aktivuloj, kiuj havis alian opinionon aŭ faris aliajn pritaksojn, konkludojn kaj decidojn. Aktivuloj, kiuj ne konsentis, riskis gravan konflikton kun tiu kamarado, kiu estis membro de SED. Por la anarkiema naturo de la Esperanto-movado, en kiu ekzistas altgrada individuismo de la opinioj kaj decidoj de siaj aktivuloj, tia discipliniga situacio de supre signifis kvazaŭ katastrofon.

Post la turniĝo en GDR tiaj „politikaj“ aktivuloj – kiel Blanke – povis iomete modifi sian sintenon, kun la senkulpiga aserto, ke diversajn faktojn kaj aspektojn pri GDR ili ne konis kaj eksciis nur post ĝia kolapso, kaj ke nur nun ili komprenis, ke ĉe la ŝtataj gvidantoj de GDR temis pri „krimuloj, kiuj perfidis la socialismon“, ktp., kvankam principe ili restis fidelaj al siaj politikaj konvinkoj kaj idealoj, kiuj ŝajne ricevis iom alian direkton (ekzemple socialdemokratian anstataŭ komunisman). En la tempo de GDR ili ankoraŭ firme rifuzis ĉian kritikon kontraŭ GDR, konsiderante kritikantojn ekster GDR malkompetentaj prijuĝi la aferojn en GDR. Al la aroganteco de tiaj funkciuloj apartenis, ke ili rezignis pri ajna publika pardonpeto ĉe la asociaj membroj, kiujn ili siatempe ĉikanis en la agado, pri kiuj ili malbone parolis aŭ kiujn ili denunciis ĉe la organoj de la ŝtata sekureco. Sed tia konduto estis tipa por praktike ĉiuj Esperanto-asocioj de la iamaj socialismaj landoj.

Sekve la historio de la Esperanto-movado en la komunisma GDR-diktaturo devis resti tia, kiel Blanke kaj aliaj priskribis ĝin. Ĝis nun.

Nur kiam iuj scivolemaj esploristoj, esperantistoj kaj neesperantistoj, inkluzive la recenzanton, komencis fosi en la arkivaĵoj postlasitaj de la Ministerio por Ŝtata Sekureco de GDR, novaj aspektoj, facetoj kaj detaloj de tiu historio povis esti malkovritaj kaj malkaŝitaj, dokumentitaj kaj publikigitaj.⁹

Unu el tiuj raraj esploristoj, Hartwig Wischendorf el Ŝverino (Schwerin),¹⁰ dediĉis sin al tiu tasko kaj meritplene kompletigis tiujn mankantajn sciojn en 186-paĝa libreto, kiu aperis en la germana eldonejo „Books on Demand“ kaj estas havebla en la reta komerco ankaŭ kiel elektronika teksto.¹¹ La aŭtoro ĉefe konsultis materialojn disponigitajn de la arki-voj de BStU (en Görslow/Leezen) kaj de la Federacia Arkivo de Germanio en Berlino. La rezultoj de tiu esploro estas sensaciaj. Wischendorf sukcesis trovi ĝis nun nekonatajn fontojn kaj havigi al si netuŝitajn dokumentojn, kiuj servis al li por verki la unuan objektivan, senlegendan kaj senmitan skizon pri la historio de la Esperanto-movado de GDR, kiu konsideras ankaŭ lokajn specifaĵojn. La rakonto estas legebla parte kvazaŭ kiel politika krimromano kaj ilustras la malfacilajn kondiĉojn kaj cirkonstancojn de la ekzisto de la Esperanto-movado de la komunisma GDR-diktaturo inter 1945 kaj 1990, de la tempo de la asocia malpermeso en 1949 ĝis la malmulte dezirata tolero de oficiala centra Esperanta

⁹ Kompare kun Germanio, kie la materialo de la Stasio estas sufiĉe facile konsultebla en ĉi-rilataj arkivoj fare de la interesata publiko, do ne nur de rekte koncernitaj personoj, sed ankaŭ de historiistoj kaj ĵurnalistoj, la aliro al tia materialo en aliaj iamaj socialismaj landoj ŝajnas esti pli limigita kaj do pli komplika. (vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Stasi-Unterlagen>).

¹⁰ Hartwig Wischendorf (nask. 1937) estas la filo de la ŝverina esperantisto Wilhelm Wieschendorf, kiu postmilitite membris en la „Lunda Klubo“ en Ŝverino. Post la malpermeso havi Esperanto-asociojn en 1949 la lokaj esperantistoj ne plu kunvenis kaj lia patro forlasis Esperanton, ĉar li ne deziris aktivi sub la SED-reĝimo.

¹¹ Hartwig Wischendorf: Esperanto in der DDR. Zwischen Verbot und Duldung. Books on Demand (bod.de, bod.ch) 2021.

sekcio sub la strikta kontrolo de la komunisma partio SED kaj de la Ministerio por Ŝtata Sekureco (t.n. Stasio).

La sekva ampleksa recenzo pri la germanlingva libro enfokusigas interesajn epizodojn, kiuj reprezentas esencajn etapojn en la historio de la Esperanto-movado en GDR, kies ĝis nun malpli aŭ entute nekonataj aspektoj, detaloj kaj problemaj flankoj estos aparte prilimitaj.

Esperanto en GDR: 'Malpermeso' kaj protestoj (1949-1961)

Dum post la Dua Mondmilito en la landoj de okcidenta Eŭropo, inkluzive okcidentan Germanion, kaj post la morto de Stalin (marto 1953) ankaŭ en Pollando, Hungario kaj Bulgario la Esperanto-movado povis pli malpli normale daŭrigi sian aktivecon, kvankam sub tute ŝanĝitaj politikaj kondiĉoj, la esperantistoj en la Sovetia Okupacia Zono (GDR ekde oktobro 1949) alfrontis neimageblajn malfacilaĵojn kaj obstaklojn, kiuj dume neniiĝis la ŝajne esperoplenan rekomendon. En 1946 ne estis klare, ĉu Esperanto mem estis malpermesita aŭ ne en la orienta sektoro, despli ke la administracioj de la orientgermanaj landoj dissendis kontraŭdirajn informojn. Antaŭ ĉio estis malklare, ĉu tia malpermeso estis dekretita de la ministerio por popola klerigo aŭ de la sovetia okupacia administracio, t.e. la Sovetia Armea Administracio, mem, Por la supozo, ke la rusa flanko premis la orientgermanan administracion ankaŭ rilate la Esperantan demandon, pruvo ne povis esti trovita. Pli verŝajne estas, ke SED agis memstare por defendi proprajn interesojn, kio aliflanke kompreneble ne eblis sen la konsento de la sovetianoj. Ŝajnas, ke ili tamen ne enmiksiĝis por solvi tiajn (bagatelajn kaj flankajn) aferojn kaj lasis la SED-politikistojn, kiuj estis konsiderataj kiel sufiĉe fidindaj, mem decidi, do speciala premo de la sovetia flanko ne necesis. Se la rusoj efektive konsiderintus tion necesa, kompleta malpermeso certe estus trudita longe antaŭ ol GDR estis fondita. Krome oni ne forgesu, ke ĝis post la morto de Stalin en Sovetunio mem la longe subpremata Esperanto-agado ankoraŭ estis praktike malhelpata.

Pli da klareco pri la statuso de la Esperanto-movado en la orienta zono de Germanio unue estis kreita nur komence de 1949, kiam en la Centra Dekreta Bulteno n-ro 7, parto 1, de la 10a de februaro 1949, eldonita de la germana justic-administracio en la sovetia okupacia zono (GDR ankoraŭ ne ekzistis), estis publikigita la „*Reguligo pri la transigo de popolartaj grupoj kaj popoledukaj asocioj al la ekzistantaj demokratiaj amasorganizoj*“ de la 12a de januaro 1949. La reguligo koncernis i.a.

7 Grupojn de artefaritaj lingvoj, kiuj estas dissolvendaj, kaj

8 Ido- kaj Esperanto-lingvajn angulojn, kiuj estas abolendaj senprokraste en la gazetoj kaj ĵurnaloj.

Ĉi tiu tute neatendita dekreto – kurioza estis la klasifiko de artefaritaj lingvoj en la kategorio de popolartaj grupoj; ĉu temis pri miskompreno ne estas klare – estis perceptita kiel malpermeso de la Esperanto-movado kaj efikis inter esperantistoj kiel ŝoko. Aperis kelkaj kuraĝuloj, kiuj reagis konsternite, ne povis aŭ volis kompreni tiun reguligon, pretis protesti aŭ provis akiri informojn ĉe la aŭtoritatoj kiel tio povis okazi kaj kiuj estas la kialoj. Kvankam la malfavora reguligo dume forpuŝis la zamenhofan lingvon el la publika vivo de la orienta zono, kelkaj adeptoj de Esperanto tamen ne rezignis pri sia ŝatokupo kaj restis aktivaj kadre de privataj kunvenoj, ofte rando de la kontraŭleĝa stato. Korespondado kun okcidentaj landoj estis nedezirata kaj evitenda, la alveno de Esperanto-literaturo, precipe el la kapitalisma mondo, estis blokita de la dogano, la materialo ofte konfiskita aŭ resendita.

La esperantistoj skribis kaj sendis leterojn al plej diversaj partiaj kaj ŝtataj instancoj kaj klopodis esprimi al ili, kiel ekzemple *Alfred Bachmann* el Ĥemnico (Chemnitz) al la Centra Konsilio de „Libera Germana Junularo“ (FDJ) en junio 1949, ke „en la nomo de ĉiuj Esperanto-amikoj de Ĥemnico kaj ĉirkaŭaĵo la malpermeso de la Esperanto-movado estas el la vidpunkto de la demokratio kaj de la interpopola kompreniĝo tute nekomprenebla“. Li postulis repreni la malpermeson por Esperanto kaj minacis informi la mondan unuiĝon de proletaj esperantistoj pri la situacio de la Esperanto-movado en la „orienta zono“. *Werner Bernhardt* el Dresdono, kie ekzistis aktiva Esperanto-laborkomunumo, sciigis en marto 1950 al la ministerio por popola klerigo, ke „... ni konsideras tion kontraŭdiro al nia demokratia konstitucio (art. 12),“¹² finfine „la subskribintaj junaj esperantistoj pozitive rilatas al la aferoj de Germana Demokratia Respubliko kaj estas en amikeco kun Sovetunio, la popoldemokratioj kaj ĉiuj aliaj pacamaj popoloj“. Pro tio ili „postulas ebligi al ili la kunlaboron en la kultura konstruado de nia Germana Demokratia Respubliko.“ *Kurt Weber* el Dresdono sendis sian leteron de marto 1956 eĉ rekte al la ministro pri kulturo, kiu tiam estis la fama verkisto Johannes R. Becher,¹³ en kiu li atentigis lin, ke la malpermeso de Esperanto estas „... nekomprenebla al ĉiu sincera esperantisto“ kaj devis „plej profunde ofendi kaj indignigi ĉiun unuopan, ĉar ĉiu vera esperantisto portas en si la senton de la frateco, de la interpopola kompreniĝo kaj la volon al la monda paco.“ Pri la politika lojaleco de tiuj esperantistoj oni do ĝenerale ne povis dubi. Sed tiu lojaleco ne estis rekompencita aŭ honorita de la GDR-aŭtoritatoj, eĉ male kiel montros la daŭrigo de la historio.

Johannes P. Schmidt el Zittau, kiu plendis kontraŭ la reguligo, eĉ estis arestita kaj post duonjara esplora malliberigo kondamnita al 2,5-jara arestado en prizono, 5-jara pekliberiĝo kaj pagado de ĉiuj kostoj, kiuj estiĝis pro lia kazo. Malagrablajn spertojn kun GDR-aj aŭtoritatoj faris en tiu tempo ankaŭ du idistoj el Köthen kaj Greifswald, tiel ke la ministro pri internaj aferoj ordonis pli detale observi la Ido-scenon en la nordoriento de la respubliko.

Ĉiuj tiuj bonintencaj asertoj de konvinkitaj esperantistoj (inter kiuj ekzistis ankaŭ konvinkitaj komunistoj) evidente ne impresis la kontaktitajn GDR-instanculojn. La respondoj, kiuj revenis kaj estis verkitaj en naŭza burokrateca lingvaĵo, ĉefe atentigis la esperantistojn pri la valida leĝa situacio. Ekzemple la „Ĉefa fako pti popolaro“ de la ministerio por popola klerigo komunikis en julio 1951, ke „okazas intertraktoj pri la permeso ... de Esperanto-grupoj“, ke la esperantistoj estas petataj „atendi la definitivan reguligon“, pri kiu ili estos „informitaj post publikigo“ de la koncerna komuniko, kaj ke „la koncerna leĝpropono estos baldaŭ finpretigota“, k.s. Krom tio la esperantistoj ricevis komplete strangajn kaj absurdajn respondojn de aŭtoritatoj kiel la „Fako pri kunordigo de la kulturelaboro“, kiu verkis sian komunikon por la „Oficejo por informado, ĉefsekcio pri pac- kaj planpropagando“. En la politikeca teksto oni krude asertis, ke la „Esperanto-movado estas utiligata

¹² Artikolo 12 de la GDR-konstitucio de 1949 permesis al la civitanoj fondi asociojn tiel longe kiel iliaj celoj ne kontraŭis la kriminalan juron. Laŭ tio la dekreto de la malpermeso krei Esperanto-asociojn, kiu plu validis post la fando de GDR en novembro 1949, do estis klare kontraŭkonstitucia. Tamen ne eblis kontroli la laŭkonstituciecon de la regularo de 1949 aŭ plendi pri ĝi, ĉar ekzistis neniu sendependaj tribunaloj. Administra jurisdikcio, per kies helpo la civitanoj povintus defendi sin kontraŭ la arbitreco de la decidoj de la politikaj aŭtoritatoj, tute mankis en GDR. La situacio ŝanĝiĝis per la konstitucia reformo de 1968 (vd. sube).

¹³ J.I. Becher (1891-1958) estis germana politikisto, verkisto kaj poeto, komunisto (KPD). Li verkis la poemon „*Resurektinta el ruinoj*“, kiu kun la muziko de Hanns Eisler fariĝis la nacia himno de GDR. En 1953 li ricevis la Stalinan Pacpremion kaj en 1954 fariĝis GDR-kulturministro. Okaze de la morto de Stalin en 1953 li verkis faman poemon je lia gloro, kiu mirigis nemalmultajn samtempojn (vd.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Johannes_R._Becher, https://ghdi.ghidc.org/sub_document.cfm?document_id=4489, https://ghdi.ghidc.org/sub_document.cfm?document_id=4489&language=german).

de la imperiismaj potencoj sub la gvido de Usono“, kaj ke „ĝi tre lerte enportas kamuflitajn pensojn de la kosmopolitismo kaj objektivismo en la germanan popolon ...“ Tiaj stultaj kaj frenezaj frazoj devis soni por esperantistoj kiel stalinisme transformitaj naziaj sloganoj, pri kiuj oni kredis, ke ili estis venkitaj. Sed la „Malvarma Milito“ inter Oriento kaj Okcidento jam plene furoris kaj GDR troviĝis meze en ĝi sen ebleco eskapi el tiu danĝera situacio, kiu povis konduki al la Tria Mondmilito, kaj fanatike kunludis la malpuran ludon flanke de la sovetiaj „amikoj“.

Intertempe la ministerio por popolklerigo, en kies sekcio pri kulturaj rilatoj iu sinjorino d-ro *Marie Torhorst*, membrino de la CK de SED kaj en 1956 estrino de tiu sekcio, traktis petojn el la publiko ankaŭ koncerne Esperanton, pretigis iun oficialan respondon, en kiu estis pakita plej diversaj argumentoj kontraŭ la nuligo de la malpermeso por grupoj de artefaritaj lingvoj. Krom la punkto pri la „kosmopolitisma“ karaktero de artefaritaj lingvoj, kiuj servas kiel preteksto por „pretigi novan militon“ kaj celas „krei kaj disvastigi kamuflitajn internaciajn grupojn de agentoj“, oni aldonis novan, lingvistikan, argumenton. Nome oni asertis, ke estas „lingvistike pruvite, ke artefarite kreitaj lingvoj ne taŭgas kiel rimedo por vera kompreniĝo inter la popoloj“.

Kuriozan opinion reprezentis la Germana Pedagogia Centra Instituto en februaro 1953 pri la rolo de Esperanto en la socio. La ekspertizo de ĉi tiu GDR-instanco, kiu plej verŝajne estis influita de SED-partiaj konsideroj, asertis i.a., ke „ĉe la esperantistoj temas preskaŭ senescepte pri homoj, kiuj krom la propra gepatra lingvo ne scipovas aliajn lingvojn kaj ne havis eblojn lerni tiajn; ĉe ili do esence temas pri homoj, kiuj estis ekskluditaj fare de la regantaj klasoj de la akiro de pli altnivela klerigo“. Pri la lingvo Esperanto oni skribis, ke ĝia konstruado „baziĝas sur nesciencaj, mekanismaj imagoj pri la eco de la lingvo.“ Kaj: „Malantaŭ la fakto, ke la elementoj, el kiuj Esperanto estis kreita, estis prenitaj el la angla kaj la romanaj lingvoj, kaŝiĝas finfine la krima imperiisma teorio de la supereco de la „okcidenteŭropa kulturo“.“ La ekspertizo konkludis, ke „la organizo de la Esperanto-movado grandparte faciligis la malrespekton kaj putradon de la naciaj lingvoj kaj la propagandon de la kosmopolitismo.“ Krome oni asertis, ke Esperanto estas „komplete neevoluiĝebla“ kaj „havas absolute nenian klerigan valoron“, pro kio interpopola kompreniĝo ne estas imagebla per ĝi. „Esperanto estas hodiaŭ multe pli unu el la rimedoj por pli facile devigi la popolojn sub la jugon de la usona imperiismo, detruu ilian nacian memkonscion kaj malfortigi ilian pretecon defendi la nacian sendependecon.“ En la sama skribaĵo oni detale citis el la fama broŝuro de Stalin pri la „marksismo kaj la demandoj de la lingvoscienco“, kiu aperis en germana traduko en 1951 en orientberlina eldonejo. Oni klarigis, ke ankaŭ Stalin havis la vizon de mondlingvo, sed laŭ li ĝia perspektivo aktualos nur „post la venko de la socialismo en monda skalo“ kaj elkristaliĝos nur post la ekzisto de t.n. „zonaj lingvoj“. Tiam okazos kunfandiĝo de la „plej bonaj elementoj de la naciaj kaj zonaj lingvoj“ al unueca mondlingvo. Ŝajnas, ke la adeptoj de tiu teorio timis, ke artefarita lingvo kiel Esperanto pli utilis al la kapitalismo kaj imperiismo ol al la socialismo, pro kio ili rifuzis ĝin. La Pedagogia Instituto do konsideris la praktikadon de artefaritaj lingvoj kiel Esperanto kiel restaĵon el la epoko de la imperiisma regado, pro kio oni kredis, ke tiu fenomeno devas esti venkita.¹⁴

Post la morto de Stalin la kondiĉoj por la socialisma socio kaj la situacio de la Esperanto-movado pliboniĝis, ĉar la ideologi-politika premo pro la akra „personkulto“ reduktiĝis kaj malfortiĝis, sed ne ĉie. Kvankam ankaŭ Ulbricht formale distanciĝis de Stalin

¹⁴ Ne estas konate, ĉu tiu instituto aŭ aliaj SED-instancoj sciis, ke en la 30aj jaroj en Sovetunio ankaŭ diversaj Esperanto-aktivuloj estis koncernataj de la persekutoj kaj reprezalioj kadre de la „granda stalinisma teroro“, ĉar ili estis klasifikitaj kaj punitaj kiel eksterlandaj agentoj, kontraŭ-komunismaj agantoj, trockiismaj teroristoj ktp. Unuaj studoj pri ĉi tiu temo, kiu estis strikte tabuita en GDR, estis publikigitaj en la 60aj jaroj en la gazetaro de la okcidentgermana Esperanto-movado.

por konformi al la nova politika kurso de Ĥruŝčov, en GDR la „malstalinigo“, kiel ĝi estis praktikata en Sovetunio, dume ŝajnis resti sen efiko. Male la politika kaj ekonomia premo estis konservata, eĉ altigita. Meze de junio 1953 en GDR eksplodis laborista amasribelo, kiu komenciĝis en orienta Berlino kaj disvastiĝis tra la tuta lando, sed ĝi estis senprokraste disbatita kaj senkompate sufokita de sovetiaj tankoj. Ĉi tiu neatendebla ribelo, kiu esprimis la unuan pli koheran kaj kolektivan popolan proteston kontraŭ la malfacile elteneblaj vivkaj laborkondiĉoj en la orienta bloko, profunde ŝokis la SED-potenculojn, kiuj restis timigitaj dum sia tuta regadotempo (despli ke similaj ribeloj poste ripetiĝis ankaŭ en Hungario en 1956 kaj Ĉeĥoslovakio en 1968). Tiu ribelo signifis ankaŭ danĝeran momenton por la pluekzisto de la SED-reĝimo mem, kiu riskis esti forbalaita kaj devis esti savita de la sovetia armeo. Do la malŝatataj SED-regantoj ricevis sian lecionon flanke de la laborista klaso, kiu admonis ilin ne troigi, kaj la komunistoj devis eviti, ke simila peripetio ne ripetiĝu en GDR, kiu povis havi fatalajn sekvojn por la tuta sovetia bloko.

Meze de la 1950aj jaroj pliaj esperantistaj protestoj atingis la CKn de SED, kiu estis devigita konsideri ilin serioza problemo aŭ konflikto. En sia kunsido de la 9a de novembro 1955 la Sekretariejo de la CK de SED okupiĝis sub la persona gvido de partiestro Walter Ulbricht pri la temo de la „permeso de Esperanto en GDR“. Por forpreni la premon ĉe la Esperanto-fronto, kiu aperis kiel neatendeble ĝena afero, estis decidite, ke: „la Sekretariejo konsentas, ke tiuj, kiuj estas konsidereblaj, povas lerni Esperanton en GDR kaj korespondi kun aliaj Esperanto-adeptoj pri la pacmovado. En taŭga maniero necesas atentigi, ke la imagoj de la esperantistoj pri mondlingvo estas sensencaĵo. La tuta afero estu efektivigita en la kadro de la pacmovado.“

Post ricevo de pliaj demandoj, kiuj atingis la partion, la temo Esperanto troviĝis denove sur la tagordo de la CK-kunsido de la 20a de junio 1956. Ĉi-foje, sub la gvido de Karl Schirdewan, membro de la politburoo de SED, la Sekretariejo de la CK ripetis en principo kaj laŭvorte la antaŭan decidon, se oni skribis, ke „homoj interesataj studi kaj uzi Esperanton povas lerni Esperanton en GDR kaj korespondi kun Esperanto-adeptoj en eksterlando lige kun la pacmovado. En taŭga maniero necesas atentigi, ke la imagoj de la esperantistoj pri mondlingvo ne estas ĝusta. Materia subteno de Esperanto ne estas rekomendata.“ Oni povas konsideri ĉi tiun decidon kiel cedon de la partio al la esperantistoj, kiuj devis ricevi la konfirmon, ke Esperanto ne estas oficiale malpermesata kiel lingvo, kvankam la partio neniel apogis ĝin.

En julio 1956 la ministro pri internaj aferoj de GDR ricevis leteron de la sekretariejo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), la (neneŭtrala) orientbloke orientata komunisma organizaĵo de la Esperanto-movado. Li estis petita subteni la formadon de nacia grupo de MEM kaj permesi la eldonon kaj distribuon de la monata revuo *Paco*. MEM, kiu estis fondita en 1953 en St. Pölten, Aŭstrio, referencis al la rezolucio de la 8a Ĝenerala Asembleo de UNESKO en novembro 1954 en Montevideo, en kiu estis emfazitaj la „rezultoj atingitaj per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo“ kaj en kiu la Ĝenerala Direktoro komisiis „sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo“¹⁵. En la koncerna letero de MEM estis notita la senhonta kritiko, ke „nur la respondecaj personoj en GDR ankoraŭ kontraŭstaras ĉi tiun nehaltigeblan evoluon ...“

La alparolita ministro pri internaj aferoj unue turnis sin al la ministro pri popola klerigo, Paul Wandel, por ricevi helpon. Li diris, ke malgraŭ la malpermeso de la „grupa formado“, esperantistoj renkontiĝis kaj daŭre rilatis kun eksterlando. Li demandis, ĉu la malpermeso pri la formado de grupoj ankoraŭ validas, ĉar la decido de la 20a de junio 1956 ne estis klara al li. Li opiniis, ke malseverigo de la regularo havus gravajn sekvojn,

¹⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/UNESKO-Rezolucio_IV.1.4.422_de_Montevideo_pri_Esperanto_1954.

kaj sugestis „ekzameni la eblon de organizado de la Esperanto-movado, ĝian juran statuson kaj la amplekson de ĝia aktiveco fare de la ministerio por popola klerigo“. Ĉi tiu ministro antaŭe demandis kamaradon Herzog en la CK de SED, kiel oni traktu la Esperanto-problemon post la morto de Stalin. Herzog respondis, ke „laŭ mia scio la sufiĉe akra malakcepto de ĉi tiu artefarita lingvo baziĝas parte sur la verkaĵoj de Stalin pri lingvistiko. Ĉar, laŭ la rezultoj de la aktualaj esploroj, oni havas iom alian sintenon ankaŭ pri tiu verkaĵo, mi pensas, ke estas eble, ke la siatempe alprenita vidpunkto devos esti reviziita.“ Sed la revizio de la ĉi-koncerna starpunkto dume ne estis antaŭvidita de la tagordo, tiel ke la zorgoj de la ministro pri internaj aferoj estis kvietigitaj. En la respondo de la ministerio por popola klerigo datita la 18an de oktobro 1956 la daŭra valideco de la dekreto de la 12a de januaro 1949 estis konfirmita. Ĉi-okaze oni ripetis la admonon, ke estus pli grave lerni la rusan, anglan kaj francan lingvojn. La propagandado de Esperanto nur deflankigus la homojn kaj vekus iluzion pri mondlingvo. Cetero respondo de la ministro pri internaj aferoj al MEM ne estas dokumentebla.

Alian peton de esperantisto el Karl-Marx-Stadt (kiel Hémnico nomiĝis en GDR), kiu koncernis la demandon pri okazigo de Esperanto-kursoj en popolaj altlernejoj, sinjorino d-ro Torhorst rifuzis en septembro 1956. Ŝi ripetis la stereotipan instruon, ke estas pli grave lerni fremdlingvojn kiel la rusan, anglan kaj francan, ĉar tiuj lingvoj pli taŭgas por la kreskantaj internaciaj ekonomiaj kaj kulturaj rilatoj. Laŭ ŝia opinio aŭ laŭ la opinio de ŝia instanco Esperanto ne venkis sur tiu ĉi kampo.

Kelkaj esperantistoj turnis sin rekte al la ĉefministro de GDR, Otto Grotewohl, al prezidento Wilhelm Pieck, al la Centra Komitato de SED aŭ al iuj membroj de la Popolĉambro (parlamento) de GDR, kiujn ili atentigis, ke la Esperanto-reguligo, kiu koncernis ankaŭ la ricevon de eksterlandaj Esperanto-gazetoj, estas kontraŭ-konstitucia.

Kiam la eldonisto *Hellmut Täubner* el Glauchau en junio 1956 provis konvinki la registaron de GDR pri la utileco de Esperanto, atentigante ĝin pri la fakto, ke „Esperanto, la internacia lingvo de la interpopola kompreniĝo, estas la sola efika rimedo“ por „alproksimigi la pacamajn popolojn kaj homojn de ĉiuj mondopartoj“, li ricevis de la respondeca instanco, al kiu li turnis sin, la respondon, ke „por ni ne ekzistas la bezono konsenti pri la eldono de lernolibroj“ en Esperanto. Kaj kiam en januaro 1959 li sendis novan peton por ricevi la permeson eldoni siajn planitajn presaĵojn al la ministerio por kulturo, ĉefa administracio por eldona agado, li pravigis sian peton kun la rimarkigo, ke „por ni esperantistoj estas nekompreneble, ke ĝuste ŝtato de la popoldemokratia tendaro ne volas montri sencon por la popolliganta lingvo Esperanto“, despli, ke „la plimulto de la aliaj popoldemokratioj rekonis kaj apogas Esperanton kiel valoregan rimedon por la interpopola kompreniĝo, nur GDR ... faras escepton“. Efektive en aliaj komunisme regataj ŝtatoj de la orienta bloko kiel Pollando, Hungario kaj Bulgario ekde iom da tempo aperis Esperanto-gazetoj, -lernolibroj, -varbiloj ktp. Sed la respondeca sekciestro en la ministerio por kulturo ne konvinkiĝis pri la argumentaro de s-ro Täubner kaj klarigis al li, ke la situacio en aliaj socialismaj landoj ne estas komparebla kun GDR, kie validas aliaj vidpunktoj kaj leĝoj. Similajn respondojn ricevis aliaj esperantistoj. Eĉ la argumento, ke UNESKO favoras Esperanton, aŭ la atentigo de iuj sovetiaj esperantistoj, ke en Sovetunio la Esperanto-movado denove prosperas, ne povis helpi. Male, ekzemple la Centra Konsilio de „Libera Germana Junularo“ (FDJ) reagis kun alergia kaj suspekto kaj komencis esplori pri la esperantistoj, kiuj sendis tiajn leterojn, notante en sekreta interna informo, ke la esperantistoj „provas devigi FDJ-n per ruzaj rimedoj disvastigi tiun lingvon en la asocio“ kaj ke „oni povas supozi, ke ĉe la esperantistoj en GDR temas pri firma kontraŭleĝa organizaĵo“.

Gerhard Schiffner el Barnstädt, subdistrikto Querfurt, kiu turnis sin al la Ŝtata Radiokomitato kaj lige kun la „dubindaj sukcesoj“ de la ruslingva instruado proponis

enkonduki la pli facile lerneblan Esperanton kiel devigan fakon en la popollernejojn, ricevis de la sama s-ino d-ro Torhorst de la „Sekcio pri Tutgermanaj kaj internaciaj rilatoj“ rememorigon pri tio, ke en „la lernejoj de ĉiuj socialismaj landoj ... prioritatas la lernado de la rusa lingvo.“ Kaj ŝi aldonis la rimarkigon, ke ne estus necese aparte pravigi tion inter komunistoj. En la kazo de iu laboristino, kiu volis lerni Esperanton kaj kontaktis la Berlinan Radiostacion por ekscii, kial tiu lingvo ne plu estas praktikata, la kunlaboranto de la sama „Sekcio pri Tutgermanaj kaj internaciaj rilatoj“ en la ministerio por popola klerigo ree emfazis la signifon de la naciaj lingvoj kaj de la lernado de la rusa, angla kaj franca lingvoj kiel grava tasko. Laŭ la opinio de lia instanco, la oficiala agnosko de Esperanto nur deflankigus la homojn de tiu tasko.

Post kiam estis konfese, ke la Popolĉambro ricevis aron da leteroj koncerne Esperanton, ekzistis spuro de espero, kiam la ministerio por popola klerigo en 1956 aludis, ke „eble troveblus vojo, kiu ofertas al la esperantistoj okupiĝi kadre de niaj amasorganizaĵoj“, kvankam „ni ne opinias, ke tio estas necesa en la ŝtata intereso“. La vakua situacio estis pravigita per la manko de asocia leĝo.

Fariĝis tute evidente, ke la komunisma GDR-diktaturo ne deziris subteni tiajn movadojn kiel Esperanton aŭ Idon, ĉar oni konsideris ilin nemarksisma aĉaĵo, kies amasa disvastiĝo devis esti evitata. Teorie oni timis la influon de „burĝaj“ fortoj, kiuj laŭdire karakterizas la Esperanto-mova-don. En la konkreta praktiko oni celis bloki la internaciajn kontaktojn de la GDR-aj esperantistoj kun la „klasa malamiko“, unu el la ĉefaj paranojaj imagoj de la GDR-regantoj. Tio faris la Esperanto-movadon malcerta faktoro por ili, kiun oni preferis elŝalti. La argumen-toj de la politikaj aŭtoritatoj fariĝis pli kaj pli ruzaj kaj absurdaj por pravigi la nezirindecon de Esperanto kaj forpelis la plezuron de la esperantistoj okupiĝi pri la plej ŝatata objekto kaj limigis iliajn dezirojn oficialigi ĝin en GDR.

Pli malpli frue la kazo de Esperanto atingis ankaŭ la skribotablon de la ministro pri ŝtata sekureco, Erich Mielke. Ĉi-rilate aŭtoro Wischendorf faris kvazaŭ sensacian arkivan malkovron. Li trovis skribaĵon de ministro Mielke al la adreso de la bulgara ŝtata sekureco, en kiu kamarado Kumbiliev en Sofio estis petita mesaĝi al la kolego en orienta Berlino sian opinion pri la spertoj faritaj kun la Esperanto-movado en Bulgario laŭ jenaj konsideroj:

1. Organiza konstruo de la Esperanto-movado en via lando
2. Kiu lernmaterialo estas je la dispono ?
3. Kiuj indikoj ekzistas pri la utiligo de la Esperanto-movado por malamika agado kaj kiuj sekurecaj rimedoj estis aplikitaj en ĉi tiu rilato ?

La koncerna respondo datas de la 1a de julio 1958, estis verkita en la rusa lingvo kaj informis pri la strukturo de la bulgara Esperanto-asocio. La indiko, ke en Bulgario estis eldonitaj pli ol cent mil lernolibroj de Esperanto, devis sulkigi la frunton de Mielke, ĉar tiu cifero konsiderinde superis la nombron de la oficiale deklaritaj 1800 regulaj bulgaraj asociaj Esperanto-membroj.

Krom tio la bulgaraj kolegoj informis ankaŭ pri tio, ke „malamikaj Esperanto-organizaĵoj en kapitalismaj landoj“ same kiel „unuopaj esperantistoj“ eluzas siajn kontaktojn por „kontrabandi“ skriban materialon kun „malamika enhavo en nian landon“. Oni notis, ke la ligoj estas efektividigitaj pere de „anarkiistoj el okcidentaj landoj“ kaj tra „iamaj bulgaraj anarkiistoj“. Sed ankaŭ en la propraj vicoj ekzistis perfiduloj. La prezidanto de la asocio, Georgi Nikolov, membro de la Bulgara Komunisma Partio, estis kaptita pro spionado. Ĉi tiu ege interesa informo verŝajne lasis forte bati la koron de Mielke, tiu en Sovetunio

edukita „ĉekisto“¹⁶, kiu vidis kaj flaris ĉie kaj ĉiam nur malamikajn elementojn, eksterlandajn spionojn kaj agentojn, politikajn-ideologiajn sabotistojn, kontraŭulojn de la socialismo kaj kontraŭ-revolucian agadon kaj perfidon, same kiel Stalin, Jagoda, Jeĵov kaj Berija en la 30-50aj jaroj.

De la „nuligo“ de la ‘malpermeso’ al la instalado de oficiala organizaĵo (1961-1965)

La 13an de aŭgusto 1961 estis konstruita la „Berlina Muro“, kio dume helpis eviti la kolapson de la komunistisma GDR-diktaturo. Depost 1961 la sovetian zonon forlasis 3,5 milionoj da homoj, kio signifis grandegan perdon por la lando, kiu dependis de kvalifikitaj laborfortoj, kiuj povis esti konservitaj per la hermetika fermo de la limo al okcidenta Berlino.

Kelkajn tagojn poste la partio surprize komunikis, ke per decido de la 17a de aŭgusto 1961 la punktoj 7 kaj 8 de la „Reguligo pri la transigo de popolartaj grupoj kaj popoledukaj asocioj al la ekzistantaj demokratiaj amasorganizaĵoj“ de la 12a de januaro 1949, publikigita la 10an de februaro 1949, estis *mal-* aŭ *eksvalidigita*, *sed ne nuligita*.

Sed la esperantistoj ne povis rimarki ian transigon de popolartaj grupoj kaj popoledukaj asocioj al la amasorganizaĵoj, kiu devis inkluzivi ankaŭ la grupojn de artefaritaj lingvoj, kiuj estis koncernitaj de la koncerna reguligo. La nova leĝa situacio kaŭzis novajn malfacilaĵojn kaj konfuzon inter la esperantistoj, kiuj tamen interpretis la komunikon tiel, ke ili kredis, ke la malpermeso de artefaritaj lingvoj kaj per tio de Esperanto estis nuligita, kio tamen ne estis la kazo, kiel oni ankoraŭ klare konstato. Ili petis konfirmojn ĉe la partiaj instancoj, ekzemple ĉe la Libera Germana Sindikata Unio (FDGB), sed tiu adreso evidentiĝis malbona. FDGB evidente malaprezis Esperanton kaj restis fidela al la malnovaj ideologiaj dogmoj, kiujn oni vaste renkontis ĉe oficialaj instancoj de GDR. Iu esperantisto el Karl-Marx-Urbo eĉ sugestis al FDGB fariĝi tegmenta organizaĵo de la Esperanto-movado en GDR. Sed la respondo estis negativa. Flanke de la sindikata unio oni klarigis, ke la praktikado de la artefarita lingvo Esperanto ne harmonias kun la principoj de la marksismo-leninismo, al kiu ĝi ne servas, sed, male, kontraŭas „ĉiun dialektikan kaj historian evoluon“. Oni aldonis la instruon, ke ne per la lingvo, sed per la agado oni realigas la komunan celon de la laborista klaso. Pro tiuj kialoj la artefarita lingvo Esperanto ne povas esti subtenata de FDGB. De ĉi tiu flanko estis ankaŭ emfazite, ke la bazo por la kompreniĝo inter la landoj estas la naciaj lingvoj.

Baldaŭ evidentiĝis, ke la eksvalidigo de la koncerna reguligo de 1949 ne signifis ĝian definitivan nuligon aŭ abolon. Per la koncerna komunikado la partio celis unuavice mesaĝi, ke la procezo de la „transigo de popolartaj grupoj kaj popoledukaj asocioj al la amasorganizaĵoj“ estis finita kaj plenumita. Krome la mesaĝo verŝajne celis vekti en eksterlando la impreson, ke Esperanto ne plu estas jure malhelpata aŭ eĉ malpermesata en GDR kaj ke esperantistojn oni ne plu subpremas laŭ la leĝo. La GDR-instancoj probable konkludis, ke en GDR la intereso kaj agado pri Esperanto elĉerpiĝis, ke aktivaj esperantistoj apenaŭ plu ekzistas kaj ke tiuj homoj, kiuj iam okupiĝis pri Esperanto, rezignis pri ĝi. Do oni supozis, ke la problemoj malaperis kaj estas solvitaj.

Ke la malvalidigo de la dekreto ne signifis aŭtomate nuligon de la „Esperanto-malpermeso“, pruvis la peto pri fondo de Zamenhof-societo en la dresdena distrikto, kiu estis rifuzita. Eĉ la atentigo pri artikolo 12 de la GDR-konstitucio flanke de la petinto ne

¹⁶ Ano de <https://eo.wikipedia.org/wiki/Ĉeka>.

povis helpi.¹⁷ Inter GDR-aj esperantistoj do neeviteble aperis la impresoj, ke oni estis trompita per ŝtata burokratia manipulo.

„Por eviti miskomprenojn“ pri la aktuale valida leĝa situacio, la ministro pri kulturo eĥis, ke „la efektivigaj dispozicioj de la 12a de januaro 1949 koncerne ciferojn 7 kaj 8 estis deklaritaj kiel sensignifaj pro tio, ĉar la instrukcio esprimita en tiuj ciferoj estis efektivigita de jaroj, do plenumita kaj fariĝis sensignifa“. Samtempe li emfazis, ke la decido de la 17a de aŭgusto 1961 „neniel“ signifas „novan permeson de tiaj grupoj, instalaĵoj ktp.“ Tiu perpleksiga klarigo ŝajnis doni pli da klareco, laŭ GDR-maniero.

Dume la CK de SED, oficejo de Albert Norden, mesaĝis, ke „ankaŭ estonte la partio kaj ŝtato ne estas interesataj permesi Esperanto-organizaĵojn“. Tiun sintenon oni pravigis per la atentigo, ke „inter la esperantistoj estas civitanoj, kiuj estas ŝarĝitaj en forta grado de malnovaj eksaj viv- kaj penskutimoj kaj havas multnombrajn rilatojn kun la okcidenta eksterlando“. Krome oni promesis, ke „la esperantistoj ne plu povos agadi en la formo, kiu estis ĝis nun permesata al ili“. En akta noto de ĉefleŭtenanto Sgraja de la Popola Polico en la ministerio por internaj aferoj, sekcio E (permesoj), de la 30a de marto 1963, oni kritikis, ke „la kamaradoj¹⁸ inter la esperantistoj metas la praktikadon de Esperanto super ĉio cetera kaj ne elpaŝas kiel partiaj membroj kiel tio estus necesa“. Kiel aparta ekzemplo estis menciita kamarado **Ludwig Schödl**, instruisto en Neuruppin, kiu estis klasifikita de la ŝtataj instancoj kiel „fanatika esperantisto“, kiu „ekstreme senteme“ reagis, kiam temas pri la problemoj de la permeso de Esperanto-organizaĵoj“. Oni notis pri li, ke li ne hezitas „ofendi“ kamaradojn de la CK, kiam temas pri tiaj aferoj. Krome Sgraja akuzis „tiujn kamaradojn“, ke „ili prezentas kun siaj fanatikaj strebadoj tre malklarajn imagojn pri la fundamentoj de la politiko de nia partio“. En aliaj okazoj oni protokolis la nekonformisman konduton de Schödl, laŭ kio „okazis eksplodoj flanke de kamarado Schödl, kiu kalumniis ĉiujn funkciulojn de la partio kaj esprimis la fakton, ke restaĵoj de la stalinismo en GDR malhelpas la permeson de Esperanto-organizaĵoj“. Fine de marto 1965 Schödl estis denunciita de sia esperantista kolego, la lojala partiano *Rudi Graetz*, ĉe la Germana Kulturligo en tio, ke li sentis la bezonon informi ĝin pri nedezirataj aktivecoj de certaj esperantistoj kiel Ludwig Schödl, kiu „... kalumniis la Germanan Kulturligon kaj kamaradon Menger ĉe hungara kamaradino“. „Io tia ne devas okazi“, Graetz admonis. Kiel kritikema, memstare pensanta kaj aganta GDR-civitano kaj esperantisto Schödl estis suspektata de la SED-funkciuloj kiel speco de ribelulo, kiun necesis bridi, teni sub kontrolo kaj observi sur la radaro.¹⁹

¹⁷ En artikolo 29 de la reformita GDR-konstitucio de 1968 pri la rajtoj de la asocio de la GDR-civitanoj (vd. <http://www.verfassungen.de/ddr/verf68-i.htm>) la permeso formi asociojn estis ligita al la kondiĉo, ke iliaj interesoj devas „kongrui kun la principoj kaj celoj de la konstitucio“, t.e. la politiko de SED. Surbaze de tiuj kriterioj eblis fondi tiajn oficialajn asociojn, sed aliflanke estis samtempe multe pli facile malhelpi la kreadon de sendependaj organizaĵoj flanke de la partio kaj ŝtato. Cetere en la sekva artikolo 30 estis notite, ke „la personeco kaj libereco de ĉiu civitano de Germana Demokratia Respubliko estas netuŝeblaj“. En la sama artikolo estis menciite, ke 2) „limigoj estas permesataj nur lige kun krimaj agoj ... La rajtoj de tiaj civitanoj povas esti limigitaj nur en la mezuro, ke tio estas laŭleĝe permesebla kaj neevitebla.“ „(3) Por protekti sian liberecon kaj la netuŝeblecon de sia personeco, ĉiu civitano havas la rajton je la helpo de ŝtataj kaj sociaj organoj“ (kio estis neta mensogo, ĉar sendependaj tiaj organoj ne ekzistis). Art. 31 fiksas, ke „la poŝta kaj telekomunika sekreto estas netuŝebla“, sed „(2) Ĝi povas esti limigita nur laŭleĝe, se la sekureco de la socialisma ŝtato aŭ krima procesado postulas tion“.

¹⁸ Germanlingve Genosse, komunisto, partia membro.

¹⁹ Ludwig Schödl (1909-97) estis germana esperantisto el la laborista klaso, kiu aktivis por la Germana Laborista Esperanto-Asocio (vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/GLEA>). Kiam en 1933 la GLEA-oficejo estis fermata de la nazia polico, li daŭrigis sian aktivecon kontraŭleĝe. Pro la danĝero esti malkovrita, en somero 1933 Schödl devis elmigri kaj iris al Francio, kie li estis arestita kaj transdonita al Svislando. Tra Vieno li revenis al Berlino kaj denove estis sendita al Francio por partopreni la kongreson de la Internacio de proleta esperantistaro (IPE, vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacio_de_Proleta_Esperantistaro) en 1934 en Lilo.

La decido de la 17a de aŭgusto 1961, kiu malvalidigis la ciferojn 7 kaj 8 de la „transiga“ dekreto pri grupoj de artefaritaj lingvoj kaj Ido- kaj Esperanto-lingvaj anguloj” de 1949, tamen kaŭzis en GDR pli altgradan dinamikon en Esperanto-medioj, kiu probable devigis la partion al certaj cedoĵoj rilate al la Esperanto-movado. En aliaj socialismaj landoj, kie Esperanto jam estis oficiale permesata, vaste praktikata kaj ŝtate eĉ subtenata, la aŭtoritatoj volis scii pli multe pri la stato de la Esperanto-movado en GDR. Tiel en 1963 la ambasado de Ĉeĥoslovakio sendis al la ministerio por eksteraj aferoj de GDR enketilon por ricevi informojn pri konkretaj temoj de la traktado de la Esperanto-movado. Sed ankaŭ Pola Esperanto-Asocio (PEA) kontaktis la Germanan Packonsilion (GDR) por demandi, ĉu en GDR ekzistas iu instanco, kun kiu oni povus oficiale rilati. Aliflanke ankaŭ la Germana Packonsilio petis la polajn kolegojn havigi informojn pri la statuso de Esperanto en Pollando. La nombro de esperantistoj en Pollando estis taksita je dek mil. Samtempe la Germana Packonsilio petis ankaŭ la Hungaran Nacian Packonsilion en Budapeŝto disponigi informojn pri la situacio de la Esperanto-movado en Hungario. La hungaroj respondis, ke en ilia lando aktivas „memstara Esperanto-organizaĵo“, kiu funkcias sub la kontrolo de la Landa Konsilio de la sindikatoj kaj ricevas de ĝi „ŝtatan materian subtenon“.

En Bulgario la Nacia Komitato por la protektado de la paco en Sofio estis petita klarigi la aktivecon de la esperantistoj en tiu „frata“ lando. La bulgara respondo, kiu konsistis el sufiĉe ampleksa raporto, parolis pri 6000 membroj de Bulgara Esperanto-Asocio (BEA), kiu estas gvidata de 61-membra centra komitato. Estis menciite, ke la ŝtato disponigas jaran krediton por la bezonoj de la asocio kaj ke lingvokursoj okazas en diversaj mezaj, alt- kaj faklernejoj, ĉe la sindikatoj kaj Komsomolo, kaj ke Esperanto estas utiligata por propagandaj celoj en la gazetaro kaj radio. La raporto postlasis la impreson, ke la bulgara Esperanto-movado reprezentas malgrandan imperieton sub la kontrolo de la komunisma partio kaj estas oficiala parto de la internacia Esperanto-movado. En somero 1963 en Bulgario eĉ okazis du grandaj internaciaj Esperanto-kongresoj (en Sofio kaj Veliko Târnovo), kiuj vekis vastan atenton kaj en kiuj unuafoje partoprenis miloj da esperantistoj el la ŝtatoj de la orienta bloko. Laŭ indikoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) ĉeestis ankaŭ 62 personoj el GDR – kvankam la Germana Packonsilio sendis nur po du oficialajn GDR-delegitojn (inter ili Detlev Blanke – pri kiu ankoraŭ temos pli sube). La Packonsilio sciigis, ke ĝi ne estas interesita, ke pliaj personoj el GDR partoprenu tiujn kongresojn. La ‘sovaĝaj’ vojaĝoj de GDR-civitanoj al Bulgario kaŭzis ĉe la respondecaj GDR-instancoj panikon kaj ĉagrenon. Kvankam la ministerio por internaj aferoj reagis per rapida rekontrolado de tiuj civitanoj, kiuj petis – kaj ricevis – vizon por veturi al Bulgario, oni ne povis trovi ĉiujn homojn. Al kelkaj vizpetintoj, kiujn oni konsideris politike nefidindaj aŭ al kiuj oni riproĉis, ke ili donis malĝustajn indikojn, oni rifuzis la permeson veturi al Bulgario. Orienta Berlino ankaŭ timis, ke en la kongresoj en Bulgario esperantistoj el GDR kaj FRG povus aperi kiel komuna germana delegacio.²⁰ Kiel grupestro de la oficiala GDR-delegi-

La militan tempon li pasigis en kel-kaj internigaj koncentrejoj en suda Francio. En 1941 li forlasis la okupacian zonan de Francio por kontakti la francan rezistan movadon, sed li estis arestita en trajno kaj transigita al la polica malliberejo de Gestapo ĉe la Aleksandra Placo en Berlino, poste sendita al la esplorprizono ĉe Lehrter-strato, kie okazis proceso kontraŭ li. Post la liberigo en 1941 li estis ree arestita en Vieno en 1944. Lia berlina loĝejo ĉe Markgrafendamm 30 dume estis trafita de bomboj en februaro 1945, tiel ke li provizore loĝis ĉe la gepatroj en Berlin-Wittenau. Post la milito li ludis gravan rolon en la Esperanto-komunumo de la sovetia zono kaj en GDR por revivigi Esperanton. Li eldonis la unuan Esperanto-lernolibron en GDR kaj iĝis suspektata, observata kaj ĉikanata de la novaj komunismaj partiaj mastroj, kiuj konsideris lin tro memstara, nekonformisma kaj nekontrolebla, kvankam li estis SED-membro kaj oficiale agnoskita viktimo de la nazismo (pli detale vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Schödl).

²⁰ Efektive en la UEA-Kongreslibro de la UK Sofio 1963 la aliĝintoj el ambaŭ germanaj ŝtatoj, do FRG kaj GDR, estis indikitaj en unusola listo sub la nomo „Germanujo“. Tiam ankoraŭ validis la t.n. „Hallstein-doktrino“ (1955-69), laŭ kiu FRG havis la solan rajton reprezenti la germanan popolon. La malavantaĝo de tia listo estis, ke oni ne (aŭ pli malfacile) povis distingi la orient- de okcidentgermanoj; aliflanke oni iusence

taro en Sofio estis taskita la 60-jara **Erich Rödel** el Lepsiko, kiu devis formi „partian grupon“, kaj nur li rajtis oficiale paroli nome de sia lando dum la kongreso.

La turniĝo: Starigo de oficiala Esperanto-instanco ĉe la Kulturligo en 1964/65

El la vidpunkto de la teknika sekureco la sofia Universala Kongreso, kien finfine veturis eble centoj da GDR-anoj, kiuj ne estis oficiale delegitaj, estis konsiderita kiel plena fiasko por la justicaj kaj policaj organoj de la komunisma GDR-diktaturo. Komence de septembro okazis kunveno, dum kiu oni bilancis kaj finanalizis la kongresojn en Bulgario. Ĝin partoprenis du reprezentantoj de la Germana Packonsilio, la esperantistoj Ludwig Schödl kaj Hans Eichhorn (GDR-studento en Sofio) plus ĉefleŭtenanto Rudolf de la ministerio por internaj aferoj. Por solvi la problemon de la Esperanto-movado de GDR oni venis al la konkludo, ke „nepre necesas la allaso de Esperanto-organizaĵo en GDR“. Antaŭ la fondo de tia organizaĵo la CK de SED deziris ricevi konkretajn informojn pri la esperantistaro en GDR por akiri superrigardon pri tiu komunumo aŭ movado. La liverita raporto menciis la nombron de 1200 personoj, de kiuj ĉ. 300 estis deklaritaj kiel aktivaj. Estis kolektitaj informoj pri unuopaj „problemaj“ figuroj, kiuj legeblas kvazaŭ oni serĉus krimulojn. Oni trovis kelkdek tiajn esperantistojn en kvar distriktoj. Oni interesiĝis precipe pri iliaj politika sinteno, kunvenoj kaj rilatoj kun eksterlando kaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj kiel UEA,²¹ TEJO, MEM kaj SAT (kiu estis klasifikita kiel kontraŭ-komunisma²²).

Tiel nomataj kverelemuloj inter esperantistoj estis registritaj de la ŝtataj organoj, kaj pri la plej aktivaj kaj ĝenaj inter ili oni tenis dosierojn. En raporto de la 15a de oktobro 1964 la ministerio por internaj aferoj de GDR, ĉefdepartemento kriminala polico, liveris al la CK de SED la rezultojn de esploroj pri ĉirkaŭ 15 tiaj homoj. La raporto enhavis specifajn indikojn pri *Walter Ranft* (nask. 1892, Radebeul, ekskludita el SED), d-ro *Kurt Friedmann* (1893, Reichenberg), *Kurt Vogler* kaj *Curt Kessler* (Dresden-Klotzsche), *Felix Klötzer* (Wilthen), *Paul Glöckner* (Pirna-Copitz), *Franz Tischer* (1894, Magdeburg), *Hieronimus Stroinski* (1934, Borsdorf, „severa katoliko“), *Erich Rödel* (1903, Leipzig), *Erich Löwe* (1903, Leipzig), *Karl Maier* (1901, Berlino, SED-membreco forstrekita), *Carl Beck* (1897, Berlino), *Walter Gennert* (1904, Berlino) kaj *Ludwig Schödl* (1909, Neuruppin). Pri kelkaj el ili ni revenos pli sube.

Kiam Erich Rödel volis memstare organizi Esperanto-kunvenon okaze de la printempa fojro en Lepsiko, **Rudi Graetz** kaj la 63-jara **Eugen Menger**, kiuj jam kondukis kiel ĉefoj de la starigota centra Esperanto-organizaĵo kadre de la Kulturligo, ege nervoziĝis kaj volis malpermesi ĝin, kio ege ĉagrenigis la lokajn samideanojn.

protektis la GDR-civitanojn, kiuj „sovaĝe“, t.e. ne kiel oficialaj delegitoj de GDR, aliĝis al la UK. La akcepto de GDR kaj FRG en UN en septembro 1973 signifis samtem-pe la konfirmon de la internacia diplomatia agnosko de ambaŭ germanaj ŝtatoj. Sekve en la Kongreslibro de la UK Varna 1978 la aliĝintoj el FRG kaj GDR estis aparte listigitaj. Ĉu vere ĉiuj aliĝintoj el GDR povis efektive veturi/veturis al la kongreso aŭ reale partoprenis ĝin, estas alia demando.

²¹ En 1969 aŭ 1970 Blanke skribis en iu interna raporto pri UEA, ke ĉi tiu asocio ne vere estas politike neŭtrala, ĉar ĝin superas burĝaj fortoj kaj la socialismaj landoj havas nur malfortan ideologian influon en ĝi. Ĝia prezidanto, prof. d-ro Ivo Lapenna, kiu estis iama jugoslavia komunisto, kiu vivis en Okcidento, estis pri-taksita kiel kontraŭ-komunisto. En la 70aj jaroj la nombro de delegitoj el socialismaj landoj en la UEA-komitato iom kreskis, tiel ke iuj timis, ke la komunisme regataj landoj povus submigradi la organizaĵon.

²² Moskvo konsideris ĝin kontraŭ-sovetia, reviziisma kaj kosmopolitisma, ĉar ĝi reprezentis anarkiismajn dogmojn kaj teoriojn de Trockij kaj Kautsky. Blanke riproĉis al SAT, ke ĝi ignoras la „ŝtatpolitikan realecon en la mondo“.

En julio 1964 la „Germana Libro-Eksport- kaj -Import-Societo“ adresis plendon rekte al la ministro pri kulturo de GDR, ke „ni ricevis kelkajn tre agresemajn leterojn de esperantistoj en GDR, kiuj, konsciante pri la nuligo de la reguligo,²³ postulis, ke estu kreitaj kondiĉoj por importi eldonaĵojn en Esperanto el la socialismaj landoj“, kaj demandon, „ĉu ni povas importi esperantaj eldonaĵojn kun tuja efiko“. La organizaĵo, kiu okupiĝis pri eksporto kaj importado de eksterlandaj periodaĵoj, konstatis, ke „en la lastaj jaroj la esperantistoj trovis vojojn kaj kanalojn, per kiuj oni kontrabandis esperantajn presaĵojn el la socialismaj landoj. Kelkaj el ili supozeble sendos petleterojn al siaj esperantistaj geamikoj, kiuj poste sendos al ili la deziratajn Esperantajn presaĵojn donace ...“, „ekzemple la revuo *Bulgario*“, kiu estis strikte oficiala periodaĵo. La letero estis plusendita al la ministerio por internaj aferoj kun la peto de konsilo kaj, en kazo de malakcepto, de informo pri la kialoj de la rifuzo. En la ĉi-koncerna respondo, kiu alvenis en septembro, oni sciigis, ke aktuale estas ekzamenata la ebleco formi laborgrupon por esperantistoj kadre de la Kulturligo. Ĉar ankoraŭ nenio estis decidita, oni petis la Eksport-Import-Societon dume haltigi la importon de Esperanto-literaturo el eksterlando. La sama firmao reskribis fine de 1964 al la sama ministerio por internaj aferoj kaj ricevis la provizoran sciigon, ke la importado de Esperanto-presaĵoj ankoraŭ ne estas permesata kaj ke ĉi-rilate oni kontaktis la sekretariojn de la Germana Kulturligo. Sed la Kulturligo evidente ne estis tre interesata pri ĉi tiu afero, kiel montras la letero de sekciestro Kühne de decembro 1962 al la Germana Packonsilio koncerne la demandon de la formado de Esperanto-sekcio ĉe la Kulturligo, kiu tekstas jene: „La Ĉefa Sekretariejo de la Germana Kulturligo ankoraŭ rifuze rilatas al ĉi tiuj demandoj. ... Post la dissolvo de la Packonsilio,²⁴ ili [t.e. la esperantistoj] devintus labori en la Nacia Fronto, sed la Nacia Fronto tute ne respondis al tiaj proponoj.“ Eĉ pli klara estis jena akta noto de la ĉefsekcio K/Dept.: „La 24an de julio 1964 okazis dua diskuto ĉe la Germana Kulturligo kun kamaradoj Kühne kaj Laude pri Esperanto. Estis denove fiksita, ke la esperantistoj ne estos akceptitaj en la Germanan Kulturligon. ... **La decido pri neakcepto de la esperantistoj en la Kulturligon estos skribe sendita al la ministerio por internaj aferoj.**” **Do oni povas resumi kaj konkludi, ke neniu GDR-instanco deziris akcepti la esperantistojn en sian sinon.**

La politika kurso de la komunisma GDR-diktaturo rilate al Esperanto evidente tamen ŝanĝiĝis en aŭgusto 1964, post kiam la protokolo de la kunveno de la CK de SED de la 19a de ĉi tiu monato notis la decidon, ke „la Departemento pri Kulturo de la CK estis taskita submeti proponon, el kiuj vidpunktoj estu formita Esperanto-sekcio en la Kulturligo.“ La bonan novaĵon konfidence konfirmis la oficejo de la CK-ano Albert Norden al la atento de la „Packonsilio de GDR“ la 20an de aŭgusto 1964, laŭ kio „la Sekretariejo de la CK taskis la Kulturligon formi sekcion aŭ laborkomunumojn por esperantistoj. ...” Do la rezistema Kulturligo, kiu antaŭe sentis sin naŭzita respondi demandojn de esperantistoj, nun devis mem trakti la aferon – sendube kontraŭvole aŭ malvolonte. Sed iu devis akcepti

²³ T.e. la Esperanto-„malpermeso“ de 1949.

²⁴ La „Packonsilio de GDR“ (https://de.wikipedia.org/wiki/Friedensrat_der_DDR) estis socipolitika organizaĵo en GDR, kiu, laŭ siaj statutoj, „estas por mondpaco, malstre-ĉiĝo, paca kunezistado de ŝtatoj kun malsamaj sociaj sistemoj, por malarmado, libereco, nacia sendependeco kaj por la forigo de koloniismo kaj rasismo same kiel por kontraŭ-imperiisma solidareco“. Ĉirkaŭ 300 elektitaj individuaj membroj apartenis al tiu konsilio, plejparte funkciuloj de SED, de la t.n. blok-partioj kaj amasorganizaĵoj de la „Nacia Fronto“ same kiel homoj de la kultura kaj politika vivo kaj de la eklezioj. La Packonsilio de GDR ne estis parto de la sendependa pacmovado, sed ĝi estis organizaĵo kontrolata de SED, kiu ne pridubis la militpolitikon de Sovetunio, kaj membro de la „Monda Packonsilio“, kaj ĝi delegis reprezentantojn al la „Nacia Fronto“ de GDR ([https://de.wikipedia.org/wiki/Nationale_Front_\(DDR\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Nationale_Front_(DDR))). La ĉiam pli supera rolo de la „Nacia Fronto“ en la ĉiufanka disvastigo de la ŝtata pacpolitiko kaŭzis la reorganizado de la Packonsilio en 1962/63, kio kondukis al la dissolvo de ĉiuj subalternaj strukturoj kaj ilia kunfandiĝo kun la koncernaj lokaj komitatoj de la „Nacia Fronto“. Tiel la Packonsilio de GDR iĝis nura propaganda instrumento de SED por plibonigi la pozicion de GDR en la komparo de la sistemoj.

la partian taskon aŭ ordonon „kontroli la evoluon de la Esperanto-movado en GDR“. En la Kulturligo *Eugen Menger* de la personara fako devis okupiĝi pri la malagrabra afero.

La sufiĉe rapidan decidon de la partio starigi oficialan Esperanto-istancon verŝajne esence influis la klopodoj de kvar eminentaj Esperanto-aktivuloj kaj „delonge membroj de la partio kaj de la laborista movado“, kiuj evidente faris utilan kaj efikan preparlaboron pro la „sento de respondeco al la partio kaj la ŝtato“, turnante sin al la Politburoo por atingi decidan trarompon en la Esperanta demando. Tiuj kvar partianoj, cetere ĉiuj oficiale „rekonitaj viktimoj de la persekuto fare de la nazia reĝimo“ kaj iamaj gvidaj funkciuloj de GLEA, nomiĝis *Rudi Graetz*, *Erwin Schleusener*, *Willi Vildebrand* (ĉiuj el Berlino) kaj *Ludwig Schödl* (Neuruppin). En sia detala letero de la 16a de januaro 1965 al la Sekretariejo de la Politburoo de SED ili konsideris grave kaj proponis, ke „la partio prenu la evoluon de la Esperanto-movado sub sian kontrolon“, emfazante la utilon, kiun Esperanto povas doni por politika propagando. Ili klopodis neŭtraligi la lingv(istik)ajn rezerveojn pri Esperanto antaŭe esprimitajn flanke de la partio per la aserto, ke Esperanto faciligas la lernadon de fremdaj lingvoj, kio estas eksperimente pruvita. Ili certigis, ke „la organizo de la Esperanto-movado en GDR ne kontraŭas la leĝojn de la respubliko, nek la ĝeneralan politikan linion de la partio“. Koncerne la frazon pri la politika propagando ne estas konate, ĉu la aŭtoroj de la letero estis konsciaj, ke la „uzado de Esperanto por propagandi la celojn kaj sukcesojn de GDR en la konstruado de la socialismo kaj en la lukto por la paco“ povis signifi forlason de la fama politika neŭtraleco de Esperanto, pri kiu la movado tiel fieris.

La oficiala fonda kunveno de la “Centra Laborrondo de Esperanto-Amikoj en Germana Kulturligo” (CLE/ZAKE), kiel la nova oficiala Esperanto-instanco nomiĝis, okazis la 31an de marto 1965 en (orienta) Berlino en la Klubejo de la kulturagantoj “Johannes R. Becher” en konstruaĵo ĉe la adreso Otto-Nuschke-Strato 2/3, kiu apartenis al la Kulturligo de GDR.²⁵ Kiel estraranoj *Rudi Graetz* fariĝis ĝia prezidanto, liaj anstataŭantoj estis *Willy Vildebrand* kaj *Eugen Menger*, kiu ricevis la oficon de la sekretario kaj rolis kiel kontrolisto flanke de la Kulturligo, kie li estis dungita.

La biografioj de la gvidaj esperantistoj respondecaj pri la nova Esperanto-Laborrondo en la Kulturligo de GDR estis zorge kontrolitaj, ankaŭ tiu de Rudi Graetz.²⁶ En la kazo de Schödl estis ioma surprizo, ke li estis inkluzivita en la „Grupon Graetz“ malgraŭ

²⁵ Pri tiu klubejo, domo kaj adreso vd. sub [https://de.wikipedia.org/wiki/Club_von_Berlin_\(Gebäude\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Club_von_Berlin_(Gebäude)).

²⁶ Rudi Graetz, nask. 1907; kiel la oficialaj presaĵoj sciigas, li devenis el metiista familio el Rostock. Li lernis la profesion de financoficisto kaj ekde 1924 aktivis en la Social-Demokratia Partio de Germanio. En 1930 li aliĝis al la Komunisma Partio kaj ĝis 1933 funkciis en la prolet-liberpensula asocio. Pro kontraŭ-faŝisma agado kaj „preparo de ŝtatperfido“ en 1933/34 li estis enprizonigita dum 18 monatoj. Dum la dua mondmilito li servis kiel ĉefsoldato en la germana armeo kaj poste estis militkaptito en Sovetunio. Kiam SPD kaj KPD estis unuigitaj en orienta Germanio, li fariĝis membro de SED. Profesie li laboris kiel vicĉefo de la polico en la lando Meklenburgo de la Sovetia Okupacia Zono. Ekde 1950 li laboris en la Sovetunia-Germania akcia kompanio de Wismut, estis ĉefo de komercaj reprezentantoj de GDR en okcidenta Eŭro-po, foira direktoro kaj komerca konsilisto en la ministerio por ekstera komerco de GDR kaj gvidis GDR-foirojn en diversaj landoj, ĉefe orientaj. Li havis honoroficiajn funkciojn en la Packonsilio de GDR kaj en la centra estraro de la Kontraŭ-faŝisma Rezista Batalantaro; estis oficiale agnoskita en GDR kiel „viktimo de la naziismo“, estis distingita per diversaj GDR-aj medaloj. Lerninte Esperanton en 1919, en 1930-33 Graetz prezidis la Meklenburgan organizaĵon de Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA), partoprenis la fondon de la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE). Kiel aŭtoro Wischendorf trovis en la arkivaj aktoj, krom lia oficiala persona deklaro pri kunlaboro kun la Ŝtata Sekureco, en lia ĝenerale senmakula biografio ekzistis malgranda problemo: li havis nelegitiman filinon, kiu vivis en okcidenta Germanio kaj kun kiu li havis neniun rilaton, same kun ŝia patrino. Rudi Graetz forpasis en 1977. En la verkaĵo http://www.plansprachen.ch/Studie_DDR_der-esperantist.pdf Graetz estas menciita 65-foje lige kun iu funkcio, faro aŭ diro.

lia iom specifa sinteno kaj fifama kritikema spirito, kiun li senĝene esprimis.²⁷ Sed malgraŭ tio Schödl ne povis esti simple ignorita, ĉar li fervore luktis por la agnosko de Esperanto en GDR kaj fifine ne estis kontraŭ-komunisto. **Karl-Heinz Schulmeister**, unua sekretario de la Kulturligo,²⁸ bonvenigis la novajn membrojn, kiuj nun ricevis „novan hejmon“, kiel li promesis, atentigante, ke „ni havas la taskon revivigi la Esperanto-movadon, sed ne povas esti respondecigitaj pri tio, kio okazis aŭ estis ellasita en la lastaj 30 jaroj.“ Ŝajnas, ke li esprimis la unuajn afablajn vortojn de longa tempo flanke de iu partia funkciulo, malgraŭ lia aludo al tiklaj demandoj, kiuj devis resti tabuitaj. Ne estas klare, kion li celis diri per „kio okazis aŭ estis ellasita en la lastaj 30 jaroj“. Eble li aludis la situacion de Esperanto en la tempoj de Hitlero kaj Stalino, inkluzive la kvazaŭ-malpermeson de Esperanto en GDR depost 1949.

La kialoj de la nova kurso de la traktado de la esperantistoj ne estis eksplicite protokolitaj, ĉar ĉi tiun temon oni ja ne diskutis publike. Laŭ aŭtoro Wischendorf oni neniel povas konkludi, ke SED alproksimiĝis al la ideoj de la Esperantaj amikoj. Inter partiaj gvidantoj evidente venkis la konstato, ke la atenda aŭ prokrasta sinteno rilate al la Esperanto-movado en GDR estas malutila kaj ne povas esti daŭrigata kaj ke necesas trovi kontentigan solvon, ĉar oni timis, ke la ekzistanta malpermesa stato povus ĝeni la klopodojn por antaŭenigi la internacian diplomatian rekonon de la komunisma GDR-diktaturo. En tiu tempo la eksterpolitikaj rilatoj de GDR estis grave malhelpataj de la tielnomita “Hallsteindoktrino“ fare de FRG.²⁹ Krom tio la partiaj funkciuloj probable esperis, ke per la oficiala tolero de la Esperanto-movado en GDR ĉesos la konstantaj ĝenaj plendoj, protestoj kaj demandoj de esperantistoj kaj ke la temo Esperanto en GDR estas solvita kaj baldaŭ apartenos al la pasinteco, ĉar nur malmultaj maljunuloj okupiĝas pri ĝi. Aliflanke la ekzisto de partio kaj ŝtate kontrolebla oficiala Esperanto-sekcio kadre de iu centra oficiala strukturo, en nia kazo la Kulturligo, ŝajnis esti ankaŭ alloga, ĉar la utiligo de Esperanto por ŝtata politika propagando ŝajnis esti utila argumento. La kompara situacio en aliaj socialismaj landoj servis kiel ekzemploj.³⁰

Tamen, kiel dirite, la pli tolerema sinteno al Esperanto ne signifis, ke la tradicia negativa opinio de SED pri Esperanto en principo esence ŝanĝiĝis, pliboniĝis aŭ malaperis. Male, la suspekto pri la Esperanto-movado kaj pri esperantistoj restis ĝis la fino de la ekzisto de la komunisma GDR-diktaturo, kiel montras arkivaj dokumentoj precipe el la laboratorio de la organoj de la Ŝtata Sekureco.

²⁷ Pri lia biografio vd. piednoton 18.

²⁸ Karl-Heinz Schulmeister estis gvida politikisto de GDR, membro de SED. Dum multaj jaroj li estis la Unua Sekretario de la Kulturligo de GDR, kiun li reprezentis kiel membro de la Prezidantaro kaj parlamenta grupgvidanto dum jardekoj en la Popola Ĉambro (parlamento) de GDR. En la libro de Wischendorf Schulmeister estas menciita 44 fojojn. (Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Karl-Heinz_Schulmeister).

²⁹ La Doktrino de Hallstein estis eksterpolitika doktrino de FRG, kiu validis de 1955 ĝis 1969. Kiel politika gvidlinio ĝi deklaris, ke la starigo de diplomatiaj rilatoj kun GDR fare de triaj ŝtatoj devas esti rigardata kiel „malamika ago“ al FRG, kiu sola pretendis la reprezentadon de Germanio. La kontraŭaj rimedoj de FRG ne estis precizigitaj, sed ili ebligis larĝan gamon de ekonomiaj sankcioj ĝis la ĉesigo de diplomatiaj rilatoj kun la koncerna ŝtato. La celo estis izoli GDRn eksterpolitike. La socialdemokrati-liberala koalicio sub Willy Brandt rezignis pri la Hallstein-doktrino, ĉar evidentiĝis, ke estis ĉiam pli malfacile apliki ĝin en la ekstera politiko. La doktrino cetere estis nomita laŭ Walter Hallstein (CDU), Ŝtata sekretario en la Eksterlanda Ministerio de 1951 ĝis 1958, kvankam Hallstein mem ne estis ĝia verkinto.

³⁰ En Sovetunio oficiala Esperanto-instanco, kiu estis komparebla kun tiu de GDR, estis fondita en Moskvo nur en 1979 sub la nomo “Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE)” kadre de “Unio de sovetiaj societoj de la amikeco kaj kulturligo kun eksterlandoj” (SSOD, vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Asocio_de_Sovetiaj_Esperantistoj). Same kiel la komunisma GDR-diktaturo ankaŭ Sovetunio ege rigide reguligis la „amikecon“ kaj „kulturligon“ kun eksterlandoj, dum PL, HU kaj BG, kiuj celis akceli la internacian turismon, pli malfermite rilatis al civitanoj de ajnaj ŝtatoj.

La GDR-publiko eksciis nur rande pri la nova reguligo rilate la Esperanto-movadon. En sia eldono de la 27a de julio 1965 la centra SED-organo *Neues Deutschland* limigis sin koncerne la demandon „Ĉu ekzistas Esperanto-asocio en GDR?” en la rubriko “ND-respondoj” al mallonga noto pri la starigo de la “Centra Laborrondo Esperanto” ĉe la Kulturligo. Similaj komunikoj estis publikigitaj sufiĉe diskrete kaj ofte nur post kiam oni petis tion fari en aliaj gazetorganoj de GDR. Tiu ĉi minimumisma raportado ege seniluziigis la esperantistojn en la komunisma GDR-diktaturo kaj kaŭzis novajn protestreagojn.

Taskoj kaj laborkampoj de CLE

La “Centra Laborrondo Esperanto” de GDR (CLE), poste GDREA, funkciis kiel integra parto de la ŝtata kontrolaparato, kiu estis regata de SED. Ĝi estis formale subigita al la ĉefa sekretario de la Kulturligo kaj ĝiaj decidoj pri okazaĵoj kaj personoj estis faritaj en proksima interkonsultiĝo kun la plej altaj partiaj organoj kaj la rajtigitaj reprezentantoj de la Ministerio por Ŝtata Sekureco (vd. sube). Kompreneble pri ĉi tiu fakto oni neniam publike raportis.

En la agadplano oni ree atentigis pri la celoj de la nova Esperanto-laborrondo, kiu interalie havas la taskon „utiligi Esperanton por eksterlanda propagando kaj peradi la ideojn de la pacpolitiko kaj la sukcesojn de la socialisma laborista kaj kamparana ŝtato“. Koncerne la celaron de Esperanto oni metis klaran limon al „nepravigeblaj kaj malveraj postuloj“, „ekzemple enkonduki Esperanton kiel lernejan fakon aŭ oferti specialajn studkursojn de Esperanto en universitatoj“. Tiurilate GDR esence diferencis de PL, HU kaj aŭ BG.

La agadplano de CLE ampleksis kvar ĉefajn areojn aŭ kampojn, kiuj devas esti vidataj en reciprokaj interligiteco kaj -dependeco. La plej urĝa tasko en la komenco estis la starigo de ŝlosilaj postenoj por la laborrondoj en la unuopaj distriktoj de GDR. Iliaj gvidantoj devis plenumi certajn minimumajn postulojn kaj kriteriojn, inter kiuj la plej grava estis la strikta politika lojaleco al SED kaj ĝiaj gvidlinioj. Ĉi tiu areo de respondeco ankaŭ inkluzivis la elekton de partoprenantoj en internaciaj kongresoj kaj fakaj konferencoj kaj la determinon de iliaj roloj ĉe tiuj eventoj. Dua grava areo estis la superrigardado kaj kontrolo de la agadoj en la distriktoj. La prezidantoj de la distriktaj laborrondoj respondecis rilate al CEL kaj la jaraj laborplanoj devis esti submetitaj al CLE por ilia pritaksado. Se necese oni faris korektojn, ekzemple se la politika orientiĝo de la planitaj projektoj ne estis sufiĉe konsiderata. Alia ĉefa tasko estis la kontrolo de la literaturo kaj gazetaro, kiu estis permesata por importo. Pro la forta internacia orientiĝo de la Esperanto-agado oni devis observi la ĝeneralan politikan situacion kaj precipe la internacian evoluon de la Esperantomovado por povi reagi en taŭga maniero. Pri ĉi tiu analiza laboro respondecis ĉefe la CELano Detlev Blanke – ĉiuj ĉi-rilataj kaj multaj aliaj raportoj portas lian subskribon. En politika rilato Blanke plendis, ke „parte ekzistas politikaj-ideologiaj malklaraĵoj” aŭ „sektemaj opinioj pri la rolo de Esperanto“, kiuj kondukis al izoliĝo disde la laboro de la Kulturligo“. Tiu ĉi diagnozo estis farita, kiam aperis deviaj vidpunktoj kaj sintenoj inter la aktivuloj. Kio ne strikte konformis al la CLE-politiko, tio estis konsiderata kiel sektema kaj devis esti kritikita kaj rifuzita.

La sekretario de la Kulturligo registris en 1966 1400 esperantistojn, sed du jarojn poste restis nur 1342. Oni konsideris la malkreskon „mirinda“, despli ĉar iu Esperanto-lerolibro estis vendata en ĉirkaŭ 8000 ekzempleroj ĝis la fino de 1968. Blanke konkludis, ke ekzistas „almenaŭ pliaj 2000 esperantistoj, kiuj ne partoprenas en la laboro de la Kulturligo“. La kialon de la ŝrumpo Blanke vidis en la troa laborŝarĝo kaj en la timo engaĝiĝi politike. Li kritikis la ofte mankantajn klopodojn de la distriktaj administracioj de la Kul-

turligo por integri la esperantistojn en ĝian laboron. En analizo de la laboro de CLE de septembro 1971 Blanke parolis eĉ pri la „nesufiĉe solvita demando pri la allogeco de la Kulturligo.“ Koncerne la eksterlandajn rilatojn ekzistis ĉirkaŭ 20 ĝis 30 mil korespondligoj kun ĉirkaŭ 80 landoj, kiuj reprezentas „gravan politikan potencon“, kiu ne devus esti sub-taksita kaj „devus esti zorge administrata politike“. Krom tio li laŭdis la fakton, ke oni atingis respektindan partoprenon en la komitatoj de internaciaj Esperanto-organizaĵoj, kaj emfazis la signifon de la amasa dissendo de GDR-informmaterialo en Esperanto al eksterlando.

Okaze de la fondo de la distrikta “Laborrondo Esperanto” en Ŝverino en 1965 Menger aparte atentigis, „ke la esperantistoj povas esti aktivaj nur ene de la Germana Kulturligo“. Laborrondoj povis esti formitaj nur „kie estas la plej bonaj politikaj kaj organizaj kondiĉoj“. Tio estis grava kialo por la malmulteco de Esperanto-grupoj. Efektive nemalmultaj GDR-esperantistoj rezignis labori en distriktaj laborrondoj kadre de la Kulturligo, ĉar ili ne ŝatis la politikajn orientiĝojn kaj kontroladon de sia agado.

Malgraŭ tio oni (t.e. Blanke, en septembro 1971) anoncis sukcesojn por la kulturpolitika ideologia evoluo de la esperantistoj kaj asertis, ke la granda plimulto de Esperanto-amikoj trovas siajn personajn interesojn konformaj al tiuj de la socialisma socio, ke oni klare distanciĝis de kosmopolitaj, utopiaj kaj pacifismaj ideoj (sic!³¹), ke „sektemaj opinioj estas grandparte venkitaj”, ke en la grupoj pli kaj pli stariĝas „realisma sinteno pri la limoj kaj eblecoj de Esperanto”. Blanke registris „daŭre kreskantan agadon en la celata eksterlanda korespondado³² pri la evoluo de nia respubliko“ kaj „partiecan sinprezentadon“ en internaciaj aranĝoj en la socialisma landaro. La internacia poŝta korespondado estis praktikata ĉefe kun partneroj en la socialismaj landoj. La interŝanĝo de informoj ne plu estis privata afero. Ĝin kontrolis la funkciuloj de CLE translime kaj en la distriktoj de GDR, kie estis instalitaj filioj de CLE, kiuj devis kontroli la agadon en la regionoj. Nedezirataj presaĵoj el eksterlando (ĉefe Okcidento kaj Ĉinio) estis haltigitaj kaj konfiskitaj de la GDR-dogano kaj parte resenditaj al la ekspedito.³³

Aliflanke, ne ĉiuj, kiuj volis kunlabori, estis volonte bonvenigitaj kun malfermitaj brakoj. Ekzistis kandidatojn, kiujn CLE rigardis kun malfido. Precipe Esperanto-adeptoj el la tempo de antaŭ 1933 estis rigardataj kun skeptiko, ĉar ili povis disvastigi ideojn kaj opiniojn, kiujn SED volis eviti. Do okazis, ke tiaj esperantistoj malkvalifikiĝis por gvidaj postenoj en la novaj komitatoj, ĉar ili estis simple konsiderataj politike nefidindaj. En sia libro aŭtoro Wischendorf prezentas kelkajn tiajn ekzemplojn kiel la kazon de **Paul Glöckner** el Pirna-Copitz, kiu favoris Esperanto-agadon sen politika enmiksiĝo. En iu raporto Eichhorn denunciis lin ĉe Menger, ke li „rilatas politike malafable al nia GDR“ kaj ke oni observis lin dum la tempo de la faŝismo, pri kiu kamarado Helmut Fuchs povus doni interesajn indikojn“. Menger traktis tiajn esperantistojn kiel Paul Glöckner aŭ **Franz Tischer** en Magdeburg aŭ **Curt Kessler** en Dresdeno tre arogante kaj malrespekteme, ĉar ili havis aliajn politikajn konvinkojn. Kessler estis denunciata de Eichhorn ĉe Menger kiel „nefidinda“, „ĉar kontraŭ li okazas polica proceso pro tio, ke li „utiligis sen permeso hektografan aparaton“. Kiam Tischer volis partopreni en la 55a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno (1970) kaj informis pri tio Rudi Graetz, ke li skribis al la aŭstria prezidento d-ro Franz Jonas, kiu mem estis Esperanto-simpatianto, por peti financan subtenon, Graetz kaj Blanke konsideris kiel „sian devon“ kontakti la ministerion por

³¹ Ĝuste kosmopolitismo, utopiismo kaj pacifismo estis centraj elementoj de la Esperanto-ideologio, sed en la soclandoj tiuj ecoj estis konsiderataj kiel sektemaj.

³² Ĉ. 80% de la korespondado disvolviĝis kun la socialismaj – ĉiu kvina letero estis sendita al SU –, la resto kun nesocialismaj landoj.

³³ Ekzemple la recenzinto, kiu tiam redaktis la bultenon *TEJO tutmonde!*, kiun li ekspedis el Svislando (aŭ Belgio) al privataj adresoj en GDR, ricevis ĝin el GDR kun stampo de la GDR-dogano.

internaj aferoj. Ŝajnas, ke Jonas rezervis por Tischer mil ŝilingojn³⁴. Tischer, kiu intencis partopreni ankaŭ en la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) – kiu estis konsiderata de GDR kiel „kontraŭ-komunisma“ kaj „kosmopolitisma“ –, estis denunciata ĉe la ministerio tiel, ke la CLE-anoj notis en sia letero, ke feliĉe „la rapida reago de la kamaradoj en Magdeburgo malhelpis lian partoprenon en ambaŭ kongresoj“. Sed „poste li iris al okcidenta Germanio kaj uzis la monon aliloke. ...“ Tial „ni opinias, ke Franz Tischer damaĝas la laboron de la Centra Laborrondo en okcidentaj landoj (pri kio li eble ne konscias mem), kaj ni ne opinias konsilinde doni al li pluajn vojaĝpermesojn por okcidenta Germanio.”³⁵ Problemojn alfrontis ankaŭ pluraj aliaj GDR-esperantistoj, kiuj partoprenis aŭ intencis partopreni („kontraŭleĝe!!!) Esperanto-kongresojn en Okcidento, kiel **Alois Jurnig** el Quedlinburg, kiu veturis al la SAT-kongreso en Aŭgsburgo, kiel 3 pensiuloj el GDR, kiuj estis rimarkitaj ekster la oficiala GDR-delegacio en la viena UK, kaj kiel la lingvisto **Christian Papenmeier**, kiu ricevis inviton por partopreni la UKn en Nederlando en 1988. Kiam Blanke eksciis tion, li reagis per akraj admonoj al tiuj homoj kun la klarigo, ke ili ankoraŭ ne estas pretaj (en la senco de maturaj) por reprezenti oficiale GDREA-n.

Oficiala GDR-delegito en tiaj kongresoj devis post alveno tuj anonci sin ĉe la GDR-ambasado en la koncerna lando kaj informi ĝin pri la taskoj kaj celoj de la koncerna aranĝo. Li (plej ofte) devis agi laŭ la direktivoj de la Kulturligo, interkonsenti kun la delegitoj de aliaj organizaĵoj de socialismaj landoj por elpaŝi unuece, prezenti kaj klarigi konvinke la politikon de GDR, energie rifuzi diskriminadon de GDR kaj aliaj socialismaj landoj, kontraŭi la provon de la FRG-delegacio de prezento de „unueca germana kulturo“ kaj malakcepti intervjupeojn flanke de la „imperiismaj amaskomunikiloj“. Se iu oficiala GDR-delegito malrespektis tiujn regulojn, la permeso viziti tiajn kongresojn povis esti nuligita. Do ne ĉiu ajn povis aŭ volis transpreni tian oficon kaj korekte plenumi ĝin.

Kiam Blanke en 1984 rekontrolis la plenumon de la CLE-rezolucio de 1964 por krei distriktajn organizojn, li nombris ĉirkaŭ 1700 esperantistojn, kiuj estis organizitaj en la Kulturligo. Ĉirkaŭ 30% el ili apartenis al SED aŭ al unu el la blokpartioj. En novembro 1980 Blanke skribis, ke „la gvida rolo de la partio estas sekurigita“. La proporcio de la inteligentularo estis taksita kiel „kontentiga“, dum la laborista klaso estis subreprezentita, kio kontraŭis la tradiciojn de la laborista Esperanto-movado. Ankaŭ la proporcio de la junularo estis taksita kiel tro malalta. La membronombro tendence ŝrumpis, junaj gvidantoj kaj kvalifikitaj Eo-fakuloj mankis. La generacian ŝanĝon oni atendis kun zorgo, sed ankaŭ kun espero. Tiuj strukturaj kaj principaj problemoj akompanis la historion de la Esperantomovado en la komunisma GDR-diktaturo praktike de la komenco ĝis la fino.

Kunlaboro kun la Ministerio por Ŝtata Sekureco

En GDR ekzistis neniuj sociaj areoj, kiuj ne estis kontrolataj de la partio SED (eble krom iuj privataj subteraj kulturaj niĉoj kaj ekleziaj medioj). Eĉ la libertempaj aktivecoj de la civitanoj troviĝis sub observado por povi kontraŭstari eblajn „reakciajn“ kaj „kontraŭ-revoluciajn“ influojn, kiuj povus endanĝerigi la socialisman sistemon. Sekve ankaŭ la esperantistoj de GDR ne eskapis la radaron de la potenca furora kontrol-maŝinego de SED kaj de ĝia gvida respondeca instanco, kiu estis nomata „ŝildo kaj glavo de la partio“, la Ministerio por Ŝtata Sekureco, koncize nomata „Stasio“.³⁶ Pro la historie unika kaj monstra

³⁴ 1000 aŭstraj ŝilingoj egalvaloris al ĉ. 142 DM aŭ 73 eŭroj laŭ nuntempa kurso.

³⁵ Se oni konsideras la fakton, ke Franz Tischer el Magdeburgo ludis gravan rolon por la frua esperantisteco de Detlev Blanke, la posta politika denunco fare de la iama „disĉiplo“ ĉe la ministerio por internaj aferoj estis sufiĉe fia faro.

³⁶ La Ministerio por Ŝtata Sekureco de GDR ampleksis samtempe la dimensiojn de la sekreta polico, enlanda enketa aŭ esplora aŭtoritato kaj eksterlanda spiona servo. 1957-90 ĝi estis gvidata de Erich Mielke kaj estis

ekskluziveco de la agado de la Stasio kaj la sekreta konspira kunlaboro de miloj da civitanoj kun ĝi la temo ne perdis sian fascinon ĝis hodiaŭ kaj kompreneble ne povas esti ignorata ankaŭ en la kazo de la Esperanto-movado, kvankam ĉi tiu faceto de la Eo-agado de GDR estis prisilentata dum jardekoj, eĉ post la reunuiĝo de Germanio fare de la Eo-movado mem, ĉar temas pri vere embarasa afero.

La unua grava kazo, kiu estas traktenda en la ĉi-rilata rakonto, estas tiu de **Rudi Graetz**. Jam en februaro 1965 Graetz ricevis viziton de ĉefleŭtenanto Rudolph de la Ŝtata Sekureco (Stasi, MfS, MŖS), kiu verkis por sia oficejo favoran raporton pri la nova estro de la esperantistoj en GDR, en kiu li skribis: „Graetz montris sin kontenta, ke kunlaboranto de la Ministerio por Ŝtata Sekureco kontaktis lin. Li promesis al la subskribinto doni informojn pri negativaj personoj aŭ tendencoj inter esperantistoj. ...” Ĉu Graetz vere estis tiel kontenta pri la kontakto de la reprezentanto de la Ŝtata Sekureco kaj ĉu li vere promesis al la Stasi-ano doni informojn pri negativaj personoj ktp. oni ne scias, ĉar Graetz ja ne vidis liajn raportojn. Tio estis la kutima vortumo en raportoj de plentempaj Stasi-anoj, kiuj rilatis kun siaj sekretaj agentoj aŭ neoficialaj kunlaborantoj, kiel ankaŭ pruvas miloj da aliaj simile verkitaj Stasi-raportoj, kiuj iĝis konataj kaj publikaj.

Kiel ajn, la unua prezidanto de la ”Centra Laborrondo de Esperanto-Amikoj en Germana Kulturligo“ (CLE/ZAKE) estis samtempe ankaŭ la unua kontaktpersono gajnita por kunlaboro kun la Stasio. En marto 1970 la sama Rudolph, nun kapitano, aŭtoris dupaĝan manskribitan raporton pri Graetz, en kiu oni i.a. povas legi, ke „kun GMS ”Rudi“³⁷ estas neoficiale kunlaborate ekde la 6a de marto 1965“, ke li estas prezidanto de CLE, membro de SED, ke li reprezentas „firman klasan starpunkton“, ke „kun li okazis diversaj renkontiĝoj“, ke „ĝis nun li solvis la ricevitaĵajn taskojn kontentige“, ke „pro sia pli alta aĝo li povas esti utiligata nur limigite por eksterlandaj kontaktoj kaj akirado de informoj“, ke la „GMS kunlaboris sincere (aŭ honeste) kaj fidinde kun la MŖS, lia konfida rilato al la MŖS estas bona“, ke „li informis la MŖS-n ĉiam laŭ propra iniciato pri personaj ŝanĝoj“. Estis fiksita, ke la GMS restos „operace“ ankaŭ en la venonta tempo en sia funkcio kiel CLE-prezidanto. En la fino estis notite, ke GMS ”Rudi“ estu preparata al la funkcio de IMK³⁸.

La personan deklaron pri kunlaboro kun la ŝtata sekureco, kiun subskribis ankaŭ lia edzino Wally Graetz, Rudi Graetz subskribis relative malfrue, nome la 8an de novembro 1973. La teksto, kiu ne estas libera de altgrade bizaraj elementoj, estis jena:

„Per tio ĉi ni devigas nin sur libervola bazo kaj pro konvinko fari apartan kontribuon al la protekto de GDR per subteno de la MŖS en ĝia laboro. Ni estas pretaj disponigi al la MŖS ejon por okazigi ĝian konspiran laboron. Pri ĉiuj problemoj, faktoj kaj aferoj, kiuj iĝas konataj al ni, ni silentos rilate al ĉiuj personoj, ankaŭ rilate al niaj proksimaj parencoj. Por konservi la konspirecon ni elektas la kaŝnomon 'ĝardena urbo'. Rudi Graetz, Wally Graetz, 102 Berlin, Karl-Marx-Allee 23.“³⁹

Aliaj konataj esperantistoj, kiuj disponigis sin kiel „Neoficialajn kunlaborantojn“ (IM-ojn) de la Stasio, nomiĝis Otto Bäßler, Emil Rechtziegler, Hans Eichhorn, Rudolf Burmeister, Detlev Blanke kaj Ronald Loetzsch. La estraro de CLE montriĝis vera Stasia

kun ĉ. 91 mil plentem-paj kunlaborantoj (oktobro 1989) kaj kun 110-189 mil neoficialaj kunlaborantoj unu el la plej ampleksaj aparatoj de ŝtata organo por ŝtata sekureco en la mondo, rilate al la grandeco de la lando kaj la nombro de enloĝantoj.

³⁷ GMS signifis „Socian kunlaboranton por sekureco“. Temis pri kategorio de „neoficialaj kunlaborantoj“, kiu ekzistis ekde 1968 kaj celis la „inkludon de larĝaj sociaj fortoj“ en la kolektado de informoj kaj preventajn taskojn de la seku-reco.

³⁸ Tio signifis „Neoficialan kunlaboranton por la sekurigo de la konspiro kaj de rilataj aferoj“. Tio estis ekzemple personoj, kiuj disponigis iun ĉambron, sian loĝejon, oficejon aŭ konstruaĵon por konspiraj celoj.

³⁹ Laŭ eksterlibra dokumento.

nesto. Sed ne ĉiuj membroj de CLE kaj de la distrikta laborrondo estis (aŭtomate) Stasi-agentoj. Sekvas la priskribo de kelkaj elstaraj ekzemploj de fondaj membroj de CLE, pri kiuj en la Stasi-arkivoj estis trovitaj koncernaj Stasi-aktoj.

Otto Bäßler (1897-1981), gvidanto pri trejnado ĉe la menciita "Libro-Eksport-Import-Societo" (GDR), estis rekrutita en marto 1957 kiel „GI“ kun perspektivo al „GHI“⁴⁰ sub la kaŝnomo „Gerd“. Eĉ antaŭ ol li estis oficiale rekrutita li disponigis sian loĝejon por konspiraj renkontiĝoj. Post la aliĝo de la esperantistoj al la Kulturligo en 1965, li fariĝis estro de la Distrikta Laborrondo en Lepsiko kaj membro de la centra estraro de CLE kun la tasko de la „informa raportado“. Kiel „GI“ li partoprenis la 51an Universalan Kongreson de Esperanto de 1966 en Budapeŝto en Hungario kaj poste estis proksima kunlaboranto de la Departemento XX de la distrikta administracio de Lepsiko.

En sia persona Stasi-deklaraĵo, **Eugen Menger** (1902-71), estro de la sekcio pri personaro en la Kulturligo, devontigis sin al sekreteco rilate al la aliaj dungitoj de la administracio de la Kulturligo, ĉar la Ŝtata Sekureco ĉiam devis esti implikita en grava pripersonara demando. Menger ne estis aktiva esperantisto, sed perfekta partia burokrato, kiu havis pro sia ofico rektan linion al la MŜS, kiam li eklaboris kiel sekretario de la Kulturligo por CLE. Kvankam lia nomo aperis en publikaj raportoj destinitaj al la Eo-movado, en kiuj li estis prezentita kiel vicprezidanto de CLE, sekretario kaj sekciestro ĉe la Kulturligo, oni ne malkaŝis lian veran identecon kiel Stasi-peranton (ĉar la nomo Stasio ne ekzistis en tiaj raportoj). Pro sia relative frua morto en 1971 li subite malaperis el la nomaro de CLE kaj el la konscio de la Eo-movado.

Alia – jam konsiderinde pli juna – fonda membro estis **Emil Rechtziegler** (1938-?), diplomita ekonomikisto kaj scienca kunlaboranto ĉe la Germana Ekonomia Instituto en (orienta) Berlino, kiu laboris konspire kun la Popolpolico ekde majo 1964 sub la kaŝnomo „Ziegler“. Lia tasko estis „garantii konstantan superrigardon pri la Esperanto-movado en GDR kaj la kontroladon de CLE“. Li ankaŭ estis utiligata por „kontroloj en Esperanto-organizaĵoj, precipe en Berlino“ kaj devis „sekurecigi“ okazigojn de CLE. La registraĵoj de GI „Ziegler“ estis fiksitaj en plurnombraj protokoloj de la Ĉefa administracio XX/2. Unu el la raportoj rakontas, ke en kunveno de CLE en aŭgusto 1965 oni diskutis interalie pri la projekto de Esperanto-lernolibro de Ludwig Schödl. Laŭ „Ziegler“ la skizo estis malakceptita, ĉar ĝi „ne plenumis la postulojn en ĉiuj rilatoj“. Precipe „la politikaj aspektoj estis tiel primitivaj, ke la lernolibro ne povis esti presita en sia nuna formo.“ Krome la GI „informis pri negativaj esperantistoj, eksterlandaj rilatoj kaj vizitoj de eksterlandaj kaj okcidentgermanaj esperantistoj“. Klasika informanto de sekreta servo! Ŝajnas, ke la kunlaboro de Rechtziegler kun la Stasio estis finita en decembro 1966, supozeble pro la zorgo, ke li povus esti malkaŝita.

Kiel Emil Rechtziegler raportis en „Unua bilanco“, kiu aperis en la CLE-organo *der esperantist* 5-6/1966, preskaŭ unu jaron post la fondo de CLE en marto 1965, ekzistis regionaj Laborrondoj en 10 distriktoj de GDR, en 56 urboj ekzistis 90 rondoj por komencantoj, progresintoj, konversacio kaj korespondado. Entute estis nombritaj 1200 Esperanto-amikoj.

Ankoraŭ antaŭ la fondo de CLE la esperantisto **Hans Eichhorn** (1942-2016) estis engaĝita kunlabori kun la MŜS. Post ĉefe pozitiva pritakso de la kandidato en la enketraporto de la Stasio, por kiu liaj ampleksaj fremdlingvaj kapabloj (angla, rusa, bulgara, latina kaj Esperanto) ŝajnis esti aparte utilaj, Eichhorn devontigis sin kunlabori kun la MŜS en

⁴⁰ Tio signifas „Sekretan informanton“ (antaŭa nomo por „Neoficiala kunlaboranto“) kaj „Sekretan ĉefinformanton“ de la MŜS. Ĉi-lastata funkciulo havis la taskon gvidi aliajn „Sekretajn informantojn“ aŭ poste „Neoficialajn kunlaborantojn“.

aŭgusto 1963 sub la kodnomo „Grabowski“. En sespaĝa raporto pri la varbita estis notite, ke la kandidato, tiam medicina studento en Sofio, Bulgario, akceptis la proponon „sen multe da hezito kaj libervole“. Eichhorn devis observi la GDR-studentojn en Sofio. Post lia reveno el Bulgario al GDR la Stasio disponigis al li loĝejon en Berlino, ĉar la nova juna GI devenis el la provinco, el Pirna. La Stasi-raporto notis, ke Eichhorn komence okupiĝis pri „grava operaca procezo koncerne la materialon ‘Springer’“ kaj „ankaŭ funkcias kiel IM en ŝlosila pozicio en CLE. Kiel rezulto de tiu agado li posedas „promesplenan perspektivon kun konsidero al la starigo de kontaktoj en okcidenta Germanio.“ Komence de 1969 la ĉefa departemento XX/2 faris la proponon reregistri la GI „Grabowski“ al la statuso de IMS.⁴¹ La tasko de „Grabowski“ estis unuavice la „sekurecigo“ de la membroj de CLE kaj la „rekognosko de negativaj esperantistoj“. Alia tasko estis la „deĉerpado inter medicinaj studentoj kaj kuracistoj.“ Laŭ pritakso de la jaro 1970 la IMS montris „operacan pretecon kaj propravolan iniciatemon“. La raporto legeblis preskaŭ kiel okcidenta laboratesto: „La IMS solvis la donitajn taskojn je la plej plena kontenteco.“ Pri la „objekto“ „Zahn“ (Karl Maier, vd. sube) li „liveris kulpigeblajn raportojn“.

Eichhorn havis ankoraŭ alian vizaĝon, nome iusence ‘opozician’, kritikan, ribeleman. Kiel membro de la centra estraro de CLE li kverelis kun la redaktoroj de la gazeto *Dimanĉo*, organo de la Kulturligo, al kiuj li riproĉis malinteresiĝon pri Esperanto. Fakte la singardaj kaj malmultnombraj raportoj de la GDR-gazetaro pri Esperanto kaŭzis seniluziigon kaj ĉagrenon en CLE. Ĉi-rilate la sinteno, reago kaj kritiko de orientgermanaj esperantistoj malmulte diferencis de aliaj landoj, kie la esperantistoj estis same malkontentaj pri la gazetaro, kiu laŭ ili aŭ raportis tro malofte, negative aŭ fuŝe pri Esperanto. Eichhorn rememorigis la gazetredakcion de *Dimanĉo* pri tio, ke ĉe la Germana Kulturligo estis fondita ”Centra Laborrondo de Esperanto-Amikoj en Germana Kulturligo“, skribante tion emfaze per majuskloj. „Kiel revuo por kultura politiko devas esti vi, kiu okupiĝas pri Esperanto“, li postulis de la *Dimanĉo*. Pro la kruda tono, kiun Eichhorn permesis al si, Eugen Menger sentis sin devigita pardonpeti ĉe la unua sekretario de la Kulturligo. Ankaŭ en iu letero al kamarado Menger Eichhorn plendis pri la manko de resonado en la partia gazetaro.

En alia kazo de la jaro 1968 Eichhorn plendis ĉe la dogana administracio pro la malpermesita importado de Esperanto-revuo. Kune kun Menger li atingis, ke tiu malpermeso estis nuligita per la argumento, ke la esperantistoj de GDR devas informiĝi pri la Esperanto-movado de okcidenta Germanio kaj de eksterlando ĝenerale. En septembro 1968 la dogana administracio adaptis la regularon kaj permesis la importon de periodaĵoj kiel *La suda stelo* kaj *Homo kaj kosmo* el Jugoslavio, *Esperanto*, *La praktiko* kaj *Jarlibro de UEA* el Nederlando, *Heroldo de Esperanto* el Belgio kaj *Norda prismo* el Svedio plus iuj oficialaj Esperanto-gazetoj el Pollando, Hungario kaj Bulgario. Aliflanke malpermesita restis la importado de gazetoj kiel *El Popola Ĉinio*, *Lanterno*, *La Mondo* kaj *Okcident-Germana Revuo*, sed ankaŭ *Sennaciulo*, *Sennacieca Revuo*, *La juna penso* kaj *SAT-amikaro* el Francio. Ekzistis ankaŭ listo de personoj, kiuj estis konsulteblaj pri la situacio de importeblaj Esperanto-revuo, ekzemple Detlev Blanke por Berlino, Otto Bäßler por Lipsiko, Rudof Burmeister por Karl-Marx-Urbo, ktp.

Certe la (internacie) plej konata kaj signifa esperantisto-interlingvisto de GDR, kiun memoras ankaŭ la nuntempaj generacioj, nomiĝis **Detlev Blanke** (1941-2016). Kvankam aŭtoro Wischendorf ankaŭ dediĉas adekvatan atenton al tiu (kontetata) movada figuro kaj

⁴¹ Tio signifis „Neoficialan kunlaboranton por politika-operaca penetrado kaj sekurigo de la respondeca areo“ (IMS) kiel anstataŭanta nomo por „Sekreta informanto“ (GI). Tiuj Stasio-kunlaborantoj devis malkovri suspektindajn faktorojn, fari „signifajn kontribuojn al la ĉiuflanka garantiado de la interna sekureco“ en la areo de sia respondeco, agi „grandparte en preventa kaj damaĝa maniero“ kaj helpi por identigi ĝustatempe „novajn sekurecajn postulojn“.

ties kunlaboro kun la Ŝtata Sekureco, li limigis sin al la ĉefaj faktoj, kiuj antaŭ nelonge fariĝis konataj, atentigante, ke ĉi tiu temo estis pli detale prezentita en alia studo aperinta aliloke.⁴² Ni kaptas la okazon ĉerpi detalojn el tiu studo unuafoje en Esperanto-traduko por diskonigi ilin al pli vasta esperantlingva publiko.

Laŭ propraj biografiaj indikoj, kiujn *Peter Detlev Blanke*, naskita la 30an de majo 1941 en la holstina urbo Neumünster, faris al la Stasio, lia patro estis kuracisto kaj lia patrino bibliotekistino. Sian infanaĝon li pasigis en Blowatz proksime de Wismar/ Rostock (Meklenbur-go-/Okcidenta Pomerio/). En 1950 li aliĝis al la "Junaj Pioniroj" kaj en 1955 al la "Libera Germana Junularo" (FDJ) de GDR. En 1959 li abiturientiĝis kaj poste eniris en la ekonomikan fakultaton de la universitato de Rostock. Poste li transiris al la filozofia fakultato, kie li studis la fakojn germana lingvo kaj geografio por fariĝi instruisto en politeknika mezlernejo. En 1964 li trapasis la ŝtatan ekzamenon kun la ĝenerala pritakso „tre bona“ kaj kvalifikiĝis kiel faka instruisto pri germana lingvo kaj geografio ĝis la 10a klaso. Dum lia studtempo en Rostock li vivis en studenta hejmo. Ekde aŭgusto 1964 li laboris kiel fakinstruisto de la politeknika mezlernejo en la vilaĝo Meklenburgo (distrikto Rostock). Krome li aliĝis al la "Societo por Germana-Sovetia Amikeco" (DSF, 1956), "Libera Germana Sindikata Unio" (FDGB, sekcioj metalo kaj scienco, 1961) kaj "Germana Kultur-ligo" (DKB), en kiu li respondecis pri la reorganizado de la Esperanto-movado en la distrikto Rostock. Laŭ propraj indikoj Blanke lernis Esperanton en 1957/58, do en la aĝo de 16-17 jaroj.

La plej fruaj disponeblaj Stasi-dosieroj pri Detlev Blanke datas de 1963/64. Tiutempe Blanke studis en la universitato de Rostock. En decembro 1963 la respondeca sekretario de lia seminaria grupo notis en pozitiva „pritakso“ de la studento Blanke, ke li estas „kritikema“, „helpema“ kaj „societema“, sed ankaŭ homo kun ampleksaj scioj, ke li estas malfermita al diskutoj kaj ke li estas homo, kun kiu oni povas „bone kunlabori“. Ĉi tiun noton ricevis la distrikta aŭtoritato de la Germana Popola Polico Rostock. En februaro 1964 lia universitata profesoro faris „protokolon“, kiu denove enhavis pozitivan pritakson de la labormetodoj kaj atingoj de la „multflanke interesata“ studento Blanke. En marto 1964 la katedrestro de la Germana Instituto de la universitato de Rostock verkis alian „pritakson“ de la studento Blanke, kiu laŭdis liajn eksterordinarajn kapablojn – ĝin ricevis denove la Popolpolico en Rostock. Kopioj de tiuj raportoj estis ripetitaj fare de la Stasio en majo kaj februaro 1978 kaj estis subskribitaj de ĉefleŭtenanto Schuster kaj subleŭtenanto Bünger.

Kiel konate, la internacia poŝta trafiko en la komunisma GDR-diktaturo estis amplekse kontrolata. La Stasio baldaŭ rimarkis liajn libromendojn en eksterlando, al kiuj la Stasio reagis alergie kaj fariĝis aparte atentema, kiam la poŝto venis el Okcidento, precipe el FRG. Per tio la Stasio fariĝis atenta ne nur pri liaj libromendoj, sed ankaŭ pri lia persono mem, kiu estis interesa objekto por varbi al la sekreta operaca kunlaboro. Pro la libromendoj, kiuj estis senditaj tra Pollando, en julio 1965 Blanke estis prenita sub „operacan kontrolon“. Sekve la Stasio komencis fari ampleksajn esplorojn pri Blanke. Inter alie oni volis rikolti informojn pri la politika kaj profesia pasinteco de ĉi tiu homo, pri la karaktero de liaj socia laboro kaj reputacio en la komunumo, pri liaj hejmaj cirkonstancoj, liaj apartaj intereskampoj kaj lia sinteno al „nia socia ordo“ kaj kiel ĝi estas esprimita en liaj opinioj; krome interesis liaj rilatoj en lia loĝ-kvartalo, liaj ligoj kun la kapitalismaj kaj socialismaj landoj.

La petita „enketa raporto“ de la Popola Polica en Wismar, al kies respondeco apartenis la vilaĝo Mecklenburg, sekvis en septembro 1965 kaj estis tute pozitiva. Blanke, de „burĝaj deveno“, estis karakterizita kiel konata kaj tre bona specialisto, ŝatata de lernantoj kaj gepatroj. Li faris bonan socian laboron en la vilaĝo Mecklenburg, estis membro de la

⁴² Vd. http://www.plansprachen.ch/Esperanto_Stasi_Ulo.pdf.

Arbitracia Komitato de la municipo kaj sekretario de la FDJ-grupo de instruistoj, same gvidanto de la FDJ-grupo de studentoj. Oni ne forgesis noti, ke Blanke estas fakulo pri Esperanto kaj membro de „internacia komisiono“ kun ligoj al multaj landoj de la mondo. Krome estis emfazite, ke „Blanke gvidas morale senriproĉan vivstilon“ kaj ne kultivas iujn specialajn amikecojn kun aliaj GDR-civitanoj.

En alia raporto estis notite, ke li „strebas plenumi la taskojn donitajn al li kiel eble plej perfekte sukcese“, ke li „reprezentas klaran kaj konsekvan sintenon“, ke estas lia „merito“, ke „la laboro de FDJ ekkreskis en la lastaj jaroj“. En simila raporto de februaro 1966 estis menciite, ke „ne troviĝis negativaj ligoj“ rilate al „aspekto, konduto kaj sinteno“ de Blanke. Per tio la „operativa prilaborado“ de ĉi tiu persono finiĝis.

Komence de marto 1966 okazis interparolo kun Blanke en ties loĝejo en la vilaĝo Mecklenburg. Dum tiu renkontiĝo Blanke informis la policanon pri la loka Esperantomovado. La protokolanto notis, ke Blanke „donis al ĉiuj demandoj tujajn respondojn“, sed ke malgraŭ „lia progresema sinteno al nia laborista kaj kamparana ŝtato“ li „ankoraŭ ne klare komprenis ĉiujn problemojn“. Temis pri „lia opinio, ke la instruado de la angla lingvo en la lernejoj en GDR devus esti antaŭenigita kaj ke la rusa lingvo ne estu rigardata kiel mondlingvo“. Blanke konsentis regule daŭrigi la kontaktojn.

En protokolo de martfino subleŭtenanto Bünger de la Popolpolico Rostock resumis, ke „el politika vidpunkto ne estis plendoj pri la ĝenerala konduto de Blanke. (...) En sociopolitikaj diskutoj li reprezentas la politikon de nia partio kaj registaro kaj ĉiam montras pozitivan sintenon. (...) Kvankam li estas de burĝa deveno [sic], oni taksas, ke li estas firme ligita al la laborista kaj kamparana ŝtato“. Aliloke estis notite, ke „la kandidato tre bone komprenas la aferojn, estas inteligenta, havas ampleksan scipovon, estas mense tre fleksebla kaj lingve tre lerta, multe legas. ... Oni povas diri, ke li ĉiam faras puran kaj bone prizorgitan impreson, estas bone vestita kaj ankaŭ en lia ĉambro regas deca loĝkulturo.“

La unuan praktikan ´operacan´ taskon Blanke ricevis en 1966, kiam la 25-jarulo estis sendita al okcidenta Germanio por partopreni iun pentekostan aranĝon de Germana Esperanto-Asocio (GEA) en Bamberg. La protokolo de la renkontiĝo kun la homo de la Popolpolico datita la 8an de junio 1966 montris, ke Blanke gajnis la impreson, ke li kaj liaj du akompanantoj estis observitaj de la okcidentgermana Konstitucia Protekto. La koncerna epizodo estis detale rakontita. Tio tre interesis la Stasion, kiu konkludis en sia ĉi-tema raporto, ke tiu ĉi ekzemplo montras, „kiaj rimedoj kaj metodoj estas uzataj de la Bonna flanko por perturbi la interkompreniĝon en ĉiuj rilatoj de la vivo“. Post tiu ´german-germana´ ekzameno Blanke estis konsiderata de la Stasio kiel matura objekto por esti varbita al la operaca kunlaboro.

Okaze de nova rendevuo kun kamarado Bünger de la 19a de julio 1966 Blanke konfirmis, laŭ la ĉi-koncerna raporto, ke li estas preta konspire kunlabori kun la Germana Popolpolico sur konfidenca bazo. La manskribita, normigita konfidenca interkonsento, kiun Detlev Blanke, kiu adoptis la kaŝnomon „Ulo“, devis subskribi por la Popola Polico,⁴³ havis la sekvan vortumon:

„Mi devontigas min kunlabori sur libervola bazo kun la germana Popola Polico. Mi devontigas min komuniki parole aŭ skribe ĉiujn indikojn pri punendaj agoj, pri kiuj mi ekscias. La raportojn mi subskribos per la pseŭdonomo 'ULO'. Mi estis instruĉiita, ke mi ne rajtas paroli kun iu ajn persono pri la kunlaboro kun la GPP kaj ke mi estas

⁴³ Kvankam la polico de GDR (Germana Popola Polico) estis submetita al la Ministerio por internaj aferoj, ĝi funkciis kiel rekta ligilo, komplico kaj helpanto de MŖS, kiu pretendis esti informita pri ĉiuj gravaj policaj aferoj en la ŝtato.

***submetita al la reguloj de la kriminala juro, se mi rompas mian promeson pri silentado.
Detlev Blanke (ULO)***

Post tiu ĉi formala burokratia proceduro rezulte de la „operaca prilaborado“ kaj „varbado“ Detlev Blanke estis akceptita kiel IM „Ulo“ kaj konsiderata kiel plene funkcia „neoficiala kunlaboranto“ de la polico.⁴⁴ Kiel estonta informanto de la organoj de la ŝtata sekureco de GDR Blanke devis, kadre de „perspektiva plano“, kiu estis speciale elaborita por li, havi konstantan superrigardon pri la membroj de la Esperanto-movado en la distrikto Rostock, observi ilian rilaton al la politiko de SED kaj registaro de GDR kaj kiel ili reprezentas GDR-n en siaj kontaktoj kun eksterlandaj esperantistoj. Li devis informi la instancojn de la ŝtata sekureco, kiuj esperantistoj aperas „negative“ en eksteraj konferencoj aŭ aranĝoj eksterlande; ekscii, ĉu estas indikoj, ke la klasa kontraŭulo influas la esperantistojn kaj ĉu ekzistas provoj de agentaj centroj de la okcidenta sekreta servo kontakti esperantistojn en GDR. Krom tio li devis konstante informi tiujn instancojn pri ĉiutagaj okazaĵoj en pozitiva aŭ negativa senco, kiuj povas aperi en lia loĝkvartalo kaj ĉu okazas iuj krimoj. Fine li devis noti temojn, kiuj estas diskutataj inter instruistoj de lia lernejo. Ĉu li vere plenumis tiujn instrukciojn estas nekonate.

Kiel konfirmas aliaj pruviloj, kadre de la nova „perspektiva plano“ Blanke kiel nova IM „Ulo“ pli malpli regule liveris raportojn al la organoj de la ŝtata sekureco pri diversaj temoj kaj okazaĵoj, precipe en ligo kun Esperanto, kaj de tempo al tempo konspire renkontiĝis kun ĝiaj reprezentantoj.

La unua praktika ‘operaca’ tasko de Blanke post la subskribo de la deklaro pri kunlaboro estis raporti pri tio post la reveno de la 51a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto, Hungario, en somero 1966, kie li devis aparte atenti la pozicion kaj sintenon de la okcidentgermanaj esperantistoj kiel ili prezentos sin al la Esperanto-representantoj el GDR.

Ankaŭ plue Blanke estis konstante rekontrolata kaj pritaksita laŭ sia fideindeco, ĉu li regas la regulojn de la konspireco. En iu raporto li mem estis karakterizita kiel „fanatikulo de Esperanto“. Liaj rilatoj kun eksterlando estis ĉiam denove indaj je rimarkigo. En raporto de oktobro 1966 Blanke estis nomita „GI“ („sekreta informanto“), kio estis la uzo ĝis 1968, kiam la termino estis anstataŭigita per „IM“ („neoficiala kunlaboranto“). En unu el la renkontiĝoj Blanke, kiu ricevis la taskon listigi la esperantistojn, transdonis iun liston de Esperanto-membroj al la respondeca oficiro – nun pri li okupiĝis subleŭtenanto Hagemann el Rostock.

Jarfine 1966/67 „GI“ Blanke kaj du akompanantoj veturis al Münster en okcidentgermana Vestaflio, kie okazis la tradicia Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo. Pri tiu vojaĝo kaj aranĝo Blanke liveris al Hagemann, kiu serĉis lin en lia loĝejo, detalan raporton, kiu enhavis ankaŭ informojn pri personoj, kiuj tie ĉeestis aŭ prelegis. Krom tio en la Stasi-dokumentaro pri püDetlev Blanke oni trovas diversajn traktaĵojn pri la graveco de Esperanto, ampleksan kaj detalan „analizon“ de la „eldona agado de esperantistoj en la Ĉina Popola Respubliko“, eĉ raporton pri la Ido-movado en GDR kaj ankaŭ pli longan raporton de Rudi Graetz pri la Esperanto-movado en Pollando.

En 1968 Blanke translokiĝis al (orienta) Berlino, kie li eklaboris kiel oficisto en la ĉefa sekretariejo de la Kulturligo de GDR, poste (de 1970) kiel estro de la tiea Esperantofako ĉe Charlottenstrato 60, poste ĉe Otto-Nuschke-Strato 1. En julio 1968 GI Detlev

⁴⁴ Kiel IM „Ulo“ Detlev Blanke estis unufoje (kaj nur mallonge) menciita de Andreas Zimmer en ties libro pri la Kulturligo de GDR: Zimmer, Andreas: Der Kulturbund in der SBZ und in der DDR. 2018. p. 524. Ĉi tiu verko aperis en 2013 kiel universitata disertacio. La koncernaj teksteroj pri Blanke estas troveblaj en Google Books sub la fraportoj „Zimmer Ulo Blanke Kulturbund“.

Blanke estis transdonita al la servounuo XX/2 de la MŜS. En februaro 1969 IM „Ulo“ estis re-registrita kiel „GMS“ („sekreta kunlaboranto por sekureco“). Ĝis 1990 li funkciis kiel sekretario de la Esperanto-Laborrondo en la Kulturligo de GDR (CLE, poste GDREA), ankaŭ kiel redaktoro de la oficiala organo *der esperantist*. En sia scienca fako „interlingvistiko“ d-ro phil. sc. Detlev Blanke estis konata kiel specialisto pri la scienc-teoria priskribo de la artefaritaj universalaj planlingvoj kaj lige kun tio aŭtoris multnombrajn gravajn artikolojn kaj publikigojn.

Ĉar Blanke estis centprocente fidinda kunlaboranto, la organoj de la ŝtata sekureco estis kontentaj pri lia laboro. Kiam la Popolpolico pritaksis lin kiel dungiton en februaro 1970, en la memorando subskribita de kapitano Rudolph estis notite, ke „la GMS estas membro de SED kaj konstante reprezentas la politikon de la partio kaj registaro. En la antaŭa kunlaboro la GMS honeste raportis pri la aferoj interesaj rilate la Esperanto-movadon en GDR, donis informojn pri esperantistoj, kiuj havis negativan efikon sur internacia skalo.“

Post 1970 la protokoloj apenaŭ ŝajnis esencaj. Temis pri certa rutino de raportado kun teknika karaktero, kiu ĉefe koncernis Esperanto-aranĝojn, kaj ‘privataj’ renkontiĝoj kun anoj de la sekureca servo okazis malpli ofte. Apartenante al la t.n. „vojaĝa taĉmento“, kiu estis rezervita al funkciuloj, kiuj rajtis oficiale veturi al eksterlando, Blanke povis viziti ankaŭ okcidentajn landojn.

Kiam en 1972 la respondeco de la MŜS-servounuo XX/2, kiu okupiĝis pri la observado de homoj kiel Detlev Blanke kaj la Esperanto-movado, finiĝis, la „kandidato estis arĥivigita“ kaj la neoficiala ligo al Blanke estis interrompita fare de la koncerna ministerio. Blanke nun estis oficiala dungito de la Kulturligo en Berlino, kie oficialaj Stasi-kontaktoj nun okazis pro ofico. Estis trovitaj aktoj, kiuj datas de 1978 kaj kiuj parte ripetas la formalajn informojn kaj konstatojn de pli fruaj jaroj, ekzemple ke la rilatoj de Blanke kun MŜS estas bonaj kaj ke li estas fidinda, honesta kaj bona kunlaboranto. Estas konservitaj du ampleksaj raportoj kun informoj pri la GDRa kaj internacia Esperanto-movadoj kaj ties aktivuloj, pri la kontaktoj inter esperantistoj de GDR kaj FRG. Dum Blanke laŭdis la Esperanto-agadon en Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, Bulgario kaj Hungario, li kritikis la movadon en Pollando, kies movadanoj estis konsiderataj politike nefidindaj. En la dua raporto de ĉi tiu jaro estis notite inter alie, ke la Kulturligo de GDR „ne havas intereson starigi proksimajn ligojn kun la Esperanto-Asocio de FRG“. Estis konstatite, ke al Hamburgo veturis pensiuloj el GDR ekster la oficiala delegacio de GDR, kiam en 1974 en tiu okcidentgermana urbo okazis la 59a Universala Kongreso de Esperanto. Kaj kiam la 63a UK okazis en Varno, Bulgario, la Stasio nature ree pli altgrade interesiĝis pri la „problemoj de la preparado de la kongreso“ – certe la aventuroj kaj perturboj de la jaro 1963, kiam la UK okazis en Sofio, restis memorataj.

Eĉ se la raportoj de la Stasio pri Detlev Blanke faras normigitan kaj manipulitan impreson laŭ la tipaj maniero kaj stilo de la sekreta servo de la komunisma GDR-diktaturo, ekzistas neniu dubo, ke Blanke volonte donis la petitajn informojn al la organoj de la ŝtata sekureco. De tiu sekreta konspira kunlaboro ambaŭ flankoj profitis. Blanke estis verŝajne la plej bone informata kaj grava kontaktpersono en la Esperanto-sceno de GDR, kies instancoj probable kredis, ke li havas ĉion kaj ĉiujn sub kontrolo. En Esperanto-medioj de GDR kaj FRG oni ĉiam suspektis, ke Blanke estas/is kunlaboranto de la Stasio. Sed la pruvo povis esti liverita finfine nur en 2013, kiam Andreas Zimmer menciis lin kun la koncerna Stasi-kodnomo en sia libro pri la historio de la Kulturligo. En 2019 la koncernaj Stasi-aktoj povis esti publikigitaj.⁴⁵ Detlev Blanke, kiu neatendite forpasis en somero 2016,

⁴⁵ Povas esti, ke aliaj Esperanto-„historiistoj“ konis tiun informon publikigitan en la libro de Andreas Zimmer de 2013 (reeldonita en 2018), kaj ke iuj ankaŭ konsultis la koncernan materialon de BStU, en kiu ili eksciis,

dumvive obstine prisilentis sian Stasi-kunlaboron kaj nervoze reagis, kiam oni aludis ĉi tiun temon.

Eĉ pli kuriozan, aventurecan kaj pli fruan karieron kiel Stasi-kunlaboranto faris la prezidanto de la distrikta laborrondo en Karl-Marx-Urbo, **Rudolf Burmeister** (1930-2019), kiu estis akceptita de la Centra Laborrondo CLE en 1968. Liaj multnombraj vojaĝoj al esperantistaj renkontiĝoj en okcidenta Berlino vekis la suspekton de la Stasio. En septembro 1955 li subskribis deklaron de devontigo kaj engaĝiĝis por la MŜS. Kiel IM „Hübner“ Burmeister devis raporti pri la Esperanto-renkontiĝoj okazintaj en okcidenta Berlino. En marto 1956 li subskribis specifan deklaron de la preteco por la Stasio „malkaŝi“ „malami-kajn agent-centrojn“ en okcidenta Berlino. Por tiu celo li estis loĝigita al okcidenta Berlino. Iu Stasi-raporto deklaras, ke li kontrabandis kontrolitajn GM-ojn en la OSI-ĉefsidejon⁴⁶ nome de la MŜS ...“ kaj tiel povis kontribui al la arestado de 12 agentoj sur la teritorio de GDR. 2 aliaj agentoj povis esti „revarbitaj“ per lia partopreno. Krome la IM povis prilabori ankoraŭ kelkajn gravajn homojn, ekzemple sekciestron de la usona centro por rifuĝintoj en Marienfelde. Pro la danĝero de la malkonspiro Burmeister devis reveni al GDR en oktobro 1958. Dum la restado en okcidenta Berlino Burmeister ne rezignis pri sia intereso pri Esperanto kaj daŭre rilatis kun aliaj esperantistoj. Laŭ la Stasio li estis „tre bona amiko“ de la prezidanto de la Esperanto-junularo en Berlino, Helmut Lehmann, kiu ankaŭ estis neoficiala kunlaboranto de MŜS, sekcio V. Post sia reveno al GDR Burmeister daŭrigis sian agadon kiel MŜS-agento, funkciante kiel „GM por specialaj taskoj“. Al li estis konfidita la administrado de neoficialaj kunlaborantoj. En iu momento li respondecis pri 15 IM-oj. Tamen ĉi tiu laboro ne povis esti efektivigita en la libera tempo. Tial la MŜS provizis lin per „falsa dunga rilato“, kiu necesigis ŝanĝi la organizadon de lia ĉiutaga vivo por ne altiri atenton. Kiel eblas konstati laŭ iu raporto, li devis „pritaksi la esperantistojn de sia ampleksa poŝtkorespondado“. Tamen Burmeister montris malmulte da kompreno por la malpermeso de la libera organizita agado de esperantistoj en GDR. Do oni devis iomete prilabori lin por klarigi al li la neceson de ĉi tiu malpermeso. De julio 1982 „HIM“⁴⁷ „Hübner“ devis observi la „membrojn de la scienc-teknika intelektularo, la reprezentantojn de ekleziaj institucioj kaj la anojn de la medicina inteligentularo“ ene de CLE, aparte en Karl-Marx-Urbo. La BStU-aktoj konfirmas, ke Burmeister, kiu cetere estis UEA-delegito dum multaj jaroj, estis tre grava kaj fidinda neoficiala kunlaboranto.⁴⁸

Kiel montras pliaj ekzemploj en la studo de aŭtoro Wischendorf, oni venas al la konkludo, ke ne ĉiuj varbaj klopodoj de la Stasio alportis la deziratan sukceson. Samtempe oni povas supozi, ke la reto de informantoj estis sufiĉe densa por informiĝi pri ĉiuj esencaj eventoj en la esperantista medio en kaj ekster GDR.

Unu el tiuj ekzemploj de fiaskinta varbprovo de MŜS koncernis la berlinan dentiston **Karl Maier** (nask. 1901), kiu estis konata kaj respektata personeco en la Esperanto-medio de GDR. Iam Maier vivis en Usono, Meksiko, Japanio kaj popola Ĉinio. En 1955 li translokiĝis al GDR kun sia edzino. En 1956 li iĝis kandidato de SED kaj tri jarojn poste plena membro de tiu partio. En 1961 Maier estis „rekrutita kiel DA“⁴⁹ por la MŜS, sed sen esti uzata operace“. Tamen Maier renkontis malfacilaĵojn, ĉar li simpatiis kun la Ĉina Popola Respubliko kaj la Ĉina Komunisma Partio, kiu reprezentis el la vidpunkto de SED

ke Detlev Blanke estis neoficiala kunlaboranto (IM „Ulo“) de la organoj de la ŝtata sekureco de GDR. En tia kazo ŝajnas, ke oni preferis publike prisilenti tiun fakton por protekti la reputacion de la Esperanto-kolego Detlev Blanke.

⁴⁶ Office of Scientific Intelligence (OSI) estis ĝis 1963 sekcio de CIA.

⁴⁷ Tio signifis ĉefoficantan neoficialan kunlaboranton de MŜS, kiu estis regule pagata por siaj servoj.

⁴⁸ En la koncerna vikipedia artikolo sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Rudolf_Burmeister mankas noto pri kunlaboro kun la Stasio.

⁴⁹ Ne klaras, kion signifas DA, verŝajne temas pri kategorio kiel GI aŭ IM.

„kontraŭ-marxisman pozicion“. Maier konservis ligojn al la ĉina ambasado, kie li ofte gastis kun sia edzino. Li funkciis ankaŭ kiel ligilo al la redakcio de la esperantlingva revuo *El popola Ĉinio* kaj ties eldonejo. Ĉar orienta Germanio estis aliancano de Sovetunio, kiu rigardis Ĉinion kiel malamikon, tia ligo estis konsiderata kiel krimo. Kontaktoj kun la Ĉina KP kaj popola Ĉinio mem estis nedezirindaj same kiel la importo de gazetaraj produktoj el ĉi tiu lando en GDR estis malhelpata de la dogano. Kvankam Maier estis fidela apoganto de GDR ekde la komenco de ĝia ekzisto, liaj ligoj kun Ĉinio kondukis fine de 1963 al partia proceso kontraŭ li. Lia origine intencita ekskludo el la partio finfine ne estis konfirmita. Koncerne Esperanton, iu raporto atentigis, ke Maier apartenas „al la plej fanatikaj esperantistoj, kiuj pledis por la akcepto de Esperanto-organizo en GDR“. Ĉar Maier estis kulpigita pri „konspira laboro kontraŭ la fundamentoj ... de nia respubliko“, li ne devis fariĝi membro de la centra estraro de CLE. La gvidajn funkciulojn de CLE li kritikis pro „brenado de la laboro de la esperantistoj“, pro kio ili malŝatis lin. Post kiam la Esperanto-malpermeso estis nuligita, Maier estris Esperanto-rondon en la urboparto Prenzlauer Berg dum kelkaj jaroj. Cetere almenaŭ dekdu neoficialaj kunlaborantoj de MŜS partoprenis en la Stasi-operaco kontraŭ la kazo „Zahn“ (dento) de Karl Maier.

Certe la listo de Esperanto-kunlaborantoj de la ŝtata sekureco de GDR ne estas kompleta. Inter tiaj kunlaboroj menciindas ankaŭ la kazo de *Hans Diedrich* (nask. 1918) en Ŝverino, espe-rantisto de 1931 kaj organizita en GLEA, iama membro de KPG laŭ poste de SED. La Kulturligo konsideris lin „fidinda kamarado“. En 1953 li estis varbita kiel GI de la MŜS kaj raportis sub la kaŝnomo „Fritz Meier“. En deklaro de la sama jaro li promesis „kunlabori kun pliaj personoj en la intereso de MŜS“. Kiel estro de la Esperanto-Laborrondo en Ŝverino post la fonda de CLE en 1965 li estis engaĝita de MŜS ankaŭ tie. Ĉar li estis vaste konata kiel „klaskonscia kamarado“, la ŝtata sekureco konsideris lin ne tro taŭga por la kunlaboro pro la timo, ke li povus esti malkaŝita de „negativaj-malamikaj elementoj“. Alia problemo estis, ke li komencis kritiki la CLE-on en Berlino, al kiu li riproĉis, ke ĝi ne eltenas kritikon, pro kio liaj rilatoj kun CLE malboniĝis. Schulmeister, kiu montris komprenon por la sinteno de Diedrich, parolis pri miskomprenoj kaj eventualaj mankoj en la laboro de CLE. Ĉi tiu ekzemplo bone montras, ke en la kazoj de Diedrich kaj CLE kunpuŝiĝis du potenc-centroj, kiuj sentis sin reĝoj en sia areo, kiun ili celis kvazaŭ absolutisme regadi. Hans Dietrich kaj lia frato Ernst sendis sian plendon eĉ al „la ĉefideologo“ pri kulturo Kurt Hager. Sed la partiaj gvidantoj reagis kun ĉagreno al tiaj elpaŝoj. Ankaŭ CLE-sekretario Detlev Blanke malŝatis tian situacion kaj en sia supera pozicio ne hezitis riproĉi al Hans Dietrich „eksterordinare fortan individuismon“. La potenc-lukto inter Ŝverino kaj Berlino finiĝis post premo flanke de Blanke per la 'libervola' demisio de Dietrich kaj lia anstataŭigo per alia, pli „fidinda, saĝa kaj ekvilibrata“ samideano.

En 2010 iĝis konate, ke la lingvisto *Ronald Löttsch* (1931-2018) laŭ Stasi-deklaro de marto 1962 servis kiel neoficiala kunlaboranto de la ŝtata sekureco de GDR sub la kaŝnomo „Heinz“. Pli ol 100 kunvenaj raportoj kaj 19 manskribitaj raportoj estas dokumentitaj en la Stasi-dosieroj. MŜS notis pri Löttsch, ke „li plenumas siajn taskojn konsciencie, proprainiciate kaj fidinde.“ Li kutimis okupiĝi ĉefe pri lingvistoj. En januaro 1990 Löttsch fariĝis prezidanto de la ”Esperanto-Asocio en la Kulturligo de GDR“ (GDREA) kaj post la reunuiĝo de Germanio restis estrarano de la tutgermana Esperanto-Asocio (GEA).⁵⁰

⁵⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ronald_Löttsch. Lia vidvino estas la konata LINKE-membrino de la germana federacia parlamenti, Gesine Löttsch.

De CLE al GDREA (1981)

La nova periodo de la Esperanto-movado en la komunisma GDR-diktaturo sub la kondiĉoj de la rigora partipolitika kontrolo antaŭvidis la plenumon de ampleksa laborprogramo, kiel la notoj de Eugen Menger anoncis. La laborstilo en CLE estis komence plejparte determinita de Rudi Graetz kaj Eugen Menger. Graetz premis la esperantistojn per la admono, ke nun devus esti metitaj „videblaj sukcesoj sur la tablon“. Unuavice li pensis precipe pri „politika laboro“ kaj klariĝis, ke „en ĉiu okazo ni ĉiam devas emfazi la politikan flankon. Li emfazis, ke „la pli frua, parte klubeca laboro (Vereinsmeierei) ne havas lokon ĉe ni, kvankam kelkaj pli maljunaj esperantistoj ne konsentas pri la nova formo de nia laboro“. Krome Graetz atentigis pri la fakto, ke neraciaj postuloj kaj troigitaj atendoj devus esti rifuzitaj. Menger atentigis, ke „la Centra Laborrondo aŭ Labora Komitato estas organo, kiu faras siajn decidojn kolektive“ kaj ke „arbitraj agoj de individuaj membroj ne estos tolerataj“. Do ekzemple ankaŭ kolego Hans Eichhorn, kiu fojfoje montris sin tro aktiva, submetis sin al la postulata disciplino kaj promesis en letero al kamarado Menger, ke li neniam „agos memstare aŭ flegos oficialajn kontaktojn sen via scio“.

En majo 1968 la konsisteco de la centra estraro de CLE ŝanĝiĝis: Estis alelektitaj *Linde Heinze* (32-jara kemiistino el Bautzen), *Detlev Blanke* (28-jara instruisto el Berlino) kaj *Rudolf Burmeister* (39-jara kontrolisto de la kvalito de varoj el Karl-Marx-Urbo). *Rainer Knapp* el Berlino, gvidanto de la sekcio pri Esperanto en la ĉefa sekretariejo de la Kulturligo) jam estis kooptita pli frue same kiel prof. d-ro *Viktor Falkenhahn*, docento en la Slavistika Instituto de la Humboldt-universitato en Berlino,⁵¹ kaj d-ro *Peter-Wolfgang Ruff*, ĉefkuracisto en la Fiziologia Instituto de la Humboldt-universitato. Fonda membro Erwin Schleusener forpasis en 1968. En tiu momento al CLE apartenis 15 personoj. En 1972 aperis nova listo de kandidatoj por CLE, kiu ampleksis jenajn nomojn: d-ro *Till Dahlenburg* (instruisto pri rusa lingvo el Brüel, membro de la Nacia Konsilio de la Nacia Fronto de GDR, membro de CDU⁵²), *Jürgen Hamann* (el Lepsiko, studento en la faklernejo por bibliotekaj sciencoj, membro de SED), *Günter Heil* (advokato el Bernstadt, redaktoro de la Esperanto-bulteno „Amikeco“), *Hans Heinel* (diplomita filologo el Oederan, membro de SED), *Linde Knöschke* (kemia inĝenierino el Berlino, senpartia) kaj *Rita Krips* (el Potsdam, studentino en la faklernejo por ekonomiko en Karlshorst, senpartia).

En 1974 komenciĝis diskuto pri ŝanĝo de la nomo CLE, ĉar oni ne plu konsideris ĝin celkonforma precipe vide al la internacia laboro. Sed dume nenio okazis, ĉar la partio ne konsideris la nomŝanĝon necesa, ĉar Esperanto devis esti tenata sur malalta organiza nivelo. Sed eĉ kamarado d-ro Schulmeister kritikis la sintenon de la daŭraj rezervoj al Esperanto flanke de SED kaj pledis por la forigo de tiu skeptiko. Detlev Blanke argumentis, ke la esperantistoj funkcias fakte kiel asocio en la Kulturligo, pro kio estus adekvate fondi asocion, kio havus signifon por la internacia laboro. En sia analizo de novembro 1980 Blanke konfirmis la neceson de la ekzisto de tia asocio kun la partopreno de la „koncernaj sociaj fortoj“. Por Blanke la nura okupiĝo pri Esperanto kadre de CLE estis tro malmulte, des pli ke aliaj fakoj ĝuis pli vastan atenton de la ŝtato kaj partio.⁵³ Senkonsidere al la rifuzema sinteno de tiuj ŝtato kaj partio en 1981 finfine venis la momento por ŝanĝi la nomon de „Centra Laborrondo Esperanto (CLE)“ al „Esperanto-Asocio (en la Kulturligo) de GDR (GDREA)“. Aktuale la centra estraro havis 50 membrojn. En interna kontrolo de 1986 estis konstatite, ke de 47 membroj (nur) 25 apartenis al SED. La politika

⁵¹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Viktor_Falkenhahn.

⁵² Temas pri la „blokartio“ Kristandemokratia Unio.

⁵³ En la Kulturligo de GDR aktivis ĉirkaŭ 200 mil membroj en 40 faksekcioj kiel fotistoj, filatelistoj, amikoj de la litera-turo kaj naturo. La esperantistoj havis en principo la saman statuson kiel la anoj de tiuj faksekcioj. CLE (kaj ankaŭ GDREA) ne estis klasika asocio, sed funkciis kiel kontrolorgano de SED en formo de faksekcio de la Kulturligo.

senmakuleco estis nepra kondiĉo por aparteni al tiu estraro. En 1982 KL-amiko Seidemann estis eksigita el ĉiuj gvidinstancoj, pro kialoj, kiuj ne estis komunikitaj. Povas esti, ke nepolitikaj kaŭzoj ludis iun rolon.

Paranoja kontrolado kaj timo sen fino

La tipa maniero de la laboro de CLE esprimiĝis precipe en la grotesk-absurdega kontrolmanio de ĝia centra estraro, kiu havis la ambicion – laŭ la principo de Stasi-ĉefo Mielke –, ke oni devas scii kaj kontroli ĉion, kio okazas en la lando, do ankaŭ en la Esperanto-movado. Ĉi tiu kontrolavido, kiu estis ligita kun ĉikanado de aktivuloj, nature kongruis kun la integra logiko de la kontrolsistemo de la paranoja komunisma Stasi-ŝtato. Tri epizodoj el la jaroj 1969 kaj 1980 ilustras tiun karakterizan problemon.

Post la tiel nomata „Praga printempo“ de 1968 oni aparte okupiĝis pri la ligoj al Ĉeĥoslovakio por ´protekti´ la esperantistojn de GDR kontraŭ „damaĝaj influoj“. Ĉi tio tamen ne ĉiam sukcesis, kiel pruvas la konfidencaj informoj al la „organoj de la sekureco“, kiujn verkis iu laŭnome ne konata raportanto en februaro 1969, laŭ kiu „esperantistoj el Ĉeĥoslovakio vojaĝas kiel turistoj al Germana Demokratia Respubliko kaj klopodas neanoncite eniri la laborgrupojn de la Germana Kulturligo por fari sian propagandon. ...“

Post kiam en februaro 1969 tri esperantistoj el Ĉeĥoslovakio restadis en Dresdeno, kie onidire unu el ili partoprenis sen invito la grupan vesperon de la Distrikta Laborrondo, estis raportite, ke la gasto uzis la vesperon por disvastigi „amasan kontraŭ-revolucian propagandon“ kaj priskribis la kvin socialismajn ŝtatojn, precipe Sovetunion, kiel „okupantojn“. La okazaĵo, kiu estis pritaksita en la distrikta sekretariejo de la Kulturligo, havis malagrablajn sekvojn. Ĉiuj distriktaĵaj sekretarioj de GDR estis informitaj kaj petitaj ĉesigi ajnajn kontaktprovojn de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. La distrikta partikontrola komisiono eĉ malfermis partian proceson kontraŭ la ĉeestintaj GDR-aj kamaradoj en la koncerna grupvespero. Alarmo eksonoris ankaŭ, kiam ĉirkaŭ 20 ĉeĥoslovakaj turistoj havis la intencion viziti Dresdenon, Spree-arbaron kaj Potsdamon. Esperantistoj en Berlino, Potsdam kaj Radebeul estis kontaktitaj por organizi tranoktejon. La distriktaĵaj estraroj de la Kulturligo de la tri distriktoj estis avertitaj por apliki „taŭgajn rimedojn“. La sama konfidenca informo enhavis noton, ke inter ĉeĥoslovakaj esperantistoj ekzistas „dekstraj, naciismaj fortoj“, pro kio necesus intensigi la politikan kaj ideologian laboron en la Esperanto-grupoj. „La koncernaj sekurecaj organoj estis informitaj.“

En somero 1969 la konata franca esperantisto William Gilbert kaj lia edzino vizitis GDRn, kie ili estis kondukataj tra kelkaj distriktoj fare de gvidaj esperantistoj de GDR. En Ŝverino la vizito finiĝis en embaraso. En la koncerna kunveno la paro ricevis la okazon raporti pri siaj impresoj. Sed laŭ la volo de CLE tio povis okazi nur en la ĉeesto de limigita kvanto de elektitaj funkciuloj de la distrikta laborrondo. La ĝenerala publiko eksciis nenion pri tiu aranĝo, kio signifis, ke eĉ simplaj esperantistoj maltrafis la unikan renkontiĝon kun la francaj samideanoj. La partiaj funkciuloj timis, ke la francoj povus diri nedeziratajn aferojn. Fine nur kvin Esperanto-amikoj de la Kulturligo plenigis la salonon por aŭdi kion la Gilbert-oj diris. Sed la timo montriĝis vana kaj senbaza. Gesinjoroj Gilbert sciis, kion ili ŝuldis al siaj gastigantoj kaj rezigni pri kritiko. Poste Blanke parolis pri bedaŭrinda „miskompreno“ kaj kvazaŭ bedaŭris, ke oni ne invitis pli multajn homojn.

Alia, eĉ pli ridinda incidento koncernis skandalon ligitan kun iu Esperanto-faldfolio en la jaro 1980, kiu okupis la Kulturligon ĝis aprilo 1981. Temas pri iu informfolio, kiu estis verkita de Ernst Diedrich el Wolin, frato de Hans Diedrich el Ŝverino, sen konsulti la

centralon en Berlino. Ĉiukaze la afero iĝis detale diskutata okaze de la 13a Kunsido de CLE en Potsdam en decembro 1980. En tiu ĉi okazo oni konstatis „gravajn politikajn era-rojn“ en la teksto de la folio. La plua uzado de la folio, kiun oni konsideris politike nema-tura, estis malpermesita. Ŝajnas, ke eĉ Hans Diedrich, la frato de la aŭtoro de la folio, kiu ĉeestis la kunsidon, konsentis pri la malpermeso. En la folio estis i.a. skribite, ke Esperanto „helpas forigi ĉiujn rasismajn kaj faŝismajn cerbtordaĵojn (kiel efika medikamento helpas forigi abomenan doloran malsanon), ĉar Esperanto signifas interpopolan amikecon kaj pacon.“ La folio promesis, ke per Esperanto oni gajnos amikojn en multaj landoj kaj povas ĉiujare partopreni en internaciaj renkontiĝoj en diversaj socialismaj landoj. En februaro 1981 Detlev Blanke enmiksiĝis en la aferon kun malfruiĝo kaj akre kritikis la enhavon de la faldfolio. Li skribis, ke la varbmateriale ne konformas al la ideoj kaj kulturpolitikaj celoj de GDR. Precipe li kritikis, ke en la folio estis menciita Josip Broz Tito, la gvidanto de Jugoslavio, kun kiu GDR ne rilatis. Krome Blanke konsideris la palavron pri monda paco kaj interpopola kompreno „reakcia kosmopolitismo“. La aserto, ke Esperanto estas 100 fojojn pli facile lernebla ol naciaj lingvoj, estis kondamnita kiel „ridinda, tute malĝusta, nepruvebla kaj ankaŭ malutila“. Li opiniis, ke tiaj „plumpaj“ prezentaĵoj ne konformas al „nia nivelo“.

Ernst Diedrich kolere reagis al tiu atako kaj plendis ĉe d-ro Karl-Heinz Schulmeister, unua sekretario de la Kulturligo. Li defendis la mencion de Tito per la argumento, ke ĉi-lastata partoprenis la batalon kontraŭ la faŝismo. Krom tio li kaptis la okazon por plendi pri la konstanta ĉikanado de lokaj aktivuloj fare de CLE kaj levis la demandon pri la limo de la potenco de Blanke, al kiu li riproĉis, ke li vojaĝas je la kostoj de GDR al internaciaj kongresoj sen raporti prie. Krome li riproĉis al li, ke li kulpas pri malbona organizado kaj manko de distribuado de Esperanto-vortaroj. Diedrich plej malŝatis, ke Blanke kritikis lin en iu prelego ĉe la Pedagogia Altlernejo malantaŭ lia dorso kaj nomis tion intrigo. Li aldodis, ke Blanke estis plurfoje invitita al Ŝverino, sed li ĉiam trovis iun pretekston por senkulpigi sin. Sian faldfolion li defendis pro tio, ke ĝi havis certan humuron kompare kun la „ekscese-diboĉaj kaj erudiciaj klarigoj“ de Blanke. Blanke, kiu en tiaj situacioj ĉiam pretendis havi la plej finan vorton, repafis en interna skribaĵo kontraŭ la plendoj de Ernst Diedrich. En tio li uzis ĉiam la saman retorikan armilon, kiu konsistis en jena argumen-tado: Ĉar homoj kiel Diedrich (pro sankialoj) jam delonge ne plu partoprenas en centraj kunvenoj, al li do mankas kono de la „sintenoj, pritaksoj kaj principoj de CLE“. Nu, ĉar jam kun Hans Diedrich, kiu estis prezidanto de la distrikta Laborrondo Esperanto en Ŝverino, okazis malfacilaj kaj pli malpli vanaj diskutoj, Blanke perdis la paciencon kun tiuj du „solece agantaj“ fratoj, kiuj simple havis alian opinion ol li kaj volis fari proponojn kiel pli efike organizi la Esperanto-laboron. Schulmeister, kies tono kutime estis pli modera ol tiu de Blanke, parte komprenis la kritikon de Diedrich kaj parte pravigis la argumentojn de Blanke, kiu timis, ke Esperanto povus perdi la reputacion en intelektulaj medioj, kie oni nur ridus pri tiaj informfolioj. Krom tio li timis, ke la sinteno de SED povus ree malboniĝi al Esperanto. La danĝero de la glavo de Damoklo ĉiam pendis super la Esperanto-movado en GDR kaj en aliaj socialismaj landoj, se la komunistoj rimarkis iun opozician aŭ politike nekonforman tendencon en la socio. La kulpigon pri mankantaj lerniloj Blanke cetere rifuzis per la klarigo, ke CLE ne respondecas pri la distribuo de Esperanto-lernmateriale, same kiel li malakceptis la kritikon pri mankantaj raportoj pri internaciaj kongresoj, kiuj aperus bedaŭrinde kun granda malfruo en *der esperantist*. Samtempe Schulmeister laŭdis la sciencan laboron de Blanke, kiu estas „ĝenerale agnoskita“. Kun Blanke li havis partne-ron, kiu reguligis ĉiujn aferojn lige kun Esperanto en la senco de SED. Formale Schulmeister estis la ĉefo de Blanke, kiun li plejparte lasis fari, ĉar li fidis al li, kaj nur agis kiel peranto.⁵⁴ La kulpon pri mankanta lernmateriale li donis al la papera deficitito. Per siaj

⁵⁴ Ŝajnas, ke Schulmeister neniam estis menciita en *der esperantist*.

disciplinigitaj elpaŝoj, CLE (kaj poste GDREA) povis pruvi al la partio, ke ĝi havas la esperantistojn de GDR sub kontrolo kaj faras ion konkretan en sia laboro, kion la partio ankaŭ atendis de ĝi.

Perdo de la ŝtata propaganda intereso pri Esperanto

Grava parto de la Esperanto-agado de CLE/GDREA estis la propagando pri GDR, kio donis la eblecon laŭdi la socialismon kaj diskonigi la sukcesojn de la SED-politiko eksterlande. Por tiu celo en la eldonejo „Tempo en la Bildo“ aperis en Esperanto propaganda materialo en kvanto de 20 mil ekzempleroj – temis pri la libro „GDR prezentas sin“, publikigita en 1969. Laŭ Blanke ĝi estis „unu el la plej bonaj esperantaj monografioj pri la lando ĝis nun“. La plimulto estis sendita al individuaj adresoj en 53 landoj, inkluzive Francion, Nederlandon kaj okcidentan Germanion. La plej multaj reagoj venis el Pollando, Ĉeĥoslo-vakio kaj Bulgario, dum la intereso en Okcidento estis magra. Ŝajnas, ke la menciita eldo-nejo produktis kvar broŝurojn kaj kvar filmojn en Esperanto-traduko.

Sed la mem deklarataj sukcesoj estis finfine ne tiom imponaj, kiel Blanke lamentis en analizo de la jaro 1980. Ankaŭ la titoloj de la beletra aŭ fikcia literaturo kiel „Nuda interlupoj“ (1974), „Trigroŝa romano“ (1977) kaj „La perdita honoro de Katarina Blum“ (1978) ne estis reeldonitaj malgraŭ pozitiva internacia akcepto.

Ankaŭ la revueto *der esperantist*, oficiala organo de CLE/GDREA, kiu laŭ Blanke evoluis al „internacie aprezata politika revuo“, ne lasis lin kontenta, ĉar ĝi aperis tro malofte kaj estis tro maldika. Kvankam Blanke proponis duobligi la amplekson kaj ŝanĝi la forma-ton de A5 al A4, tiaj deziroj restis neplenumitaj.

Krome menciindas la famaj ‘blankaj’ Esperanto-vortaroj de *Erich-Dieter Krause*, kiuj aperis en la eldonejo „VEB Leipzig“ en 1967, 1971 kaj 1983 kaj estis vaste utiligitaj de germanaj esperantistoj en oriento kaj okcidento kaj en aliaj gemanlingvaj landoj, kvankam la vortprovizo estis limigita al la uzo en GDR.⁵⁵

La krizo, kiun CLE alfrontis en tiu tempo, estis ligita kun la fakto, ke per la fino de la diplomatia izoliteco de GDR komence de la 1970aj jaroj la SED-gvidantoj perdis la intereson pri Esperanto kiel rimedo por ekstera propagando, des pli ke oni taksis, ke Esperanto estas tro malmulte disvastigata. Kiam en intervjuo en iu GDR-gazeto de 1972 Blanke diris verŝajne ne sen fiero, ke en la mondo Esperanton scipovas du ĝis tri milionoj da homoj, la ĵurnalistino respondis per – „tio estas malmulto“. Fakte en GDR mem Esperanto estis grandparte nekonata ĉe la publiko. La fanfaraĵo de esperantistoj, ke en internaciaj Esperanto-kongresoj en socialismaj landoj partoprenas 4-5 mil homoj, ne vere impresis la partigvidantojn de GDR. Krome la ŝtataj materialaj rimedoj estis limigitaj, la financado reduktiĝis, okcidenta mono mankis por pagi kolektivajn membrokotizojn por okcidentaj Esperanto-organizaĵoj aŭ vojaĝojn de delegitoj al internaciaj Esperanto-kongresoj. La propagandaj kaj financaj prioritatoj de la ŝtato ŝanĝiĝis.

Perdo de la kontrolo kaj ekzisto-fino de GDREA kaj unuiĝo kun GEA

Kelkajn tagojn antaŭ la *Falo de la Berlina Muro* je la 9a de novembro 1989 la centra estraro de GDREA okazigis sian 5an kunsidon en Karl-Marx-Urbo, flarante la aeron de la baldaŭa politika renverso. Kvankam la komunisma GDR-diktaturo ankoraŭ ekzistis kiel suverena ŝtato, ĉi tiu respirado de la freŝa aero jam estis ebla, ĉar ekde la 18a de oktobro la

⁵⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Erich-Dieter_Krause. Post la turniĝo liaj vortaroj aperis en la eldonejoj Langen-scheidt kaj Helmut Buske en Hamurgo.

politburoo de SED estis regata de Egon Krenz kiel ĝenerala sekretario, posteulo de Erich Honecker, kiu demisiis en ĉi tiu dato. Ekde la 24a de oktobro Krenz estis ankaŭ prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro kaj ĉefo de la Konsilantaro por Nacia Defendo. Sed lia potenco daŭris mallonge, nome nur ĝis la 6a de decembro, kiam aliaj politikistoj transprenis la gvidon de GDR.

Kio koncernis la funkciulojn de GDREA, ili jam revis pri novaj perspektivoj, kiuj ĝis nun estis baritaj kaj nun povus malfermiĝi: libereco de vojaĝado, opinio/gazetaro kaj agado. Samtempe ili vidis – tute prave – danĝerojn kiel la ŝanĝon de la subvencia politiko por la asocia laboro. Ĉi tiun finan aŭ transiran fazon aŭtoro Wischendorf detale priskribis sur pli ol 20 paĝoj surbaze de trovitaj arkivaj dokumentoj.

Do oni kredis, ke la Esperanto-movado de GDR povus kaj devus esti reorganizita. Detlev Blanke estis taskita ellabori strategion „Pri la estonteco de la Esperanto-Asocio en la Kulturligo de GDR“ por doni strukturojn al la ideoj, kiuj baziĝis sur la supozo, ke la ekzisto de la komunisma GDR-diktaturo ne estas en danĝero pro la falo de la Muro.

Blanke venis al la konkludo, ke la membreco de la Esperanto-movado de GDR en la Kulturligo montriĝis utila, kaj skizis scenarojn por la estonto. Se GDREA sendependiĝos, ĝi povus perdi sian signifon. En la malverŝajna okazo, ke la Kulturligo forĵetos la asocion, oni devus trovi novan partneron kaj garantii la propran financadon. Antaŭveble la GDR-distriktoj estos likviditaj kaj la malnovaj orientgermanaj landoj restariĝos, kio kondukos al la formado de sendependaj landaj organizoj. Tio jes fakte okazis.

Koncerne la estontan ideologi-politikan percepton, apartan mencion meritis la punkto 8.11, kiu emfazis la „eblojn“ rekonsideri la historiografion de la Esperanto-movado,⁵⁶ ekzemple la repretakson de SAT, la eviton de dogmema kaj unuflankeca rigardo, pli grandan konsideron de la nekomunismaj flankoj, la malferman prezenton de la stalinisma persekut-problemo sen tabuoj kaj la prilaboradon de la „burĝa heredaĵo“. Kiel pensis la unuopaj membroj de la estraro, kiu plimulte konsistis el SED-membroj, pri tiuj temoj, ne estas dokumentite. En la diskuto oni sugestis resti en la Kulturligo kaj konsideris, „ke iam ĝi ne plu utilis al ni“. La aktuala estraro aŭ komitato de GDREA ekzistis kaj estis anstataŭigita per nove elektitaj membroj. La malnova prezidanto Heinel ne ĉeestis, sed sendis leteron al la kunvenantoj, en kiu li esprimis sian deziron daŭrigi la kunlaboron en la estraro. Post kiam oni interkonsentis pri sep membroj de la estraro, elektitaj estis d-ro *Ronald Löttsch* (prezidanto), *M. Arnold* kaj *J. Schulze* (vicprezidantoj), d-ro *Detlev Blanke* (sekretario), *W. Pfennig*, *D. Kraus*, *U. Becker* (membroj).

Dum la kunveno estis anoncote, ke la junulara asocio petis registriĝon kiel „Esperanta Junulara Asocio“ ĉe la Oficejo por Junularo kaj Sporto.⁵⁷

La protokolo de la kunveno en Neubrandenburg montris, ke la erozia procezo en la Kulturligo jam sufiĉe progresis tiutempe. La distriktaj organizoj akiris agad-liberecon, kiu antaŭ kelkaj monatoj ne estis pensebla. Tamen decido pri kompleta organiza apartiĝo de la Kulturligo ne estis sur la tagordo kaj klopodoj por konservi GDREAn ne estis preterlasitaj.

⁵⁶ Ĉi-rilate Blanke rapide agis kaj jam en la unua numero de *der esperantist* post la falo de la muro publikigis novtipan aŭ reviziitan skizon de la historio de la Esperanto-movado en GDR kaj alian komenton pri la nova situacio, en kiu li i.a. kon-fesis, ke li „ne sciis, ke GDR estis gvidata de potencavidaj krimuloj“.

⁵⁷ La ĉefa aktivulo de la tiama Esperanto-Junularo de GDR nomiĝis *Torsten Bendias*, kiu rajtis, kiel ano de la „vojaĝa taĉmento“ de GDR, reprezenti sian organizaĵon en junularaj Esperanto-kongresoj en Jugoslavio (1988) kaj Nederlando (1989). Post la unuiĝo de la Esperanto-Junularo de GDR (GDREJ) kun Germana Esperanto-Junularo (GEJ) li fariĝis estrarano de GEJ pri eksteraj rilatoj. Li verkis legindan libron pri la Esperanto-junularo de GDR, kiu aperis en 2011 en la Lit-eldonejo en Berlino (https://eo.wikipedia.org/wiki/Torsten_Bendias).

La centra estraro de GDREA tamen decidis, ke ĝi volas esti sendependa en la estonteco. Sed tio montriĝis iluzio ĉiukaze, ĉar la unuiĝo de GDREA kun GEA estis nura demando de la tempo kaj jam estis atendata. Intertempe stariĝis kontaktoj kun la okcidentgermana Esperanto-Asocio, dum kiuj tiu demando verŝajne estis aludita aŭ diskutita. Kvankam la GDR-parlamento decidis reenkonduki la landojn nur en junio 1990, landaj organizoj restariĝis. En la Esperanto-movado esperantistoj en iuj landoj jam estis preparintaj sian propran landan asocion, precipe en Turingio, Saksio-Anhaltio, Saksio, Meklenburgo-Antaŭpomerio kaj Brandenburgio.

Subite Blanke kondukis kiel verva apostolo de la unuiĝo de GDREA kaj GEA. Ĉio devis iri tre rapide. En deklaraĵo al la prezidanto de GEA, d-ro Wolfgang Schwanzer, Blanke parolis pri unika okazo, pri „espereble brila ĉapitro“, kiu malfermiĝos per la kunfandiĝo de la germana Esperanto-movado. Nature ĉi tiu kunfandiĝo povus funkcii nur surbaze de „egalrajta partnereco“, Blanke patose emfazis. La ideo pri la etapoj de la unuiĝo de la du asocioj iĝis pli klara. Estis konstatite, ke „ambaŭ asociaj prezidantoj estas tre kontentaj pri la objektiva, konstrua kaj amika etoso en la kunvenoj“. Oni parolis pri „nova komuna spirito“. La esperantistoj de GDR estis alvokitaj malfermiĝi al novaj kontaktoj kaj agadoj. Samtempe oni konsilis eviti rapidajn agadojn de unuopaj grupoj aŭ landaj asocioj. Oni volis baldaŭ renkontiĝi por ellabori asocian Statuton por la transira periodo al la unuiĝo. Ankoraŭ ne ekzistis interkonsento pri la nomo de la nova asocio, sed oni konsideris, ke pro kialoj de la tradicio la nomo Germana Esperanto-Asocio (GEA) povus resti, kvankam laŭ Blanke estus dezirinde havigi al ĝi novan nomon. Ŝajnas, ke Schwanzer subtenis la postulon de Blanke pri konservado de la ekzistantaj strukturoj de GDREA. La efektvigo de la unuiĝo mem estis antaŭvidita okaze de la 69a Germana Esperanto-Kongreso de majo 1991 en Munkeno.

Komence de oktobro 1990 Blanke parolis pri „tre fruktodona intertraktado kun la prezidio de Germana Esperanto-Asocio“. La kohereco de la orientgermanaj asocioj dume disfalis, kiam en Saksio-Anhaltio estis fondita aparta Esperanto-Ligo (ELSA), kiu deklaris sin sendependa disde la Kulturligo kaj GDREA. Ronald Löttsch, la nova prezidanto de GDREA, reagis kun ĉagreno pri tiu fondo, pri kiu li eksciis hazarde kaj kiu okazis sen invitita reprezentanto de la GDREA-prezidio.

Sed ene de GEA okazis distanciĝo disde GDREA kaj precipe de Blanke, kiu pravigis sian sintenon kaj politikan pozicion, kiun li defendis en GDR, reemfazante la „egalrajtecon de la partneroj“ kaj volante eviti politikan aligon de GDREA al GEA laŭ la modelo de la germana reunuiĝo, kiel ĝi okazis la 3an de oktobro 1990, kiam GDR aliĝis al FRG.

La Kulturligon de GDR Blanke laŭdis kiel organizaĵon, en kiu ekzistis „konsiderinda libereco por liberala laboro“ (sic).⁵⁸ Fari akuzojn estus „simple maljuste“. Krome li laŭdis la „sukcesan rehabilitadon de Esperanto en GDR post Hitlero kaj Stalino“ (sic) – kvankam inter 1949 kaj 1965 ĝia publika vivo estis praktike malpermesata en GDR – kaj kritiki aliajn, kiuj laŭ li tordis la historion, per la atentigo, ke „ni havis gradon de socia akcepto, kiu estis nekonata en multaj okcidentaj landoj.“ Ke tiu „grado de socia akcepto“ estis nur pseŭda, fakte falsa, ĉar, kiel oni scias, la komunisma partio de GDR ne ŝatis Esperanton, pri tio Blanke silentis, same pri la alta politika prezo, kiun tiu „agnosko“ havis. En tipa maniero de sovetiaj komunistoj (leninistoj-stalinistoj) Blanke inversigis ĉiujn faktojn precipe kiam ili kontraŭdiris la interesojn kaj dogmojn de la reganta komunisma ideologio. Koncerne la socian agnoskon de Esperanto, Blanke pretervidis aŭ

⁵⁸ El ‘okcidenta’ vidpunkto tiu aserto certe estis troigita, sed sen dubo en la Kulturligo ekzistis niĉoj, kiujn homoj kiel Blanke kaj aliaj povis utiligi por siaj privataj ŝatokupoj kiel Esperanto kaj interlingvistiko, kiujn li povis efektivegi kiel lojala SED-ano kadre de la Kulturligo.

ne pretis konfesi aŭ agnoski, ke SED estis devigita rekonsideri kaj permesi aŭ toleri Esperanton i.a. post pro-testoj kaj plendoj flanke de kuraĝaj kaj insistemaj esperantistoj kiel Werner Bernhardt, Alfred Bachmann, Johannes Schmidt, Kurt Weber, Franz Tischer, Hellmut Täubner, Ger-hard Schiffner, Ruth Müller, Ludwig Schödl, Karl Maier kaj aliaj honorindaj samideanoj de la antaŭ-1965-a GDR-periodo, kies meritojn por Esperanto li subtaksis kaj prisilentis, kaj kiujn li ne hezitis denunci kaj misfamigi ĉe la partiaj organoj kaj ĉe la Stasio kiel sekte-majn strangulojn, ĝenajn kverelemulojn kaj – plej malbone – politike malfidindajn elemen-tojn, dum aliflanke li laŭdegis kaj admiregis publike funkciulojn, kiuj estis lojalaj, malkri-tikaj, obeemaj, silentemaj, fanatikaj aŭ hipokritaj SED-uloj aŭ eĉ kunlaborantoj de la Stasio.

Tamen Blanke almenaŭ rimarkis certan demokratian deficiton en GDR,⁵⁹ kvankam la centra estraro de GDREA estis laŭ li „demokratie elektita organo“, en kiu regis „malferma kaj tolerema etoso“.⁶⁰ Laŭ li ne „partia aparteneco kaj politikaj opinioj“ estis decidaj, sed „kompetenteco kaj preteco al sendependa agado“. Sed laŭ tio, kion ni scias, ĝuste partia aparteneco kaj politikaj opinioj estis prioritataj kaj decidaj, dum sendependa agado ne estis dezirinda. Rigarde al la politika rolo, kiun Blanke ludis dum jardekoj en GDR, liaj eksplikoj kaj pravigoj post la politika turniĝo devas esti konsiderataj kiel malkredindaj, hipokritaj, cinikaj kaj parte nete mensogaj, same lia pretendo, ke li estis batalanto kontraŭ „antaŭjuĝoj kaj malfido“, ktp.

Malgraŭ rezervoj, la kritiko pri Blanke evidente ne ludis tro grandan rolon kaj antaŭ ĉio ne devis negative influi aŭ prokrasti la unuiĝon de GDREA kaj GEA. Pli grava estis jena formala problemo: Ŝajnas, ke ĉe la reformita Kulturligo mankis jure deviga pruvilo por konfirmi la membrecon de GDREA laŭ la normoj de FRG, kiu estis supozeble necesa por povi akcepti la esperantistojn de GDR kiel membrojn de la unuigita asocio. Sed ankaŭ tiu kurioza burokratia problemo povis esti iel solvita.

Ĉefa obstaklo tamen fariĝis aŭ restis Detlev Blanke mem, kiu komencis enmiksiĝi kaj dikti la tonon de la unuiga procezo per diversaj kritikaj komentoj, anoncoj, sugestoj kaj minacoj laŭ la maniero de ĉantaĝa diktatoro.⁶¹

Antaŭ la unuiga konferenco en Munkeno Blanke verkis tekston por la asocia gazeto *Esperanto aktuell* kun la titolo „Kelkaj problemoj kaj kelkaj polemikoj pri la unuiĝo“, en kiu li plendis, ke „ambaŭ estraroj origine intencis fari la aferojn alimaniere ol en la granda politiko“, nome laŭ la principo de la egalrajta partnereco. Tio konformus al la „legitima memestimo de la GDREA-anoj“, finfine „GDREA ne estis kaduka asocio“, sed tre sukcesa organizo „por fruktodona asocia laboro“. Krome Blanke konstatis, ke „plena egaleco estus ebla nur, se ambaŭ asocioj estus malfonditaj kaj se nova asocio estus fondita. Por ne postuli tiun ĉi burokratie tre temporaban proceduron de GEA, GDREA faris grandan paŝon malantaŭen. Ĉi tio ne estas aprezata de ĉiuj GEA-anoj.“ GDREA proponis la nomon „Germa-

⁵⁹ Lia broŝuro „Esperanto kaj socialismo? Pri la movado sur la "alia flanko"“ estis verkita kun la celo pravigi la sukcesojn kaj atingojn de la agado de GDREA. Kvankam alude ĝi enhavas kelkajn kritikajn konsiderojn pri la komunisma GDR-sistemo, kompreneble mankas objektiva kaj honesta prezento de la 'tuta vero' pri la Esperanto-movado en GDR laŭ la maniero kiel ĝin prezentis ekzemple aŭtoro Wischendorf.

⁶⁰ Blanke rakontis la fabelon pri la demokratie elektita centra estraro de CLE/GDREA. En la ĉefteksto estis priskribite, laŭ kiuj kriterioj tiuj estraranoj estis elektitaj kaj konfirmitaj de la partiaj organoj. En la koncernaj konferencoj tiuj kandi-datoj estis sen komento (aŭ kritiko) kaj bloke konfirmitaj. Pri demokratio en GDR, kiu estis regata de la stalinisma ludmaniero de la socialismo, oni ne povis paroli, ĉar temis pri propaganda farso de komunismaj falsantoj, mensogantoj, demagogoj kaj moskvaj marionetoj. La unua kaj sola elekto, kiu okazis en CLE/GDREA laŭ demokratiaj reguloj aŭ normoj, estis tiu dum la kunsido de la centra estraro de GDREA la 19an de januaro 1990 en Neubrandenburgo.

⁶¹ Mi memoras, ke iuj e-istoj de soclandoj ironie nomis lin „Führer“ (fjurer) kaj „inkvizitoro“.

na Esperanto-Ligo“ (en Esperanto), sed ĉi tiu propono ne trovis apogon. Blanke reagis per kelkaj „modestaj proponoj pri ŝanĝo de la statutoj kaj pri la unuiga kontrakto“ kaj minacis, ke la unuiĝo-kontrakto ne povus esti subskribita, se ankaŭ tiuj proponoj estus rifuzitaj. Krome Blanke ankaŭ vidis la harmonian kuniĝon en danĝero pro „arogantaj pritaksoj de la pasinteco de GDREA kaj kelkaj el ĝiaj funkciuloj“, precipe li mem estus celo de ĉi tiaj atakoj. Temis precipe pri la konflikto kun la esperantistoj de Saksio-Anhaltio, kiuj decidis rezigni pri plua kunlaboro kun GDREA.⁶²

De tiuj kritikantoj la gvidantoj de GDREA estis konsiderataj kiel „konvinkitaj adeptoj de la politika sistemo“ en la komunisma GDR-diktaturo; ili atentigis, ke „la oficiala Esperanto-asocio de la iama GDR klare kaj senrezerve subtenis la iaman SED-reĝimon“, kaj kvazaŭ miris, ke „eĉ post la politika ŝanĝo en la lando la estraro de GDREA konsistas el la samaj homoj“. Laŭ ili neniu el tiuj funkciuloj devus okupi oficialan pozicion en la nova tutgermana Esperanto-Asocio. Dum Blanke ne eniris la novan estraron, kandidatoj el GDR estis Ronald Löttsch, Till Dahlenburg kaj Ulrich Becker.

Alia grava temo estis la financoj. GDREA restis praktike sen mono kaj GEA planis altigi la jaran kotizon de 20 GM al 30 GM por ĉiuj novaj membroj. Tio kolerigis la orientgermanajn esperantistojn, kiuj riproĉis al GEA, ke ĝi kondukas kiel „malgranda negocisto“, tiel ke tio jam „doloras“. Schwanzler konfesis, ke tiu ĉi aliro estas „iom bedaŭrinda“ kaj „eble ne plene konsideris la sentojn de multnombraj Esperanto-amikoj en orienta Germanio, precipe en la socie streĉita situacio.“ Li klarigis, ke la ĝisnuna jarkotizo estis „ekstreme malalta“ kompare kun aliaj asocioj. Li argumentis, ke GEA ne povas malhavi novajn enspezojn, krome temas pri kontribuo al la kotiza egaleco. La mesaĝo de la GEA-prezidanto tamen „kore bonvenigis“ la orientgermanajn esperantistojn kiel „partneron en la nova tutgermana Esperanto-Asocio („Bund“), kiun ni volas kune formi efike kaj solidare“.

Resumo, konkludoj

Kun aŭtoro Hartwig Wischendorf eblas konklude resumi la ĉi tie prezentitan historion de la Esperanto-movado de la komunisma GDR-diktaturo, ke ĉi tiu movado prezentis specialan problemon por la partio SED, kies signifo estis komence subtaksita de ĝi. Kiel menciite en la komenco de ĉi tiu recenzo, la „Reguligo pri transigo de popolartaj grupoj kaj popoloedukaj asocioj al la ekzis-tantaj demokrataj amasorganizoj“ de la 12a de januaro 1949 koncerne ankaŭ grupojn de artefaritaj planlingvoj kaj Ido- kaj Esperanto-lingvajn angulojn, kio signifis, ke esperantistaj organizaĵoj fariĝis praktike malpermesitaj. La kialoj de la speciala traktado de tiaj grupoj kaj organizaĵoj situis en ideologiaj konsideroj kaj diferencoj. La „kosmopolitismaj“ ideoj de la malnovstilaj esperantistoj ne kongruis kun la marksisma-leninisma mondkoncepto de SED. Krome la granda nombro da kontaktoj kun okcidenta Germanio kaj aliaj kapitalismaj landoj estis dorno en la okulo de la SED-funkciuloj kaj perceptata kiel minaco. Ili kredis kaj timis, ke la klasmalamiko klopodas influi la GDR-anojn, eĉ ebligante spionadon. Ricevi revuojn el eksterlando kaj partopreni kongresojn en aliaj landoj ne estis dezirinde por la flanko de SED, kiu malfidis ĉiujn tiujn presaĵojn, agadojn kaj vojaĝojn. Kvankam multaj Esperanto-amikoj estis membroj de SED, la partiestroj ne estis konvinkitaj pri ilia politika fidindeco. Oni supozis, ke la „burĝaj fortoj“ superas en la Esperanto-movado aŭ almenaŭ havas grandan influon. Ĉar la divido de la socio laŭ klasoj estis fremda al la Esperanto-movado, la komunistoj timis, ke mankos distan-ciĝo disde „burĝaj-reakciaj vidpunktoj“. La Esperanto-movado, kiu denove formiĝis

⁶² Ĉi-rilate vd. ankaŭ la historion de https://eo.wikipedia.org/wiki/Saksa_Kuriero, en kiu la ŝvelanta konflikto kun Detlev Blanke nature ne estas menciita.

post la disfalo de la nacisocialismo, estis rigardata de SED kiel ĝena faktoro en la konstruo de la socialismo.

Celante la internacian diplomatian rekonon aŭ agnoskon, la komunisma GDR-diktaturo restis politike izolita dum longa tempo kiel rezulto de la t.n. „Hallstein-doktrino“. La partiaj gvidantoj verŝajne timis perdi la reputacion de GDR en eksterlando, se diskoniĝas, ke ili malpermesas kaj subpremas tiajn sociajn movadojn (kiel Esperanton). Do supozeble ili venis al li konkludo, ke necesas ŝanĝi la validan leĝan statuson. En aŭgusto 1961 ili faris unuan paŝon kaj deklaris la reguligon de 1949 sensignifa. Tamen tio ne signifis kompletan nuligon de la asocia malper-meso. Ŝajnas, ke SED denove mistaksis la situacion, ĉar ĝin atingis novaj plendoj kaj protestoj flanke de esperantistoj kontraŭ tiu malklara reguligo. Finfine la partio trovis elegantan aŭ ruzan solvon por la Esperanto-movado kaj permesis al ĝi ekzisti sub ŝtata kaj partia kontrolo kadre de la Kulturligo de GDR, pere de kiu oni esperis, ke oni povas eĉ pli efike kontroli la Esperanto-movadon kaj ties anojn, kiuj ŝatis vojaĝi al Esperanto-kongresoj en eksterlando kaj ricevi Esperanto-presaĵojn el aliaj landoj. Tiuj nekontrolablaj agadoj maltrankviligis la paranojajn SED-gvidantojn, kiuj volis eviti tiajn kontaktojn kaj preferis kontroli ĉion kaj ĉiujn ĉefe pere kaj helpe de la organoj de la Ŝtata Sekureco.

Dum la starigo de oficiala Esperanto-sekcio en la Kulturligo de GDR (CLE) okazinta la 31an de marto 1965 en orienta Berlino estis por SED-proksimaj Esperanto-funkciuloj kiel Detlev Blanke kialo por triumfi, festi kaj fieri, pli sobraj analizantoj de la Esperanto-movado de GDR kiel Hartwig Wischendorf interpretis ĝin kvazaŭ kiel mortateston de la Esperanto-movado en GDR, kiu perdis siajn liberecon kaj sendependecon. Ĉar la oficiala publika bildo pri la Esperanto-movado de GDR apenaŭ kongruis kun la realeco, kiu kaŝiĝis malantaŭ tiu bildo, tiu realeco devis esti kiel eble plej bone kaŝvualita aŭ kaŝvestita pere de brila propagando, kaj la ekstera rigardo malantaŭ la kulisojn devis esti barita. Por kaŝi la veran situacion servis la severe cenzurata kaj manipulata politika propaganda organo *der esperantist*, kiu devis montri la oficialan kaj idealan vizaĝon de la Esperanto-movado de GDR.⁶³ Tiuj presorganoj, kiuj aperis en GDR, eĉ parte sukcesis blindigi la legantojn en oriento kaj precipe okcidento, kie oni admiris la ‘unikan’ Esperanto-agadon en GDR, kredante kion Blanke skribis pri sukcesoj kaj atingoj. Sed pro manko de informoj ili ne rimarkis, ke ekzistas ankoraŭ alia flanko de la realeco, kaj ne konsciis, ke en si mem temas pri profunde malhonesto informado, ĉar negativajn punktojn kaj problemojn oni simple ne menciis – do objektiveco mankis. Aliflanke ŝajnas, ke tiuj legantoj ankaŭ ne aparte interesiĝis pri negativaj punktoj, problemoj kaj raportoj, ĉar ili interesiĝis nur pri sukcesoj kaj atingoj de Esperanto. Aliaj pli skeptikaj cerboj eble rimarkis la propagandecan karakteron de tiuj publikaĵoj, sed ne kritikis ilin por eviti damaĝi la Esperanto-movadon en GDR aŭ ofendi meritajn aktivulojn. Aliaj restis indiferentaj kaj pasivaj, ĉar la sistemo ne estis ŝanĝebla. Publika (mem)kritiko en la presorganoj de la tuta Esperanto-movado ĉiukaze praktike ne ekzistis, cetere same kiel hodiaŭ. Praktike ĉio konsistis el propagando, de kongresoj ĝis fakliterturo. Nature la socialismaj landoj, kiuj prisilentis ĉion negativan laŭ la rusa maniero, estis mondaj ĉampionoj de la politika propagando, kiu estis tre potenca kaj de kiu neeviteble ankaŭ Esperanto estis kaptita.

Kvankam la gvidaj oficialaj esperantistoj de GDR, precipe Detlev Blanke, kutimis fanfaronadi pri la „unika apogo“ de la Esperanto-movado fare de la socialisma ŝtato, la materia kaj politika subteno de la esperantistoj fare de SED en la praktika realeco estis limigita kaj tre modesta. Ĝi malpliĝis rimarkinde kiam, meze de la 1970-aj jaroj, la komunisma GDR-diktaturo iĝis diplomatie pli kaj pli agnoskita de la nesocialisma ŝtataro. Tiu evoluo kondukis al la konkludo, ke SED ne plu konsideris necese financi la presadon

⁶³ Vd. http://www.planlingvoj.ch/Studie_DDR_der-esperantist.pdf

kaj amasan dissendadon de multekosta propaganda materialo en Esperanto al eksterlando, kie la intereso pri tia materialo estis magra. Do SED entute perdis sian intereson pri Esperanto, kies aktivulojn ĝi ankoraŭ toleris, ĉar ili estis sub ĝia kontrolo. En raportoj kaj analizoj de CLE la malpli-iĝanta ŝtata financado de Esperanto estis priplorata, sed sen sukceso. Ankaŭ la administra nivelo en la Kulturligo, kiu okupiĝis pri Esperanto, estis nesufiĉa rilate personajn kaj materialajn rimedojn, kaj tio malmulte ŝanĝiĝis dum la tempoj.

La estraranoj de CLE/GDREA konsistis el homoj, kiuj estis kaj fake lertaj esperantistoj kaj politike fidindaj partianoj. Kelkaj el ili kiel Rudi Graetz kaj Detlev Blanke, la du plej superaj Esperanto-funkciuloj de la komunisma GDR-diktaturo, eĉ funkciis kiel „neoficialaj kunlaborantoj“ de la Popola Polico kaj de la organoj de la Ministerio por Ŝtata Sekureco (MŜS), kiu estis ligi-ta kun la sovetia KGB kaj aliaj sekurecaj servoj de la socialisma bloko. Ilia tasko estis gvidi, observi, kontroli kaj disciplinigi la movadon kaj raportoj al la organoj de la ŝtata sekureco pri ĉio okazanta lige kun Esperanto, inkluzive la politikan sintenon de la aktivuloj. Kiu faris problemojn al CLE/GDREA, tiu estis senkompatate forpuŝita kaj eliminata el la oficialaj strukturoj de la Esperanto-movado, kiu estis sekcio aŭ fako de la Kulturligo de GDR, kiu estis kontrolata de SED. Tiel establiĝis skemo laŭ amikoj kaj malamikoj, laŭ kiu ekzemple Detlev Blanke orientiĝis eĉ ankoraŭ longe post la falo de la komunismo en 1989 kaj post la germana unuiĝo, kiu ampleksis ankaŭ la kunfandiĝon de GDREA kun GEA. La rolo de la polico kaj organoj de la sekretaj servoj restis strikte tabuita temo, kiu estis kaŝvualita per laŭta rozkolora propagando pri sukcesoj kaj atingoj. Dumvive la „neoficialaj kunlaborantoj“ de MŜS prisilentis ĉi tiun aspekton de sia Esperanto-agado kaj kvazaŭ kun-prenis ĝin kiel privatan sekreton en sian tombon, ĝis kiam esploristoj malkovris ĝin en la arkivoj, kie la savita sekreta materialo de la Stasio konserviĝis kaj iĝis konsultebla kaj dis-ponebla al la interesata publiko.

En kiu mezuro ĉi tiu GDR-epizodo damaĝis aŭ helpis al la Esperanto-movado, estas demando kun du flankoj kaj dependas de la (politikaj) vidpunktoj de homoj, kiuj apogis aŭ kritikis tiun evoluon. Pro la diverĝeco de opinioj definitiva pritakso apenaŭ eblas. Nature la GDR-epizodo pli kaj pli distanciĝas de la tempo, kiam ĝi okazis kaj aktualis, kaj la aktivularo de tiu tempo pli kaj pli elmortas. Pro tio estas grave konservi la memoron kaj dokumenti kio vere kaj reale okazis ekster la oficiala propagando, kiu falsis la kompletan bildon. Oni devas konstati, ke en la Esperanto-movado mem la intereso pri la sincera prilaborado de tiu historio estas malforta. Tio nature malhelpas la plenan komprenon pri la okazaĵoj de la tiama tempo.

Unu mito, kiu obstine konserviĝis ĝis nun, tamen devas esti reviziita. Temas pri la mito (kaj legendo), laŭ kiu la socialisma ŝtato interesiĝis pri Esperanto kaj subtenis ĝin en unika maniero. La ŝtataj propagandistoj de la Esperanto-movado en tiuj landoj laŭte emfazis tiun aserton, ĉar unue ili devis konstante konfirmi sian lojalecon al la reganta komunisma reĝimo, al kiu ili devis estis dankemaj, ke ĝi toleras la esperantistojn (kaj ne subpremas aŭ persekutas ilin kiel dum la tempo de Hitler kaj Stalin). Due ĉio, kio okazis malantaŭ la kulisoj, devis esti kaŝita kaj kaŝvualita antaŭ la publiko, kiu ekzemple ne devis scii, ke la Esperanto-movado en tiuj landoj estas politike kontrolata kaj observata de la organoj de la ŝtata sekureco, por eviti kritikon kontraŭ la reĝimo, kiu timis senkreditiĝon.

Kiel montras ankaŭ la ekzemploj de aliaj komunisme regataj landoj: La Esperanto-movado estis permesata, kondiĉe ke ĝi pretas esti kontrolata de la komunisma partio, ke ĝi akceptas fari politikan propagandon por ĝi kaj ke ĝi ne kritikis la socialismon, la regadon de la komunisma reĝimo kaj la politikan rolon de Sovetunio.

Dum la komunistoj en Pollando, Hungario kaj Bulgario iusence trovis sian ĝojon pri la Esperanto-movado de la propra lando, kiu estis konsiderata kiel esenca kontribuo al la akcelo de la turismo, retoriko pri paco (kaj kontraŭ-faŝismo) kaj forigo de la internacia

izoliteco (kongresoj), kio faris ĝin simpatia, dezirinda kaj apoginda, la potencoj de SED ne interesiĝis pri la prospera evoluo de Esperanto kaj de la Esperanto-movado en GDR. La kialoj kaj motivoj estis menciitaj kaj skizitaj en ĉi tiu recenzo. Kiel ni memoras, unu el la reprezentantoj de la politika burokratia aparato klarigis la rigidan negativan sintenon rilate al Esperanto per la aparta (geo)politika situacio de la komunisma GDR-diktaturo. Povas esti. Sub la sociaj kaj socipolitikaj kondiĉoj de la „reale ekzistanta socialismo“ en GDR, kiu estis stalinismo en iom pli milda formo, Esperanto ne plu povis esti praktikata laŭ la originala maniero kaj nur per adaptiĝo de la bazaj ideoj kaj celoj al la nova politika realo. Kosmopolitismo kaj „interna ideo de Esperanto“ estis rifuzitaj kaj kondamnitaj, la pactemo estis reinterpreterita, uzurpita kaj misuzita por politika propapagando en la senco de la komunisma partio.

La Esperanto-amikoj en GDR povis labori kaj agi nur en organizita kadro, subigante sin al la interesoj kaj reguloj de SED, kiujn ili devis nepre respekti. Tial multaj esperantistoj ne volis kunlabori en la Kulturligo, ĉar ili rifuzis agadi sub la politika kontrolo kaj premo de la komunisma reĝimo, kiel ekzemple Wilhelm Wieschendorf, la patro de aŭtoro Hartwig Wischendorf.⁶⁴ Verŝajne multaj esperantistoj, kiuj aktivis antaŭ 1933/45, tute rezignis pri Esperanto. Tiuj, kiuj volis restarigi la antaŭan Esperanto-movadon, alfrontis seriozajn problemojn kaj kontraŭstaron kiel montrite laŭ kelkaj ekzemploj. Aliaj verŝajne kolektiĝis en malgrandaj privataj rondoj. Pli precizaj informoj pri tiu flanko de la Esperanto-movado mankas. Necesas ankaŭ klare konstati, ke la allogo de Esperanto suferis en GDR. Ekzistis grava problemoj kun mankantaj junaj talentoj kaj kunlaborantoj, kiu estis regule menciitaj en la lamentaj raportoj de CLE/GDREA. Sed ĉi tiu problemoj estis ĝenerale konata kaj karakteriza por la internacia Esperanto-movado, precipe en landoj, kie la loĝantaro estas plejparte maljuna (kiel en Eŭropo).

Evidentiĝis ankaŭ, ke la konsisto de la esperantistaro en la distriktoj kiel membroj de la Kulturligo iom post iom grave ŝanĝiĝis, ne nur pro biologiaj kialoj, sed antaŭ ĉio pro la personara politiko de SED, kiu forpurigis kritikemajn aŭ „kverelemjn“ samideanojn kaj anstataŭigis ilin per pli lojalaj kaj obeemaj funkciuloj (kiel ekzemple en Ŝverino aŭ en la kazoj de Schödl, Maier k.a.). Oni povas supozi, ke multaj esperantistoj, kiuj estis organizitaj en la Kulturligo, konis neniun alian realecon kaj aranĝis sin kun la validaj kondiĉoj kaj cirkonstancoj regantaj en la komunisma GDR-diktaturo, same kiel la ĝenerala amaso de GDR-civitanoj precipe post 1961. Sendube nemalmultaj el ili adaptiĝis kaj ankaŭ pretis identiĝi kun la sociaj tas-koj, kiujn SED donis al ili, ĉar alternativo ne ekzistis.

* * *

Jen prezentiĝis la vera historio de la Esperanto-movado en GDR en ĝia ĝenerala evoluo kaj en ĝiaj detalaj facetoj.

Dank´ al la kompetentaj esploroj kaj publikigo de Hartwig Wischendorf, kiu verkis probable la plej gravan, objektivan kaj interesan libron pri la historio de la Esperanto-movado en GDR, pri kiu ĝis nun ekzistis ĉefe mitoj kaj legendoj kaj falsaj imagoj, ĉar ĝi estis skribita de GDR-aj Esperanto-propagandistoj, kiuj servis al la komunisma ŝtato kaj prisi-lentadis multajn esencajn faktojn kaj facetojn, sen kiuj oni ne povus komplete kom-preni la tutajn funkciadon kaj rolon de la Esperanto-organizo en GDR post la dua mondmilito kaj precipe inter 1965 kaj 1990, kiam ekzistis politike kontrolata formo/strukturo de tiu organizo.

⁶⁴ Atentu, ke la patro uzis la nomon Wieschendorf, dum la filo nomis sin Wischendorf.

La fontoj kaj dokumentoj, kiujn necesas konsulti por koni la tutan veron, troviĝas en la arkivoj pri la Ministerio por Ŝtata Sekureco de GDR, en kiuj ili povis esti konservitaj post la politika turniĝo en GDR de 1989/90, kaj kie ili estas parte alireblaj por la interesata publiko. Certe ekzistas ankoraŭ aliaj arkivaĵoj, inter kiuj estas tiaj, kiujn, laŭ Wischendorf, la vidvino de Detlev Blanke malhelpas al esplorantoj konsulti, aŭ tiuj de CLE/GDREA mem. Aliaj interesaj dokumentoj troviĝas krom en centraj eble ankaŭ en urbaj kaj landaj arkivoj, kie ili atendas sian esploron. Oni devas konstati, ke en la Esperanto-movado oni daŭre kaj obstine prisilentadas la politikan rolon kaj precipe la Stasi-kunlaboron de konkretaj kaj konataj Esperanto-aktivuloj, kvankam la koncernaj faktoj intertempe estas konataj kaj priaj raportoj estis publikigitaj (en la interreto).⁶⁵

La libro de Hartwig Wischendorf, kiu permesas rigardi malantaŭ la fasadon de la oficiale rakontitaj ekzisto kaj agado de CLE/GDREA, esence korektas la ĝisnunan rozkoloran bildon pri la Esperanto-movado en GDR, kiu estis pentrita de Detlev Blanke kaj aliaj „historiistoj“ kaj kredata de granda parto de la cetera Esperanto-movado, kiu siatempe tondre aplaudis la „sukcesojn“, „progresojn“ kaj „rekordojn“ de la Esperanto-movado en la socialismaj landoj. Per milita terminologio oni povas diri, ke la libro de Wischendorf estas utila kaj espereble efika armilo en la batalo kontraŭ la klopodoj beligi, manipuli, fabeligi kaj falsi la historiografion de la Esperanto-movado kiel tio estas sistemece kaj intence praktikata en tiu movado de jardekoj. Pro tio la nova libro estas reala kaj bonvena alternativo al la tendencisma „faka“ literaturo, kiu estas produktita de la Esperanto-movado kaj kiun eĉ seriozaj sciencistoj daŭre utiligas por siaj universtataj verkaĵoj, ĉar objektiva kritika literaturo pri la Esperanto-movado mankas.

La libro de Hartwig Wischendorf, kiu estas verkita sen emocioj, polemiko kaj dubindaj interpretoj, atestas en si mem ankaŭ la admirindan kapablon de la ŝverina aŭtoro (kiu ne estas profesia historiisto) senti la spiriton kaj la problemojn de la Esperanto-movado en GDR, kvankam li ne estis esperantisto.⁶⁶ Sed ankaŭ li rimarkis la unuflankecan kaj nekontentigan traktadon de la ĉi-koncerna historio. Malgraŭ lia distancita skeptiko pri la tuta afero, oni sentas lian simpatian por Esperanto-amikoj, kiuj suferis pro la pedanta ĉikana regado fare de la subprema aparato de la komunisma GDR-diktaturo, kiuj kuraĝis plendi, protesti kaj esprimi sian sinceran opinion, kaj kiuj pledis por senpolitika traktado kaj praktikado de Esperanto, dum lia kritiko klare trafas tiujn oficialajn partiajn funkciulojn, kiuj iĝis integra parto de tiu subprema aparato kaj respondecis pri la pedanta burokratia ĉikanado kaj politikaj premado kaj denuncado de aktivuloj. Kiel samtempano, atestanto kaj atenta observanto de la priskribita periodo kaj kiel GDR-civitano, kiu konscie travivis la tempojn de Ulbricht kaj Honecker, la lucida orientgermana aŭtoro nature bone konis/as la problemojn kaj obstaklojn, kiujn la homoj en GDR alfrontis kun la socialisma reĝimo.

⁶⁵ Drasta ekzemplo de la kruda prisilentado de la Stasia kunlaboro de Blanke koncernas artikolon de la germana Espe-ranto-historiisto Ulrich Lins publikigitan sub la titolo „Detlev Blanke kiel movadano“ en la revuo *Esperantologio*, nova serio 2 (10)/2021, kvankam en la bibliografio la libroj de Hartwig Wischendorf pri la Eo-movado en GDR (2021) kaj Andreas Zimmer pri la Kulturligo (2013/18) estas menciitaj, kio signifas, ke la verkinto de tiu artikolo devis koni la koncernan historion, despli ke iuj raportoj pri la temo aperis ankaŭ en la interreto (kiuj ĝenerale estas sistemece ignorataj en la kontribuadoj de la bando, kiu monopolisme kontrolas kaj superregas la oficialan Eo-historiografion, kvankam ĝiaj aŭtoroj estas konsiderataj kiel bone dokumentitaj kaj informataj pri la aktualaj aĵoj). *Esperantologio* estas UEA-proksima publikaĵo, kies redakcianoj estas intimaj kunlaborintoj de Blanke, dum ĝia eldonisto U. Becker estis membro de la Lötzscheraro de GDREA.

⁶⁶ Cetere la ideo prilabori ĉi tiun temon venis al s-ro Wischendorf post legado de la festlibro pri la Esperanto-movado en Ŝverino, kiu estis verkita de la ŝverina esperantisto Ralf Kuse, kiu menciis lian patron plurfoje en sia verkaĵo, kaj post personaj kontaktoj kun li, kiuj estis sufiĉe konsternaj kaj nekontentigaj. En ĉi tiu festlibro la politika fono de la esperantista agado en la komunisma GDR-diktaturo estis tiel terure misprezentita, ke oni demandis sin, kio estas la motivo malantaŭ ĝi.

Lia gratulinda, dankinda kaj leginda libro, kiun tiu kompetenta aŭtoro el Ŝverino verkis en sia alta vivaĝo, estas modelo por esplorantoj kaj verkantoj kiel tia temo devus esti traktita, kiel tia studo devus esti farita kaj kiel tia libro devus esti verkita. Estontaj esplorantoj de la historio de la Esperanto-movado en GDR (kaj aliaj socialismaj landoj) do ne plu povos okupiĝi pri tiu historio sen uzi lian libron.

Estus do tre utile, se tiu libro, kiu ŝajnas esti senerara, ekzistus ankaŭ en plena Esperanto-traduko.

En la kazo de aliaj iamaj komunisme regataj landoj tia esplorklaboro ankoraŭ atendas. Sed la aliro al koncernaj arkivoj estas (pli) malfacila (ol en Germanio) kaj esperantistoj de la koncernaj landoj, kiuj mem aktivis en la koncerna periodo, evidente ne estas interesataj serĉi, trovi kaj esplori tiajn arkivaĵojn, kvankam de tempo al tempo iuj (ne)esperantistaj studentoj en tiuj landoj okupiĝas pri la temo de Esperanto.

Plej laste necesas atentigi pri la problemoj de la tradukado de specifaj germanlingvaj terminoj, kiujn oni renkontas en teksto, kies terminologio ja estas germanlingva, sed ofte GDR-specifa kaj tial grandparte fremda eĉ por germanlingvaj svisoj, aŭ por aŭstroj. La mankoj en la vortaroj de Krause (kiu mem estis GDR-ano!) estis jam menciitaj, sed la aŭtoro de tiuj vortaroj ne estu kulpigita. Pro tio la tradukanto de tiaj terminoj estas devigita elpensi proprajn taŭgajn solvojn en Esperanto, kiujn povas kompreni kaj akcepti ankaŭ negermanlingvaj Esperanto-legantoj. La recenzanto ne pretendas definitivon de la prezentitaj tradukproponoj kaj esperas, ke laŭsence ili tamen estas kompreneblaj kaj akcepteblaj. Kritikaj reagoj de legantoj estas bonvenaj.

© www.planlingvoj.ch, 2022

Andreas Künzli, Svislando 2022

Andreas Künzli (nask. 1962 en Lucerno, Svislando) 1983-92 studis slavajn lingvojn kaj literaturojn, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato (Svislando). Kiel esperantisto de 1979 li vizitis praktike ĉiujn orienteŭropajn landojn kaj havis multajn kontaktojn kun tieaj esperantistoj. Siajn kontribuadojn pri la historio de la Esperanto-movado en orienta Eŭropo li publikigis precipe sur www.planlingvoj.ch.

Prilaborita kaj korektita definitiva versio (nov. 22).